

HUNGARA VIVO

2
1978
8 Ft

LA PERANTOJ DE HUNGARA VIVO EN EKSTERLANDO

AUSTRIO: GLOBUS (VAZ) Höchstädtplatz 3, 1200 WIEN XX.,

AUSTRALIO: C.B.D. LIBRARY AND SUBS. SERVICE, Box 4886, G. P.O. SYDNEY, N.S.W. 2000

COSMOS BOOKSHOP, 145 Ackland Street, ST. KILDA 3182 READ AND CO., 694—696 George Street, SYDNEY N. S.W. 2000

BELGIO: AGENCE MESSAGERIE DE LA PRESSE, 1 Rue de la Petit-Ile 1070 BRUXELLES

OFFICE INTERNATIONAL DE LIBRAIRIE S. A., Avenue Marnix 30, 1050 BRUXELLES

BRAZILIO: LIVRARIA D. LANDY LTDA, Caixa Postal 7943, 0100 SAO PAULO

BRITIO: BRITA ESPERANTISTA ASOCIO, 140 Holland Park Ave., LONDON W11 4UF

COLLET'S HOLDINGS LTD., Denington Estate, WELLINGBOROUGH, Northants NN8 2QT

THE DANUBIA BOOK COMPANY, 58. Chatswort Road, LONDON NW2 4DD

BULGARIO: DIREKZIA REP, SOFIA

ČEHOSLOVAKIO: MAĎARSKA KULTURA, Narodni Třida 22, 115 66 PRAHA I.

POSTOVA NOVINOVA SLUZBA — dovoz tisku, Vinohradská 46 PRAHA

POSTOVA NOVINOVA SLUZBA — dovoz tlace, Leningrádská 14, BRATISLAVA

ČINIO: CNPICOR. P.O.B. Nr. 88, PEKING

DANLANDO: MUNKSGAARD'S BOGHANDEL, Norregade 6, 1165 KOBENHAVN K.

FINNLANDO: AKATEEMINEN KIRJAKAUPPA, Keskuskatu 2, 00100 HELSINKI 10.

FRANCIO: AGENCE LITTERAIRE ET ARTISTIQUE PARISIENNE, 23 Rue Royale, PARIS 8.

SOCIÉTÉ BALATON, 12 Rue de la Grange Bateliere, 75 PARIS IXe

G.D.R.: ZEITUNGSVERTRIEBSAMT, Strasse den Pariser Kommune 3—4, 1004 BERLIN

G.F.R.: VERLAG Hans LEIPNITZ, Hölderlinstrasse 10, 6 FRANKFURT 1.

H.W.E. SAARBACH GMBH, P.O.B. 101610, 5 KÖLN 1.

HINDIO: NATIONAL BOOK AGENCY PRIVATE LTD., 12 Bankim Chatterjee Street, CALCUTTA

ISRAELO: LEPAC LTD., 15 RAMBAM Str., TELAVIV

ITALIO: LIBRERIA COMMISSIONARIA SANSONI, Via Lamarmora 45, Casella Postale 552, 50121 FIRENZE

SO. CO. LIB. RI., Piazza Margana 33, 00186 ROMA

JAPANIO: MARUZEN CO. LTD., P. O. Box 5050 TOKYO INTERNATIONAL. 100—31. NAUKA LTD., 2—30—19 Minami-Ikebokoro, Toshima-ku, TOKYO 171.

JUGOSLAVIO: JUGOSLOVENSKA KNJIGA, Terazije 27, BEOGRAD

PROSVETA EXPORT—IMPORT, P.O.B. 555, Terazije 16/1, 11001 BEOCRAD

KANADO: PANNONIA BOOKS P.O. Box 1017, Postal Station „B" TORONTO Ont. M5T 2T8

DÉLIBÁB FILM AND RECORDS STUDIO, 19 Prince Arthur Street west, MONTREAL 130 P.Q.

KOREO: „CHUIL U", PHENJAN

KUBO: INSTITUTO CUBANO DEL LIBRO, Obispo 461, HABANA

NEDERLANDO: UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM 3002

NORVEGIO: A/S NARVESENS LITTERATURTJENESTE, Box. 6140, OSLO 6.

POLLANDO: B. K.W.Z. RUCH, ul. WRONIA 23, 00—840 WARSZAWA

RUMANIO: D.E.P. BUCURESTI

D.E.P. ARAD

SOVETUNIO: POCHTAMT—IMPORT, MOSKVA

POCHTAMT—IMPORT, LENINGRAD

SVEDIO: NORDISKA BOKHANDELN, Alströmergatan 22, 101—10 STOCKHOLM

SVISLANDO: AZED AG. Dornacherstrasse 60—62, BASEL 4002

MEROPOLITAN VERLAG, Teichweg 16, 4142 MÜNCHENSTEIN

USONO: FAM BOOK SERVICE, 69 Fifth Avenue NEW YORK, N. Y. 10003

HUNGARIAN BOOKS AND RECORDS, 11302 Buckeye Road, CLEVELAND, Ohio 44120

VENEZUELO: LUIS TARCSAY, CARACAS, Apartado 50892

VJETNAMO: XUNHASABA, Phong Phat Hanh Bao Chi, 17 Dinh Le HANOI, RD

E HUNGARA VIVO

Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik
Responda redaktoro:
d-ro István Nagy
Arta redaktoro: Éva Farkas-Tatár

Redaktoraro:
Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Zsuzsa Varga-Haszonits

Ĉefkunlaborantoj:
Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi, Lajos Tárkony

Redakcio: Budapest VIII.,
Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141-078, 334-194

Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio

Responda eldonisto: Tibor Vaskó
direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96162 1900 Budapest V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj) Ft. 48.—, al eksterlando krome Ft 9.60 por afranko.

Peranto al eksterlando: KULTURA, H—1389 Budapest P.O.B. 149
Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,— Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto

78-7037 Somogy m. Nyomda 4000
Responda gvidanto:
Béla Farkas direktoro
Indexszám: 25 377
ISSN 0018—7704

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: H—1081 Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6.
Poŝta adreso: H—1368 Budapest
Pf. 193
Aperas dumonate
XVIII. jaro 1978. Nro 2 (78)

ENHAVO

Al la Universala Kongreso — tra Hungario 42
Mihalkov, Georgi: Ĉarma mara urbo 43
Déry, T.: Sedimento de tagoj 44
Halász, Z.: Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo II. (VHZS) 46
Varga-Haszonits Zs.: Hungara propono en la Beograda Konferenco 49
Belorusa poezio: N. *Ĥvedarovič*, (P. *Ĉelauskas*) 50
P. *Brouka:* Eraro (K. *Rabinovič*)
A. *Baĉyly:* Nefinita kanto (P. *Ĉelauskas*)
M. *Harnak:* Kvinminuta kunveno (R. *Grinŝpan*)
J. *Svirka:* Se nur ne tiu fora majo (P. *Ĉelauskas*)
Kosztolányi, D.: Paulina 51
Tóth, E.: La murdita juglandarbo 52
Zágoni, J.: Migranto en la dudeka jarcento 54
József,A.: Patrujo 55
Benczik, V.: Mi havis kaj havas riĉplenan vivon. Intervjuo kun Frans van *Dooren* 56
F. V. *Dorno:* Levu la manojn (fragmento) 57
El slovaka antologio 58
Bel, M.: La departemento Malgranda Hont. (E. V. *Tvarozek*) 58
Gergely, M.: Kapoj de Oszkár Papp 59
Farkas-Tatár, É.: Panoramo 60
Rados, P.: Literetura metiejo 62
Nemere, S.: La lago. 63
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 64
Rados, P.: Fotoartisto Vince Lussa 65
D-ro László, F.: La situacio kaj evoluado de ŝirmado kontraŭ inundoj en Hungario 67
Lesznai, L.: Muziko kaj ĝia prezentado 73
F. E.: Kultura kalejdoskopo 75
Benczik, V.: Recenzoj 76
Kökény, L.: Enhavtabelo de Hungara Vivo 1977 77
Krucenigmo, Ŝako 79
Leterkesto, Korespondi deziras 80

La Konferenco en Beogrado...

jam finiĝis, tamen ni revenas al ĝi, konigante hungaran proponon, kies motivoj kaj celo plene harmonias kun la klopodoj de la Esperanto-movado. La hungara lingvo estas praktike senparenca en Eŭropo (ĝi apartenas al sama lingvofamilio kiel la finna kaj estona, sed la simileco kun tiuj du lingvoj estas tro malgranda por senteble faciligi la lernadon de ekz. la finna por hungaro), kaj tiu fakto eĉ pligravigas nian malavantaĝon en la internacia kultura interŝanĝo. Ni, hungaroj ĉiam turnis nian atenton al eksterlando, por alproprigi al ni ĉiun valoron, kiun kreis aliaj popoloj: en nia lando literatura tradukado praktike havas la saman rangon, kiel propra verkado. Ni trancis vojon al la monda kultura trezorejo, sed tiu vojo ĝis nun bedaŭrinde restas unudirekta: niaj kreaĵoj ne povas atingi pere de ĝi la mondan trezorejon. Kvankam — kiel kelkaj eksterlandaj konantoj de la hungara kulturo konstatis — ni havas „eksportindajn" kulturajn produktojn. Esperantistoj scias pri tio iom pli, ol la ceteraj homoj. Surbaze de la esperantlingve ekkonitaj verkoj W. *Auld* nomis la hungaran literaturon „unu el la grandaj literaturoj de la mondo." Ni klopodos ankaŭ estonte peri al la esperantistoj la valoraĵojn de nia kulturo, sed ni volus, ke ankaŭ tiuj centmilionoj da homoj, kiuj ne konas Esperanton, havu iel eblon ekkoni tion, kion nia kulturo povas kontribui al la monda trezorejo. Tion celis la hungara propono en la Beograda Konferenco, kaj kiel la eĥoj montras, ĝi trovis favoran akcepton en multaj landoj.

Ni konigas en HV unuavice la hungaran kulturon, sed ni volonte cedas spacon ankaŭ por prezenti kulturajn valoraĵojn de aliaj malgrandaj popoloj, kiuj suferas por la sama diskriminacio, kiel ni. Paĝo el la belorusa poezio en la jena numero estas frukto de tiu ĉi principo.

Espereble trovos plaĉon ĉe nia legantaro la prozaĵo de Tibor *Déry* (unu el la malmultaj grandaj hungaraj verkistoj, kiuj sukcesis atingi certan internacian renomon). La samon ni esperas pri la longa poemo de Attila *József:* „Patrujo", kiu estas unu el la plej potencaj poemoj, verkitaj en la hungara lingvo. Ŝatantoj de la originala literaturo verŝajne ĝoje legos intervjuon kun la „mistera F. V. *Dorno*". Interesiĝantoj pri la bildartoj povas konatiĝi kun la grafikisto Oszkár *Papp* kaj fotartisto Vince *Lussa*.

Se vi trovas, ke tiu ĉi numero valoras la prezon, kiun vi elspezis por ĝi, pripensu: ĉu estus tre malfacile varbi unu el viaj amikoj por fariĝi abonanto?

AL LA UNIVERSALA KONGRESO — TRA HUNGARIO



Facile estas orientiĝi ĉie en la lando. Sur la bildo en la fono troviĝas la bela urbodomo de Győr

Baldaŭ alvenos somero, kaj en ĉiuj landoj de Eŭropo — kiel ankaŭ en aliaj kontinentoj — pluraj milionoj da homoj nun prenas la mapon por trovi sur ĝi simpatian lokon, taŭgan por agrable pasigi la feriojn. Komenciĝos la moderna popolmigrado, alvenos la jara ĉefsezono de turismo.

Ĉijare la esperantistoj sekvos vojon inversan, ol niaj prapatroj antaŭ mil kvincent jaroj: oni marŝos de okcidento al oriento, al la apudmara bulgara urbo *Varna,* kiu gastigos la 63-an Universalan Kongreson de Esperanto. Do, tiu urbo estas fiksa punkto en la someraj planoj de multaj esperantistoj, tamen certe por la plimulto restas elektota la vojo al la ĉijara ĉefurbo esperantista.

En la mezo de Meza Eŭropo

Estas malmultaj landoj en Eŭropo, kies loĝantoj bezonus fari ĉirkaŭvojon por tuŝi Hungarion, vojaĝante al la UK. Hungario situas en la »mezo« de Meza Eŭropo, kaj nature prezentas sin al vi por kelktaga vizito antaŭ la UK. Informitaj esperantistoj bone scias, ke en Hungario funkcias vigla Esperanto-movado, kiu ĉijare restos aktiva ankaŭ dum la somero, ja la hungaraj esperantistoj mem kongresos inter la 14-a kaj 17-a de julio en Budapeŝto. Indas do veni, kaj utiligi kelkajn tagojn antaŭ la UK por revidi malnovajn amikojn aŭ trovi novajn konatojn ĉi tie.

Certe multaj veturos al Varna per aŭtomobilo, kiu ebligas al la ferianto pli facile kaj rapide moviĝi de loko al loko. Ni vidu do, kion oni povas vidi en Hungario dum mallonga tempo, ne forlasante je signifa distanco la vojon kondukantan al Bulgario.

Esztergom, apud Danubo kun sia renesanca baziliko, mezepoka ĉefurbo de Hungario

Sopron — perlo de Okcidenta Hungario

Por turistoj alveturantaj el Aŭstrio la unua ĉefa vidindaĵo certe estas *Sopron.* Ĝia malnova centra parto estis rekonstruita sub skrupula gvidado de arthistoriistoj, kaj nun ĝi elspiras aŭtentikan mezepokan atmosferon. (Tamen *sen* inkvizicio!) Tre facile ĉi tie oni povas pasigi tutan tagon. Se la vespero trafos vin tie kaj mankos libera ĉambro en la hoteloj de la urbo, veturu ĉ. tridek kilometrojn ĝis la urbeto *Kapuvár,* kie atendos vin la nova hotelo »Hanság«.

La sekvan tagon vi povos dediĉi al *Győr,* kiu urbo situas ĉe renkontejo de riveroj. Tamen, post iom malfrua tagmanĝo ekveturu al Budapeŝto. La ŝoseo estas bona, sufiĉas maksimume du horoj.

„Reĝino de Danubo"

Tiel oni ofte titolas la hungaran ĉefurbon, kaj vi povus pasigi ĉi tie tre multan tempon, ja vidindaĵoj estas sennombraj. Sed kiel ajn mallongan tempon vi pasigos en Budapeŝto, ne maltrafu kelkajn »bazajn« vizitojn.

Nepre iru al la supro de la Gerharda monto — ĝi troviĝas sur la dekstra bordo de Danubo, meze de la urbo — ja de ĉi tie antaŭ viaj okuloj aperos unike bela panoramo. Same dediĉu tempeton por viziti ankaŭ la Margaretan insulon, kies belaĵoj havos por vi apartan ĉarmon, se vi legis la romanon de G. Gárdonyi: *Sklavoj de Dio,* kies agado parte disvolviĝas sur tiu insulo. Se vi ŝatas muzeojn, iru al la Nacia Muzeo, kie vi povos vidi multajn interesaĵojn (ne nur pri la historio de Hungario), aŭ al la Belarta Muzeo, kie vi trovos surprize riĉan kolekton de pentraĵoj interalie de grandaj hispanaj artistoj.

Se vi pretas dediĉi iom da tempo al la ĉirkaŭaĵo de la ĉefurbo, ni konsilas al vi ekveturi norden. Estas preferinde ripozigi iom la aŭtomobilon (kvankam la ŝoseoj estas senripoĉaj en tiu regiono) kaj fari ŝipekskurson ĝis la urbo *Esztergom.*

Tra la Hungara Ebenaĵo

Forlasinte Budapeŝton vi havos du eblajn vojojn. La pli rekta kaj rapida kondukas al sudo. Ĝis la urbo *Kecskemét* mankas speciala vidindaĵo krom la tuto de la pejzaĝo mem. Ĉi tie vi trapasos tipe hungaran ebenan regionon, kun agroj, paŝtejoj kaj fruktarbejoj. Dediĉante kelkajn horojn al la urbo Kecskemét (en kies ĉirkaŭaĵo kreskas la frukto de la fama hungara abrikota brando), samtage vi povas alveni al *Szeged,* la plej granda urbo de la granda hungara ebenaĵo. Inter ĝiaj multaj vidindaĵoj ne maltrafu la *Hungarlandan Esperanto-Muzeon kaj Bibliotekon.* Forlasinte Szeged, vi baldaŭ atingos la limon de Jugoslavio.

Tra Hortobágy

Alia vojo el Budapeŝto kondukas orienten. Se vi pretas fari ĉ. 100—150 -kilometran ĉirkaŭvojon, vi povas admiri la sovaĝan belecon de *Hortobágy.* Parto de tiu fama regiono estas Nacia Parko, kaj, kiel tia, ĝi konservis sian tradician aspekton. Proksime al Hortobágy — survoje al Rumanio — troviĝas *Debrecen,* kie antaŭ atendas vin abundaj turismaj vidindaĵoj kaj multaj afablaj esperantistoj. Konatiĝinte kun tiu urbo, vi povos ekveturi al Rumanio, kie via unua stacio estu la bela urbo *Oradea.*

Sen deviga monŝanĝo

Antaŭ ol ekvojaĝi, konsideru niajn konsilojn. Hungaraj pejzaĝoj portas apartan ĉarmon por esperantistoj, kiuj vivas en landoj kun multaj montoj. Ĉi tie vi trovos plejparte ebenaĵojn (via aŭtomobilo povos ripozi iom post la Alpoj aŭ Karpatoj), tamen regionojn tre variajn. Kaj fine unu bona novaĵo por gastoj el nesocialismaj landoj: ekde la komenco de tiu ĉi jaro oni likvidis la devigan ŝanĝon de valuto ĉe la aĉeto de la hungara vizo, sekve, vi mem povas decidi, kiom da mono vi interŝanĝos dum via restado. La hungaran vizon, kiel ankaŭ ĝis nun, oni povas ricevi sen formalaĵoj ankaŭ ĉe la landlimo.

Ne forgesu ke hungaraj esperantistoj atendas ankaŭ vin!

ĈARMA MARA URBO

Varna — sufiĉas nur tiu nomo kaj tuj mi kvazaŭ vidas urbon, kiel blanka mevo ĉe la nigramara bordo.

Ravitaj de la beleco de Varna, de ĝia pitoreska ĉirkaŭaĵo, de ĝia vigla kultura kaj ekonomia vivo, la bulgaroj, fremdlandaj gastoj kaj miloj da turistoj milde kaj karese nomas ĝin »Perlo de la Nigra maro«, »Mara belulino« aŭ »Nigramara ĉefurbo«.

Kiu el tiuj multaj epitetoj pli trafe kaj pli plene karakterizas tiun bulgaran maran urbon?

Ĉu mara perlo?

Varna troviĝas ĉe granda oportuna golfo kaj la ondoj de la Nigra maro karesas la orajn sablojn de la longa stranda strio. Famaj kaj tutmonde konataj estas la restadejoj sur la bordo ĉirkaŭ la urbo.

Se vi veturos norden de Varna nur post 20 km vi eniros la ĉarman ripozlokon »Ora Sablaro«. Tie la naturo mirakle kunligis la kristalan maran akvon kaj molan sablaron kun densaj malvarmetaj arbaroj. Modernaj hoteloj, komfortaj restoracioj larĝe malfermas siajn pordojn por ĉiuj, kiuj deziras ripozi sub la agrablaj sunradioj kaj bloveta mara vento.

Norde de la urbo troviĝas ankaŭ aliaj allogaj ripozejoj: »Amikeco«, »Albena«, (kies hoteloj ravas per sia moderna ŝtupara arkitekturo, »Rusalka" k.a.).

Proksime ĉe Varna, inter altaj rokoj kaŝas sin la eta romantika urbo *Balĉik*. Interesa vidindajo estas »Stona arbaro« — naturaj, cilindraj altaj ŝtonoj, formitaj el erozio dum jarcentoj. Ĉe Varna troviĝas ankaŭ »Alaĝa monaĥejo«, interesa historia monumento kaj arkitektura fenomeno. Ĝi similas al malfacile alirebla nesto, enĉizita en la rokoj.

Dekoj estas la vidindaĵoj kaj belaj turismaj lokoj ĉirkaŭ la urbo. Per siaj restadejoj, sipozejoj, oraj strandoj, verdaj arbaretoj kaj parkoj Varna brilas kiel mara perlo sur la bordo.

Ekonomia kaj kultura centro

La urbon fondis grekaj koloniistoj kaj ĝia unua nomo estis *Odesos*. La arkeologiaj elfosaĵoj klare montras la viglan ekonomian kaj kulturan vivon de Odesos. Post la grekoj alvenis tien romianoj kaj post ili — slavoj. Varna estas slava vorto.

De jaro al jaro Varna kreskis, pligrandiĝis kaj nun estas moderna blanka urbo kun larĝaj bulvardoj, grandaj konstruaĵoj, koketaj domoj, multaj parkoj, buntfloraj ĝardenoj.

Nun Varna havas 270 mil enloĝantojn kaj okupas la trian lokon en la lando. En ĝia granda haveno ĉiutage ekankras ŝipoj el diversaj partoj de la mondo.

Varna estas vera urbo de la juneco. La junularon, kiun oni povas vidi ĉiam sur la stratoj, en la kinejoj, teatroj kaj parkoj, donas apartan ĉarmon al la urbo. Tie troviĝas multaj institutoj kaj altlernejoj: Medicina Instituto, Supera Maŝin-Elektroteknika Instituto, Supera Instituto pri Ŝtata Ekonomio, Supera Maroficira Lernejo, Instituto por Perfektigo de Instruistoj, Duonsupera Instituto por Internacia Turismo.

Varna fariĝis ankaŭ granda centro de sciencoj. Tie estas Scienc-Esplora Instituto de Oceanografio, Instituto pri Ŝipkonstruado k. a.

Ĉiujare en Varna okazas gravaj internaciaj kongresoj, konferencoj, simpozioj. Varna estas fama ankaŭ pro ĉiujara festivalo de la bulgaraj filmoj. Ĉiusomere tie okazas muzikaj, baletaj, teatraj artkonkursoj.

En la urbo estas multaj muzeoj, galerioj kaj interesaj monumentoj. Tre proksime ĉe Varna troviĝas vilaĝo *Vladislavovo*, kiu portas la nomon de la hungara-pola reĝo Jagello Ulászló. Tie en la 1444-a jaro Ulászló militis kontraŭ la turkoj kaj pereis por la libero de la bulgara popolo. Nun tie estas maŭzoleo de Ulászló kaj monumento de János *Hunyadi*.

Ne la maro estas la sola trezoro de Varna. La vigla ekonomia kaj kultura vivo de Varna formas la veran karakteron de tiu alloga bulgara urbo.

Ĉefurbo de 63-a UK de UEA

Esperantistoj, vizitante Varna-n ĉiam miras kaj restas agrable surprizitaj kiam ili vidas, ke unu el la centraj stratoj de la urbo nomiĝas »L. L. Zamenhof«. Tiu fakto ne estas hazardo. Esperanto-movado en Varna havas riĉan historion kaj tradicion. Ankoraŭ en 1904 tie estis fondita Esperanto-societo »Albatroso«. Dank' al aktiva, konstanta kaj obstina agado de la membroj de la urba societo, Esperanto-movado en Varna prosperas kaj rapide disvastiĝas.

En la Supera Instituto pri Ŝtata Ekonomio Esperanto estas instruata, kiel fakultativa lingvo.

Baldaŭ en la belega granda halo de la palaco de sporto kaj kulturo solene eksonos Esperanto-himno por inaŭguri la fruktodonan laboron de la 63-a UK de UEA.

Varna, la ĉarma bulgara urbo amike atendas la esperantistojn el la tuta mondo.

Georgi *Mihalkov*

La 63a Universala Kongreso okozas en moderna kaj komforta konstruaĵo: Kongresa kaj sporta palaco en Varna





En aŭgusto de 1977 mortis la 82-jara *Tibor Déry*, , verkisto tute originala de la hungara literaturo de la XX-a jarcento, kiu en siaj du romano-epesoj (*„La nefinita frazo"* kaj *„Respondo")* desegnis la socian panoramon de la ĉi-jarcenta Hungario.

Komunisto de sia junaĝo, li aktivis dum la Konsilia Respubliko en 1919; poste la politika premo devigis lin elmigri. En tiu komenca periodo de sia arta agado li eksperimentis pri multaj modernaj tendencoj, eĉ pri poezio; li fariĝis matura verkisto fine de la 30-aj jaroj, kiam li trovis sian propran voĉon, tiun de individua, ne anekdotema sed parabolema realismo.

Li okupiĝis ĉiam pri moralaj problemoj, kun dilemoj de „neceseco kaj libero", „kredo kaj dubo". Tiuj ekzistismaj demandoj naskis la verkojn ĉiam traplektatajn de profunda humanismo. La plej bonaj, krom la menciitaj, estas la romano *„S-ro G. A. en X."*, la romaneto *„Niki"*, la filmigitaj noveloj *„Amo"* kaj *„Naskiĝo de Menyhért Simon"*; kaj la plej novaj: la aŭtobiografio-karaktera *„Kara boopeer... !"* kaj la moderna *„Imagita riporto pri pop-festivalo"*.

Premite de la neniam akceptata kaj ĉiam kontraŭbatalata maljuneco, siajn lastajn jarojn li pasigis en kreiva solo, ĉiutage surpaperigante ion. Tiel naskiĝis du volumoj: *„Sedimento de tagoj"* kaj *„Sedimento de pluaj tagoj"*, konsistantaj el mallongaj skizoj, meditadoj, komentarioj pri la plej etaj, ĉiutagaj okazaĵoj kaj pri la plej grandaj, mondsignifaj eventoj. Filozofiaj pensoj, notitaj de verkisto tre saĝa, emociema, en kies intelekta perspektivo ĉio trovas lokon, kio rilatas la homon, la homaron, ĝian nuntempon kaj futuron.

Ĉi-sube ni prezentas fragmentojn — en si mem aŭtonomajn pensarojn — de lia dua artikolo-volumo, eldonita en 1975: *„Sedimento de pluaj tagoj"*.

Tibor Déry

Sedimento de tagoj

Ĉiunokte ĉirkaŭ la dua-tria horo, antaŭ ol enlitiĝi, mi malfermas la fenestrojn por aerumi miajn ĉambron, kapon, pulmojn. Ili tion bezonas. La superfluaĵo, kiu kolektiĝis en ili dumtage: fumo, cindro kaj restaĵo de ĉiutagaj zorgoj, estu do ĉiuj dispecigitaj pere de l'nokta fajrado de la steloj. Kelkfoja profunda enspiro de la silento de Pasarét, je tia horo maltrankviligita nur far la lumo de mia skribotabla lampo, finigas la tagon: mi transvivis ĝin. Eble mi tamen estas filo de la bonŝanco? Sed malgraŭ tio restas la espero, ke mia dormo estos sensonĝa.

Lastan nokton, dum mi kubutumis en la fenestro, mia rigardo kaptis la lunon, kiu naĝis super la kontraŭa domo. En ĝia fono, la steloj. Kaj mi surprizis min mem, ke tiufoje miaj sensoj elsuĉas el ĝi ne la ektremigan ideon de la Senfineco, sed tiun de la finiteco. La ĉiela astro senvestigis sian transmondan brilegon, sian »ĉielecon«; ĝin tuŝis homa mano, ĝin tretis homa piedo. Mi diras: tretis. Same kiel la Tero, kun paso de la tempo ankaŭ la luno fariĝos objekto de uzo.

Eĉ ĝia epiteto-sistemo ŝanĝiĝos. La luno, objekto de komparo por poetoj, verkistoj, geamantoj dum sennombraj jarcentoj, priskribita per centoj kaj centoj da ornamaj epitetoj, je inspiro de niaj sensoj kaj fantazio —, de nun eltiros el nia vortostoko novajn epitetojn, ŝarĝitajn de la Tera scio.

Kio jam estis „ĉiela gondolo", tio nun subiĝas ĝis pli konkretaj akvoj.

Sceno el sceneja varianto de la „Imagita riporto pri pop-festivalo"



Homoj sur la Luno!

Tio tremigas kaj timigas. Mi trovas plezuron en la homo, en la senindulga konsekvenceco de lia intelekto, en lia multflankeco; malofte okazas al mi io simila. Je tiom multa la homo estus kapabla, se...

Se li havus la necesan saĝon. Se li nutrus ne nur sian malmoderigeblan scivolemon, sed ankaŭ, kaj pli intense, siajn proprajn korpon kaj animon, endanĝerigitajn.

Mi legas ekzemple, ke el inter la ĉirkaŭ sesdek milionoj da loĝantoj de FRG, kvar milionoj suferas je diagnozita »grava depresio«; eĉ parto la malsanon heredis, pli granda akiris ĝin kaŭze de sia pelitaŭzita vivo. Krome mi legas, ke ĉiam pli multaj bienoj en la Okcidento forĵetas la »grandajn akiraĵojn« de la moderna agrikulturo, ne volante plu veneni nian Teron, nian aeron, niajn akvojn. Mi legas, kiom progresis — estas publike sciate — nia militscienco, koncerne la teknikon de l'ekstermo de homoj. Mi legas, ke ...

La scio estas inda je laŭdo. Nur ĝi ne okazigu al ni tion, kion la fritita kolbaso al la iama malriĉulo. Feino volis plenumi liajn tri dezirojn. Unue la malriĉulo petis peceton da fritita kolbaso. Kverelante kun la edzino, li kriis: se ĝi fiksiĝus sur via nazo! Plenumita ankaŭ ĉi tiu deziro, kion alian povis fari la malriĉulo: li petis la feinon, ŝi bonvolu eligi la kolbason de la edzina nazo.

Mi konas ununuran situacion, en kiu oni defendas kontraŭ ĉio sian opinion, firme, neheziteme, obstine, same kiel la nukleo gardas sian propran unuecon. Eble oni kredas, ke ĝia ŝanĝiĝo lin pereigus. Li eble pravas.

Mi parolas pri la opinio de l'homo pri si mem.

Li ne kapablas modifi ĝin ĝis la morto. Eĉ instruita de propra malfeliĉo, se la intelekto emus la ŝanĝon, la enkorpaj organoj ĝin malpermesas. Se li adaptiĝas ŝajne al la socia premo, en la fundo de la animo restas konvinkita adepto de si mem, li akceptas neniun korektaĵon, eĉ la plej modestan. Siajn akcidentojn li atribuas al la cirkonstancoj, kaj ne al si mem; kaj tiel same siajn sukcesojn, sed ankoraŭ pli akcentite. Krimulo — aŭ tiu, kiun oni etikedas per tiu nomo — ĉiuokaze opinias maljusta la socian revenĝon, ĉar tio kontraŭdiras la opinion elformitan pri si mem.

Do, mi ripetas, tiu estas la sola kazo, kiam ĉiu insistas ĉe sia opinio, heroo, ĝismorte.

Ne nur la printempo disputas kun mi. Homoj, kiuj nun travivas la aŭtunon de sia vivo, ankaŭ prezentas la ridindan pretendon de senmorteco; precipe la cetere tre sobraj virinoj. Kion mi aŭdis, dum ok jardekoj en la kakofonio de l'naturo: nur jeson, freneze ripetiĝantan. Kaj kion en la kriado de la homa vivo, supozita pli saĝa ol la naturo? Lá samon.

Sed kie restas la motivado? La artikita voĉo de la intelekto?

Mi publicas, tute ne pro mokemo, sed plene de admiro, kvankam nekomprenante, skizon de virino el mia portretaro: ni ŝin nomu A. Ŝia aĝo proksimas la sesdekan, ŝi estas multe pli maljuna ol la edzo, antaŭ kiu ŝi kaŝis la grandan diferencon de aĝoj, jam en la momentoj de ilia geedziĝo. La viro, kun larĝaj ŝultroj, korpulenta, dikiĝema, estas du kapojn pli alta ol la birdvizaĝa, birdetpaŝa virino, kies hararo jam iĝis griza, do — nenio pli natura — ŝi farbas ĝin. Facile estas imagi: postulas konstantajn penadojn, la plenan uzon de ŝia virina ruzo, ke dum longegaj, senindulgaj jardekoj ŝi ne forgesu, nek por momento, la rolon de la „pli juna"; neniam tage, kaj malpli nokte.

Ŝi naskiĝis en la Jugoslavia Novi Sad, sekve nenio ŝin malhelpis, ke tuj antaŭ la edziniĝo ŝi neniigu la koncernajn dokumentojn, kaj enskribigu malverajn indikojn en la Budapeŝta matrikulo; estis neeble ilin kontroli. Pasporto, persona legitimilo komplezeme adaptiĝis al la nova indikaro.

Sed malpli la naturo. Jam delonge ŝi ne estis virino, sed — ĉar la edzo ne konjektis tion — unudufoje monate ŝi forlasis ruze sian oficejon, kaj enlitiĝis hejme, plendante pro akraj doloroj. Tiun pezegan provon ŝi iel eltenus, sed pli malfacile la alian, kiu devenis de la oficejo: ĉar ŝi prisilentis sian aĝon, ne povis ankoraŭ fariĝi pensiulino, kvankam antaŭlonge ŝi plenumis sian kvindekkvinan jaron.

Pro tio s-ino A. rajtis riproĉi nur sin mem, tamen, koleriĝante, ŝi ekabomenis la oficejon, kaj ŝian ĉiumateman foriron direkton de la laborejo akompanis daŭraj blasfemadoj.

Sed kio pleje provis ŝian kuraĝon kaj eltenon, estis la dentaro, pli precize: la falsa dentaro, anstataŭanta la iamajn dentojn. La edzo eĉ pri ĝia ekzisto ne sciis, tiel povis okazi interparoladoj laŭ la tipo:

Edzo: Kia ajn brile bonega estu via dentaro, karulineto, vi devas tamen foje montri ĝin al la dentisto. Li akceptos min postmorgaŭ, por plombi la 7-an molaron; vi akompanos min.

Edzino: Sed...

Edzo: Nenia sed! Eĉ la plej miraklaj dentoj de la mondo bezonas kontrolon.

La sekvan tagon, jaŭde, en la dentkuracista kabineto, s-ino A., al la dentisto: S-ro doktoro, kiam mi morgaŭ posttagmeze akompanos mian edzon, ne perfidu min, ke mi havas falsan dentaron, mi petegas vin, la ĉielo vin benu, nek vorton pri tio!

Post jaro, la prisilentita dentaro preskaŭ mortigis ŝin: en la operaciejo, ŝi nenion konfesis al la kirurgoj. Dum ŝi kuŝis narkotita, la dentaro glitis ĝis enfali en la gorĝon, nur la bonŝanco savis ŝin de sufokiĝo. Rekonsciiĝante en la hospitalĉambro, la unua afero petata de ŝi estis, ke la flegistino redonu la dentaron, por ke ŝi povu akcepti la vizitontan edzon en sia kutima, plena pompo. Kun vera kompato mi komunikas, ke pro la postnarkota stato ŝi ne rimarkis la edzon starantan apud la kontraŭa rando de la lito, kiu aŭdis ĉiun vorton.

Melodramo? Komedio? Heroino? Viktimo? Kies heroino, kies viktimo?

Afabla leganto, plenigu vi mem la konvenan rubrikon!

Mi legas, ke en la strato Poeto, en la XII-a distrikto, konstruiĝas muzeo pri naturprotektado. Apude pretiĝas simbola tombejo, por rememorigi la bestorasojn, kiuj jam ekstermiĝis ĉie en la hungara teritorio.

Kiu starigos memorŝtonon por la homo, kiam en la Tero jam estos ekstermita propramane eĉ la lasta reprezentanto de la raso?

Tradukis: Zsuzsa *Varga-Haszonits*

2. La fondo de la ŝtato

Post fiasko de la rabaj militiroj, princo Géza (972—997) frontis krizan situacion en la lando, tial li devis preni historisignifan decidon: inviti okcidentajn misiistojn. Ĉar adopto de kristanismo egalis absolutan transformon de la ĝistiama vivmaniero de hungaroj, kune kun la misiistoj li invitis ankaŭ feŭdajn kavalirojn, por ke ili helpu en la fleksado de ĉiuj, kiuj ribelis kontraŭ la nova kredo. La princo ordonis al la batalantoj lojalaj je li, okupi la plej gravajn strategiajn punktojn; li konfiskis grandan parton de la teritorioj loĝataj de la triboj, kaj tiujn kampojn li submetis sub la jurisdikcion de reĝaj fortikaĵoj, por kies administrado li nomumis ĵupanojn[1] dependajn de la princa potenco. Rilate eksteran politikon, li ambiciis antaŭ ĉio solidigi la internacian pozicion de la lando. Komence de sia regado, en 973, li sendis deputitaron en Quedlinburg-on, en la kortegon de la germana-romia imperiestro, Otto la 1-a; la deputitoj tie deklaris en la nomo de la princo, ke la rabaj militiroj de la hungaroj estis finitaj por ĉiam. Post certa tempo, tamen, fariĝis ĉefa tasko defendi la sendependecon de la lando kontraŭ la germana-romia imperio.

Post la morto de Otto la 1-a, pro tiu kaŭzo apogis Hungario la princon de Bavario, Henrikon la II-an kontraŭ Otto la II-a; tial la hungara princo ĉi-foje invitis bavarajn misiistojn kaj kavalirojn.

Princo Géza fariĝis kristano nur du jarojn antaŭ la morto. La filo, Vajk, kiu en la baptiĝo

Reĝo Stefano kun sia june mortinta filo, Emeriko

ricevis la nomon István (Stefano), jam de sia frua juneco estis edukata kune kun la disĉiploj de la misiisto kaj Praga episkopo Adalberto. Por firmigi la aliancon kun la bavaroj, Stefano edzinigis la Bavarian princinon Giselan.

Stefano la 1-a (Sankta Stefano, 997—1038) daŭrigis kaj kompletigis la transformigon de la lando. Komence de sia regado li devis venki reziston de la triboj de grandpotenculoj, kiuj anstataŭ adopti la kristanismon, deziris restarigi la praajn kredon kaj vivmanieron. La ribelantojn li venkis, koste de sangaj bataloj.

Intertempe, Stefano ricevis de

[1] *Jupano* —proksimume: prefekto

HUNGARA POPOLO ★



Monero de reĝo Stefano.

la papo kronon, per kiu en la jaro 1000 li estis kronita kiel reĝo. La kronado jam ankaŭ formale sankciis tiun fakton, ke la praa triba-genta organizo, ruinigita far la centra potenco, estis tranformigita je nova povosistemo, konvena al la epoko. La hungara ŝtato naskiĝis.

La organizaj unuoj de la ŝtato nomiĝis regionetoj, estrataj de ĵupanoj, kiujn nomumis la reĝo, kaj loĝataj de liberuloj, duonliberuloj kaj servutuloj. Certa ono de loĝantoj estis devigata militservi en la reĝaj fortikaĵoj, dum la aliaj laboris por la sinjoro. Teritorioj de feŭdaj bienuloj estis multe malpli etendiĝantaj ol tiuj de la reĝo; samtempe, la ekleziaj bienegoj ludis ege gravan rolon en la ŝtata vivo. Reĝo Stefano fermane finis la misian laboron: li donis severajn leĝojn, kiuj devigis fariĝi kristanoj la fidelulojn de la praa kredo, la loĝantaro devis konstrui preĝejojn kaj pagi la dismon por la eklezio; li organizis sur la landa teritorio ok diocezojn kaj du ĉefepiskopujojn. La Benediktanoj, invititaj al Hungario far Stefano, ludis tre gravan rolon en la evoluigo de la ekonomio, en la enkonduko de la agrikulturo kaj en prosperigo de la metioj.

La senkapigo de la ribelinta tribestro Koppány, ĉirkaŭ la jaro 998. Miniaturo el la Bildkroniko de Marko Kálti.

La ekstera politiko de la reĝo koncentriĝis je la defendo de la sendependeco de l'patrio. Kontraŭ la minacanta potenco de la germana-romia imperio, kies revo estis vasaligi Hungarion, Stefano alianciĝis kun Boleslavo la 1-a, reĝo de Pollando. Kiam en 1030 la trupoj de l'imperiesto Konrado la 2-a invadis la landon de Stefano, la hungaroj utiligis sian tre malnovan, jam tradician militan taktikon: bruliginte ĉion malantaŭ si, kaŝinte aŭ neniiginte la mangaĵprovizaĵojn, ili retiriĝis al la nekonkereblaj marĉejoj, de kie — per oftaj surprizaj atakoj — tagon post tago malfortigis la germanajn trupojn. Finfine, ili entreprenis decidan atakon, per kiu la invadintoj definitive estis neniigitaj. La postmilita pakto grandmezure pliigis la reputacion de la nova, hungara ŝtato kaj asignis por la lando novajn teritoriojn.

Tradukis: *VHZS*

KOMENCU ĈE SKÁLA!

SKÁLA VARSKALO

NI ATENDAS VIN

de la 7-a horo
ĝis la 20-a horo

en nia nutraĵ-sekcio

de la 8-a horo
ĝis la 19-a horo

en nia sekcio
de multspecaj
industri-varoj

Kliento-servo: 850-850

Hungara propono en la Beograda Konferenco:

Pri la malpli disvastiĝintaj lingvoj kaj kulturoj



La gvidanto de la hungara delegacio parolas en la Beograda Konferenco

Parolante pri mondkulturo, mondliteraturo, ĝenerale oni pensas nur pri literaturoj kaj kulturoj elformiĝintaj pere de la t. n. mondlingvoj. Kiaj universalaj valoroj povus naskiĝi en tiuj „nekonataj", „nekompreneblaj" lingvoj, kiuj — en Eŭropo — estas ekz la hungara, slovena, pola, rumana? — jen la malica demando. Nature estas esceptoj, kiel *Petőfi, Mickiewicz* aŭ *Hristo Botev*, sed kiom devis lukti por la internacia venko* *La Tragedio de l' Homo*, verko por la tuta homaro, kies sola kulpo estas, ke ĝin aŭtoris filo de malgranda nacio, Imre *Madách?*

La monda rekono de kulturaj rezultoj de la lingve aŭ teritorie etaj popoloj, parte ĉiam dependas de la eventualo. En intereso de la malaperigo de la supre citita falsa opinio, de la ŝanĝo de tiu malavantaĝa situacio, la hungara delegitaro en novembro de 1977 prezentis proponon en la Beograda Konferenco pri Sekŭreco kaj Kooperado en Eŭropo. Tiu Konferenco, pro sia celo kaj etoso, estis konvena forumo por la propono. D-ro Rezső *Bányász*, vicestro de la delegitaro en sia alparolo substrekis, ke „Hungario konsideris ĉiam kiel komuna celo la ekkonon de intelektaj kaj kulturaj valoroj de ĉiu popolo". Li aldonis: „Ni, hungaroj, estas malgranda popolo, nia lingvo havas tre malmultajn parencojn, sed de 1100 jaroj nia kulturo formas parton de la tuteŭropa kulturo. Malfacilaj jarcentoj de nia historio instruis nin, ke la sola vera bazo por la paco estas la interpopola kompreniĝo."

Kio estas la konkreta propono? La ŝtatoj, partoprenantaj en la Konferenco

a) ekzamenu la eblecon por fondi novajn universitatajn kaj altlernejajn lektorejojn, kie oni instruu la malpli disvastiĝintajn lingvojn;

b) pliigu kaj evoluigu la somerajn universitatajn kursojn kaj junularajn tendarojn, kiuj helpas la ekkonon de tiuj lingvoj;

c) akcelu la instruadon kaj pluedukadon de tradukistoj kaj arttradukistoj, en intereso de plejeble altnivela tradukado de tiulingvaj verkoj;

d) akcelu la organizon de konferencoj, kun partopreno de eldonejaj fakuloj, literaturistoj kaj arttradukistoj, pri la traduko, eldono kaj komuna publikigo de tiulingvaj verkoj;

e) alvoku la registarajn organojn kaj fondaĵojn de la partoprenantaj ŝtatoj, ke ili estigu financajn fondaĵojn por plifaciligi la eldonadon de verkoj en malpli disvastiĝintaj lingvoj, aŭ per aliaj iloj instigu la tiucelan agadon de eldonejoj.

La realigo de tiu hungara propono estas intereso de ĉiu malgranda Eŭropa popolo. Tion demonstris la diskuto en decembro, kiam reprezentantoj de 18 landoj — la socialismaj ŝtatoj, krome Aŭstrio, Belgio, Irlando, Danio, ktp. — aprobis la proponon. Komisiitoj de kelkaj ŝtatoj povis deklari ankaŭ tion, ke iliaj parlamentoj jam voĉdonis certajn sumojn por la supraj celoj. Rilate Hungarion, signifa paŝo estas la baldaŭa fondo de universitata katedro pri pola lingvo kaj literaturo, en la Filologia Fakultato de la Budapeŝta Universitato, Eötvös Loránd.

Sed ne nur la koncernitaj popoloj havas la taskon agi laŭ la hungara propono. La malgrandaj nacioj reciproke ekkonu la historion, literaturon, kulturajn kaj spiritajn valorojn unu de la alia — tio estas unu flanko de la solvindaĵoj. La alia flanko: ankaŭ la »grandaj« popoloj, kiuj parolas pli disvastiĝintajn kaj pli studatajn lingvojn, pli atente observu la intelektajn produktojn de siaj malgrandaj fratoj, kaj pli konscience agadu por ties disvastigo, publikigo. Sekvinda ekzemplo estas ĉefe tiu de Sovetio, kie la amasa eldonado de hungaraj, polaj, bulgaraj, estonaj, latvaj, kirgizaj verkoj estas ĉiutaga praktiko. Sed ankaŭ Usono kaj kelkaj okcident-Eŭropaj landoj iras similan vojon.

Ĝis nun ni ne parolis pri lingvo, kies statuso estas speciala kaj duobla: nome, Esperanto. Estas interesa paralelo, ke ĝuste la sama spirito de la nuntempa humanisma propono naskis — antaŭ 90 jaroj — la internacian lingvon, kies adeptoj dum jardekoj batalis por la emancipigo de ĉiuj popoloj, de ĉiuj lingvoj. Tial ni povas diri, ke Zamenhof kaj liaj disĉiploj tre moderne antaŭis tiun neeviteblaĵon, kiun signifas la hungara propono. En la Esperantlingva tradukita literaturo ĉiuj popoloj, ĉiuj lingvoj estas egalaj, gravas nur la vera valoro de iu verko, sen ia ajn diskriminado. Esperantistoj povas ekkoni en traduko tiujn verkojn, kiuj ne legeblas en sia nacia lingvo. Por esperantistoj, la hungara propono estas jam 90-jara praktiko.

Tio estas unu el la roloj de Esperanto. La alia flanko de la duoblaĵo: ĝi ankaŭ estas malpli disvastiĝinta, malpli konata, studata lingvo, kiu tamen disponas jam pri originalaj, universalaj kulturaj valoroj. La tasko de esperantistoj estus sciigi pri tio la koncernitajn ŝtatojn, kiuj ekde nun — espereble — pli intense helpos la aferon de la malpli disvastiĝintaj lingvoj. Kvankam la misio de Esperanto estas kvalite diferenca, ĝi apartenas ankoraŭ al tiuj lingvoj.

VHZS

**Ĉu ĝi entute* jam »venkis«? (Red.)

PAĜO DE LA BELORUSA POEZIO

Belorusio estas unu el la dek kvin socialismaj respublikoj de Sovetio. Ĝia teritorio ampleksas pli ol ducent mil kvadratajn kilometrojn, kaj havas preskaŭ 10 milionojn da loĝantoj. Tamen, ĝi estas malmulte konata en la mondo: oni ne scias, ke ĝia kulturo havas tute apartan fizionomion. Per la subaj specimenoj el la nuntempa belorusa poezio ni volas atentigi pri la kulturaj atingaĵoj de tiu ĉi popolo.

Nikolo Ĥvedarovič

* * *

Korsaluton al vi, Balta maro!
Vian akvon lazuran mi gloras,
kie frua ĉielo aŭroras
kaj rebrilas radia stelaro.
Korsaluton al vi, Balta maro!

Sur la bordon obstina ondaro
sen ripozo alkuras, forkuras,
ĝin frapadas kolere, murmuras
kaj ŝaŭmas renkonte kun baro.
Korsaluton al vi, Balta maro!

Balancetis vi, noktan lulilon.
kaj kolektis arĝentan lunbrilon.
Kvietiĝu, kun ŝaŭmo ne ŝprucu,
estu bona, proksima najbaro.
Korsaluton al vi, Blanka maro!

Nova tago okulojn blindigas
kaj mallumon de l' nokto forigas.
Nur ĉe l' bordo konkuras kaj bolas
atakanta senlaca ondaro.
Korsaluton al vi, Balta maro!

Kolerema vestaĵo de l' maro,
malkvieta, eterne ondanta.
Min ekravis laboro giganta,
kiun faras senfina akvaro
kaj la ŝtormoj en vi, Balta maro.

Tradukis: Petro *Ĉelauskas*

Pjatruso Brouka

Eraro

Dum mia juneco mi ĉiuvespere
por intervidiĝo rapidis prospere.
Revenis tagiĝe mi kaj pentofaris,
pensante: „Ripete mi certe eraris."
Ripozis mi iom kaj gajis sen ĝeno
ĉe iu amika vespero-festeno
Mi dancis frotante la plandojn sen ŝparo
kaj poste mi pentis: „Denove eraro!"
„Ho, kia eraro!"
Sed ofte l' estinton mi nun rememoras
nun, kiam la kap' kaj tempi' neĝkoloras;
sopiras mi triste kaj pensas trankvile:
„Mi volus denove erari simile!"

Tradukis: Klara *Rabinovič*

Alesjo Baĉyla

Nefinita kanto

Arbara padeto kaj dom' transrivera,
matenaj nebuloj, floranta juni' . . .
Neniam vi fremdis, Patrujo tenera,
neniam malĝojon alportis al mi.

Ekzistas ja landoj kun palma susuro,
kun ondoj frapantaj al borda marmor',
kaj kie en foro ĉiela lazuro
kuniĝas kun mar', kiel vi kun la kor'.

Sed mi ne bezonas fremdlandon ĉemaran, —
ekamis mi forte, estante infan',
lazuran ĉielon kaj verdan kamparon,
arbaron kaj oron de l' spikocean'.

Miraĵoj, mi scias, ne mankas sur tero,
sed kial en sonĝoj alvenas al mi
nur pado arbara kaj dom' trans rivero,
matenaj nebuloj, floranta juni'? . . .

Foraĵoj kaj land' nekonata invitas,
sed kiom ajn logus min vasta la mond' —
vi restos, Patrujo, la kant' nefinita
por ĉiam.
Sed kial? Ne estas respond' . . .

Tradukis: Petro *Ĉelauskas*

Miĥas Harnak

Kvinminuta kunveno de vesper' ĝis mateno

Diras en ofickunveno
mia ĉefo Valenteno:
— Povas nur laboro ŝpara
helpi al la plan' kvinjara.
Do, memoru la koleg'
rublon naskas la kopek'!
Ni komprenu temp-valoron
ja minutoj kreas horon!
Por admon' pri ŝpar' minuta
langis li dum ... horo tuta.

Tradukis: Romano *Grinŝpan*

Jurasjo Svirka

Se nur ne tiu fora majo

Memora kvardek-kvina jar',
majtagoj — ĝojaj kaj doloraj.
Salutoj tondris, al stelar'
raketoj flugis multkoloraj.

La firmamento super ter'
ekfloris kvazaŭ en fabelo.
Kanonoj en ĉi fest-vesper'
senkugle pafis al ĉielo.

Kaj floris kronoj ĝis aŭror' —
ne estingiĝis la raketoj ...
Fiksiĝis tia en memor'
la maj' kun tagoj neripe'aj.

Se tiu majo kun salut'
ne estus reveninta tiam, —
nur malfeliĉo kaj servut'
inundus tutan landon nian.

Por ni ne estus primaver'
kun birdaj kantoj,
sunradioj,
ni aŭdus ĝemon de la ter'
kaj ploron de patrinoj niaj.

Subprema fort' kondamnus nin
al sklava vivo
sur genuoj,
ke ni la lingvon de l'patrin'
forgesu jam de jaroj fruaj.

Sen tiu fora majo, nun
ne povus ni antaŭeniri,
nek flagojn levi al la sun'.
Nek majon ĝui, plene spiri.

Tradukis: Petro *Ĉelauskas*

Dezső Kosztolányi

Paulina

Sur la monteto Aventinus troviĝis drinkejeto. Maristoj vizitadis ĝin ĉiunokte kaj trinkadis ruĝan vinon.

Paulina, la eta malpura kuira servistineto portadis senhalte la pladojn. Ŝi havis ruĝajn harojn kaj bluajn okulojn.

Foje, kiam ŝi preteriris iun tablon surplade kun la rostita fiŝo, ŝipĉarpentisto el Kapadocio timigite kaptis al sia tuniko kaj saltleviĝis.

— Kie estas mia mono? Mi estas priŝtelita. Ŝtelisto — li kriis — ŝtelisto!

Ekestis konfuzo. Dume la ŝtelisto — iu ŝipano — pafis sin for.

— Estis ŝi — diris plüraj kaj ĉirkaŭis Paulinan.

Pro la bruo du urbaj soldatoj enkuris el la strato kun tintantaj glavoj: la nokta patrolo.

Ili ekkaptis la sklavknabinon:

— Redonu la monon!

— Ĝi ne estas ĉe mi.

— Tiam vi venos kun ni, etulino.

— Ne — ŝrikis Paulina — ne. Mi estas senkulpa — kaj ŝi ne moviĝis.

— Ek! — ordonis unu el la soldatoj, la malalta kaj straba, kaj li ekpuŝis la knabinon tiel, ke ŝi elŝanceliĝis sur la straton.

Tie ŝi denove nur staris, kiel paliso.

Nun la alia soldato — la pli alta — tuŝis ŝian brakon.

— Ne tuŝu min — kriegis la knabino. — Lasu min, ĉar mi mordos vin. La soldato ridis.

Sed kiam li kaptis ŝian brakon por puŝi ŝin antaŭen, la knabino saltis sur lin kiel sovaĝa katino kaj ungovundis lian nazon. La soldato sangis.

Nun faris provon la strabulo. Paulina abrupte turnis sin kontraŭ li. Ŝi kraĉis sur lian vizaĝon.

— Porkoj — ŝi ŝrikadis, ŝiaj ruĝaj haroj displektiĝis kaj ŝiaj bluaj okuloj ardis —, porkoj! Homoj, helpu min. Homoj, mi laboras dum la tuta tago, mi estas malriĉa, mi estas senkulpa, mi juras per la tombo de mia patrino, per la tombo de mia karega patrino, mi estas senkulpa. Homoj, homoj.

La homoj, kiuj promenadis en la trankvila somera nokto, mire rigardis la du soldulojn. Ili interbatalis kun la knabino, batis kaj frapis ŝin pugne kaj glave. Tamen ili ne povis obeigi ŝin.

Poste ĉirkaŭprene ili levis kaj tiel portis ŝin.

— Bestaĉoj — ŝi kriegis, baraktante per la piedoj — bestaĉoj. Mortigu min. Murdu min. Sed tamen mi elkrias, ke tiu ĉi aĉulo, tiu ĉi strabulo antaŭ nelonge volis brakumi min perforte. Kanailoj, kanailoj. Vi ĉiuj estas kanajloj. Ankaŭ via mastro Cezaro estas kanajlo. Ankaŭ Cezaro estas kanajlo. Jupitero — ŝi gestadis permane kontraŭ la malplena ĉielo.

Pro la terura kriegado, kiu ne mallaŭtiĝis sur la stratoj de Romo, la homoj vekiĝis. Vestitaj en dormkaftano, en pantofloj, ili paŝrampis antaŭ la pordegoin kaj aŭskultis tiun ĉi sovaĝan kriegon, la voĉon, la fortan voĉon, kiu pasis de strato sur straton kune kun la sklavknabino. Super la Koloseo ŝvebis flava plenluno.

Alveninte antaŭ la vilaon de Mutius Argentinus, stoika saĝulo, la knabino ĉiam ankoraŭ sakris, furiozis. Ŝia voĉo ne raŭkiĝis, ŝi kriaĉis plu en la nokto.

La saĝulo babiladis en ĉi tiuj malfruaj horoj kun la poeto Rufus ĉe la fontano de la atrio.

Ambaŭ stariĝis de sur la marmorbenko kaj gape rigardis, ĝis la soldatoj forportis la veadantan knabinon. Sed ŝian voĉon ili aŭdis ankoraŭ longtempe en la mallumaj stratetoj.

— Kial ŝi krias? — demandis la saĝulo. — Kion ŝi volas?

— Juston — respondis la poeto.

— Ridinde — rimarkis la saĝulo. Ĉia ekscitiĝo estas ridinda.

— Ĉia ekscitiĝo estas majesta — ekvoĉis la poeto. — Kiel majesta estis tiu ĉi knabino, kiel potenca. Kiu koleras, estas tia, kiu pravas, tiu estas potenca. Veršajne ankaŭ tiu ĉi knabino pravas.

— Kial vi pensas?

— Ĉar ŝi tiel koleris.

— Kion ŝi trafos per tio? — demandis meditante la saĝulo. — En la gardistejo ŝi estos tradrašita ĝissange. Aŭ ŝi eĉ ne alvenos tien. Ŝi estos ĵetita en la Tiberon.

— Tio ne gravas — diris la poeto. — La vero iris surstrate kaj kriegis. Kaj ni ekaŭdis ĝian voĉon. Ni timvekiĝis en niaj litoj kaj ni ne povas dormi plu, ni ne povas daŭrigi nian antaŭan diskuton. Ni pensadas pri ĝi. Pri la vero. Vidu, eĉ nun ankoraŭ ni parolas pri tio. Kaj tio ankaŭ estas io.

Tradukis d-ro István *Nagy*

Endre Tóth:

La murdita juglandarbo

La maljunulino revenis en la kuirejon, kaj rakontis plu:

„...,kaj kial staras tiu skatolforma domo najbare, trans la barilo, en la mezo de tiu funebreca ĝardeno ankaŭ tio havas sian historion.

Tie staris iam la bela dometo kaj la ĝardeno de Bora Sabo, kiu estis la vidvino de Steĉjo Truo. La bela blanka domo havis verdajn fenestrojn kaj ruĝan deklivan tegmenton, ĝi estis senmanka kaj iom fiereta, simila al la ceteraj, en ĉi tiu strateto. Antaŭe ĝi havis florĝardeneton, la koridoro kaj la verando estis kovrita per vivanta foliaro, kaj malantaŭ la dometo kuŝis fekunda legomĝardeno, kun multaj prunujoj, kaj kun unika grandega juglandarbo, do, la dometo estis ĉirkaŭata de vivanta verda vivo. Kaj nun ĉia vivo estas mortinta, kaj la flava domo nude, malvarme tremas en la dolorplena ĝardeno. Ĉar nek volo, nek povo rekreas tion, kio jam pasis, kaj la futuro...

Kiam Aleĉjo, la filo de Bora hejmenvenis — li, studinte arkitekturon, fariĝis inĝeniero, jam bone riĉiĝis en la ĉefurbo, havis belan sumon en la banko, kaj havis aŭtomobilon, kiam li proponis sin ĉi tien por distrikta ofico — nu, kiam li alvenis hejmen, li aĉetis la heredpartojn de la frataro, tiel, ke la tuta bieno, la domo, kaj la ĝardeno de Bora Sabo post tiu tempo estis lia ekskluziva posedaĵo. Nu, nature, laŭjure ĉio restis havaĵo de Bora, sed la aliaj heredantoj povis nenion postuli el la heredaĵo.

Aleĉjo havis bonan salajron ĉe la distrikto, kaj ankaŭ lia edzino Manjo, ĉar ŝi estis kuracistino. Sed ne tiaspeca kuracistino, al kiu oni iras plendi pro dorsdoloro, aŭ pro similaĵoj, ĉar ŝi estis distrikta higienistino. Ŝia profesio estas, ke ŝi eniras en la buĉejon, kaj diras, ke la kanalo estas nekonvena, kaj ke ĝis morgaŭ oni bonigu ĉion, alie la tuta buĉejo estos fermita. Kaj ŝia profesio estas, ke ŝi diras, ke la putoj havas malbonan akvon. Sed ja, ĝis nun ĝi estis bona?... Nu, tia virino estas Manjo, iom fierema, sed cetere ne malbonulino.

Nu, ili ambaŭ havis bonan salajron, kaj krom tio, kiel oni diras, Manjo kunportis belan doteton en la nupton, kaj tiamaniere, ke ili ne estis malriĉaj, ili decidis konstrui belan novan domon, tamen ne antaŭe, laŭ la trotuaro, kiel staras la ceteraj, sed malantaŭe, en la loko de la ĝistiama legomĝardeno, kaj ĉi tie antaŭe ili plantos arbustojn, kaj grandan florbedon, kaj pinojn, kaj ĉion.

Diris tiam Bora Sabo: — Miaj karaj, kial vi ne atendas, ĝis vi min subterigos apud mian Steĉjon? — ĉar ŝi amis ege sian edzon.

Sed ili ne, ĉar ili volas novan neston — vi vidos, panjo, kiel bone vi fartos en ĝi.

Kaj Bora ne kontraŭdiris, ŝi estis ĉiam virino vortŝparema, ŝi diris nur iafoje, kaj nur al mi: — Ili diras, ke mi bone fartos en tiu domo. Sed ja, kie mi jam fartos bone? Ekstere, apud mia Steĉjo, tie, jes, tie mi fartus bone. — Ŝi estis ege malesperiĝinta.

Kaj la gejunuloj komencis. Venis multe da homoj, multe da maŝinoj, ili detruis la pordegon kaj la barilon, la maŝinoj zumadis ĉi tie de mateno ĝis vespero. Post du tagoj fariĝis tiel granda fosaĵo, ke ĝi povus gluti la tutan malnovan loĝejon de Bora.

Aleĉjo rakontis al ĉiuj, kia estos la nova domo. Li faris pri ĝi belan desegnon sur papero. Nu jes, la desegno estis belega, sed la domo, kiun la desegno montris, estis iom kripla, ĉar ĝi malhavis ruĝan deklivan tegmenton. Ĝi havis platan suprajon.

— Supra teraso — diris Aleĉjo — tio estas la moderna modo.

— Supra teraso, supra teraso — diris Bora iom honte — tiom da fanfaronado en ĉi tiu simpla strateto. La tieanoj ja estas modestuloj.

Nu, bone. Oni komencis alporti brikaron, trabaron, ĉion, la maŝinoj bruegis senĉese, kaj la domo kreskis el la fosaĵo, kiel la fungoj post pluvego. Sed la multaj homoj fervorantaj malĝentile puŝadis Boran dekstren-maldekstren. Okazis ankaŭ, ke oni diris al ŝi: — Iru do flanken, onjo! Ĉu vi ne vidas, ke vi estas maloportuna ĉi tie? — Kvazaŭ ŝi estus fremdulino, kiu nur malhelpas ilin, kvankam tiam ankoraŭ ĉio estis ŝia posedaĵo laŭjure.

Diris tiam Bora, alparolante Aleĉjon: — Dolĉa mia filo, ne disipu tiom da mono, ne alportigu manĝaĵon por tiuj ĉi el la gastejo. Mi kuiros por ili.

Sed ŝi volis tion, ne kvazaŭ ŝi dezirus la multan laboron, sed nur ke ŝi montru, ke ŝi, la malforta maljunulino, ankoraŭ povas utili al ili.

Ho, kompatinda Bora!

Nu vere, ŝi akiris respekton, bonegajn supojn, rostaĵojn kaj aliajn manĝaĵojn ŝi sciis fari, multfoje oni venigis ŝin kiel mastrinon al abundaj edziĝfestenoj, sed ŝi senĉese faris la multajn bongustajn aĵojn, de mateno ĝis vespero, tamen ŝi mem manĝis apenaŭ.

— Mi deziras nenion, mia kara — ŝi diris iafoje, alveninta min viziti —, mi nur trinkas iom da kafo, por ke mi ne malsaniĝu. Sufiĉas jam tio por mi.

Tiam ŝi jam maldikiĝis, pli kaj pli, kaj ŝian voĉon oni povis aŭdi eĉ malpli ofte ol antaŭe, kvankam tiu Bora ĉiam estis parolŝparema. Nu, kaj ne pasis pli ol du monatoj, ĉar la laboro komenciĝis en marto, kaj ne estis ankoraŭ junio, kiam la domo jam staris. Nu jes, la muroj. Tiam diris Aleĉjo: — Panjo kara, ni aranĝos unu el la ĉambroj en la nova domo por ni tri, por vi, por Manjo kaj por mi mem, kaj ni enloĝiĝos, ĉar ĉi tie ekstere tiu maliunaĉa kabano estas jam malhelpo por la ŝarĝveturiloj. Estas jam necese detrui ĝin.

Bora diris nenion, sed ŝi fariĝis ege trista, ĉar en la malnova domo ŝi pasigis longan tempon, pace vivante kun sia edzo, Steĉjo.

Sed kiel malŝparema estas la nuntempa junularo, tio estas terura! Ili disigis la murojn ne tiamaniere, kiel decas, zorge konservante la uzeblajn aĵojn, sed iun tagon venis homoj el la minejo, eniris en la malnovan domon, iomete manipulis en ĝi, poste ili sciigis la najbarojn, ke neniu timiĝu, ĉar sekvos eksplodo. Ili alvenis matene, kaj ne estis ankoraŭ tagmezo, kiam: bum! Kaj la malnova domo ekkaŭris, ĝi estis ruiniĝinta kiel la granda gastejo en la milito, kiam trafis ĝin bombo.

Bora tiam ploris, ploregis, kvazaŭ ŝi freneziĝus. Kaj ŝia bofilino, la kuracistino, kondukis ŝin en hospitalon, kaj diris al ŝi:

— Ne timu, bonanjo, vi resaniĝos rapide, kaj kiam vi heimenvenos, vi eniros en la novan domon, inter la belaĵoin, en la komforton, kaj vi havos nenian devon, krom vin distri per la televido.

Kvazaŭ Bora interesiĝus pri la televido. Ŝi ne tre ŝatis eĉ la radion. Ŝi aŭskultis ankaŭ tion, nur se oni bele kantis en ĝi, aŭ se aŭdiĝis sciigo, ke la vagonaro distranĉis iun, aŭ oni sufokis iun, aŭ similajn novaĵoin. Nu, vere, estis pli bone al Bora kviete kuŝiĝi en la hospitalo, kaj ne vidi, kiamaniere oni portas la ruinojn de la malnova domo al la vilaĝfino, kie la marĉo estis sekigota.

Kiam Bora revenis heimen, malaperis eĉ la postsignoj de la malnova domo. La ĝardeno dezertiĝis jam pli frue, la prunujoj estis jam antaŭlonge fortranĉitaj, nu, pro ili nenia domaĝo. Ili donis tiel aĉajn prunojn, kiuj estis taŭgaj nur por fari ventrodoloron. Nur la grandega juglandarbo restis staranta malantaŭ la nova domo.

Bora diris tiam al Aleĉio per voĉo ege tremanta, ĉar ŝi iom invalidiĝis, malgraŭ la kuracado: — Mi jam

ne ĉagreniĝas, mia karulo. Sed mi dezirus almenaŭ, ke la nova domo estu bele blanka, kaj la fenestroj verdaj.

Aleĉjo ridis: — Blanka kaj verda? Tute ne, mia panjo. Prefere tia, kia mi jam desegnis ĝin sur papero. La muroj estos flavaj kaj la fenestroj krudbrunaj. Tia estas la moderna modo.

Bora respondis nenion. Ŝi kuiris plu por la laboristoj, kiuj jam estis malpli multaj ol antaŭe, kaj ili faris malpli da bruo, nur el la interno de la domo aŭdiĝis martelado kaj segado. Kiam venis julio, la tuta laboro finiĝis, la domo estis preta. Ĝi estis bela, ne eblas nei tion, sed iom nekompleta pro la plata suprajo. Ankaŭ interne brilis ĉio. Foje tagmeze, kiam la gejunuloj forestis, venigis min Bora. Mi vidis ĉion, ĉio havis viglan koloron, sed la muroj elspiris strangan odoron, kian mi flaris ĝis tiam nur en hospitalo. Mi diris al Bora: — Vere, ĉio estas bela ĉi tie. Nur la odoro ne plaĉas al mi.

Bora diris, ke tio estas pro la farboj, ĉar ankaŭ ili estas modernaj.

Nu, tute egale. Sed tiu hospitalodoro kaŭzis al mi malbonan antaŭsenton.

Poste oni liveris en la domon meblaron, belan, modernan, kaj instalaĵon de kuirejo, kiu estis senmakula, kiel tiu de la apoteko. Ankaŭ Bora Sabo fartis tiam pli bone, ol antaŭnelonge. Plaĉis al ŝi ĉio, sed ŝi nur promenadis en la grandega loĝejo tien kaj reen, ŝi povis fari menion. Volonte ŝi kuirus, sed la forno funkciis per gaso, kiun ekbruliginte la flamo eksplodetas, kaj tion Bora ne ŝatis. Ŝi nek povis purigi per maŝinoj, nek lavi per maŝino. Cetere la lavmaŝino estas senutila aĵo, ĉar ĝi nur kirladas la akvon, ĝi ne knedas la tolaĵon. Do, novante fari nenion, ŝi multfoje venis viziti min. Ŝi sidadis sur la benko en la kuirejo, helpis al mi senŝeligi terpomoin, ŝi estis ĉiam silentema. Nur jenon ŝi diradis foje-foje al mi: — Toleru min, mia kara. Prefere mi sidas ĉe vi sur la benko, ĉar tia simpla maljunulino, kiel mi, fartas nebone en rafinitaj foteloj, kiaj estas tie.

Ŝi ne diris „hejme", ŝi diris: „tie".

Ŝi trarigardis super la barilo, kaj balancadis la kapon, ĉar la vidaĵo, la dezertigita ĝardeno, estis ege dolora por ŝi. Sed tiam ŝi jam nenion kuraĝis diri al Aleĉjo.

Iun tagon denove homoj venas, kaj ni vidas, trarigardante super la barilo, ke ili kunportis hakilon kaj segilon, kaj esploradas ĉirkaŭ la maljuna junglandarbo. Verŝajne ili volas dehaki la arbon. Tion jam Bora ne povis toleri. Ŝi trarapidis, kaj komencis tute ne mallaŭte disputi kun ili.

Ili diris, ke Alekso sendis ilin, por dehaki tiun arbon.

Bora diris, ke de kiu ajn ili estas senditaj, ĉi tie ŝi estas la mastrino laŭjura, ĉi tie ĉio estas ŝia posedaĵo, iu ajn povas tion kontroli ĉe la distrikta oficejo, kaj ŝi ne lasas tiun arbon.

La homoj foriris pro la granda kverelo, kaj Bora revenis al mi, sed ŝi estis nekonsolebla. Ŝi jam sciis, ke ĉio estas vana, se Aleĉjo volas, la arbo devas morti.

Ho ve, kiel bona arbo ĝi estis! Kiel multaj sakoj da nuksoj kreskis sur ĝi! Paverŝelaj nuksoj. Nu, certe, la arbo jam maljuniĝis iom, ĝi jam donis malpli multe da nuksoj, tamen ĝi estas bona, belega arbo.

Kaj jam eblas scii, vanis la kverelo, la sekvantan tagon oni dehakis la arbon, ĉar ĝia loko estis bezonata. Aleĉio volis alkonstrui vintran ĝardenon al la nova domo.

Tiam ankoraŭ Bora diris iafoje, miaj karaj gefiloj, kial estis tiel urĝe mortigi la belan juglandarbon? Vi povus atendi almenaŭ ĝis vi subterigos min apud mian karan Steĉjon. Sed neniu ŝin atentis, ĉar la vintra ĝardeno estis vere urĝa problemo. Aleĉjo neatendite sukcesis akiri trabaron, kaj aliajn materialojn malmultekostajn; laŭ onidiro, ĉirkaŭ la afero flirtas ia falsaĵo; nu, Aleĉjo rapidis fini la malordon, kiun la multa konstrulaboro kaŭzis.

Denove homoj venis, kavigis la, freŝajn murojn, kiuj ankoraŭ eĉ ne sekiĝis, kaj la vintra ĝardeno post nelonge estis preta.

Vere, ĝi estis ege bela. Foje Bora venigis min, por ke mi ĝin rigardu. Mi vidis ĉion, ĉirkaŭe grandegajn vitrotabulojn, inter ili maldikajn betonajn kolonojn. Palmo kaj filodendro troviĝis ankoraŭ nenie, sed eĉ sen ili ĉio estis belega. Tamen malplaĉe mi ekflaris denove la hospitalan odoron.

Sed ĉu la rapidego kaŭzis eraron, aŭ oni intence faris tiamaniere, jam ne eblas scii, tamen okazis, ke oni ne elterigis la radikojn de la malnova juglandarbo. Guste sur ĝin oni metis la vintran ĝardenon.

Bora diris al mi foje (tiam jam ŝi parolis iom konfuze):

— Doloro turmentas la malfeliĉan teron pro tiu arbostumpo, kiel doloro turmentas la homon, se rompiĝas la dento kaj la radiko restas.

Nu, kompatinda Bora.

Intertempe alvenis la vintro. Aleĉjo diris: — Vi vidos, panjo kara, post nelonge venos la printempo, ni ordigos la ĝardenon, ĉie kreskos floroj, arbustoj, kaj se plaĉos al vi, vi promenados inter ili, aŭ laboretos iom kiel ĝardenistino, vi vidos, ke ĉio estos bonega.

Nu, sed kiam Aleĉjo tion diris, estis ankoraŭ vintro. Kiel li povus antaŭsenti la okazontaĵojn?

La vintro pasis agrable. Ili ne bezonis zorgi eĉ pri la hejtado, ĉar la nova domo havis aŭtomatan centralan hejton, eĉ la garaĝo estis hejtita, sed kial, mi ne scias. Kial tiom da malŝparo? Tiu senanima aŭtomobilo tute ne bezonas la vivigan varmon.

Alvenis la printempo. Foje tagmeze Bora kuras al mi, ektimiĝinte. Kiel ŝi balbute rakontis al mi, la planko de la vintra ĝardeno kaj unu el la vitrotabuloj krevis. Kion tio signifas? Ĉu ne ruiniĝos ĉio? Ĉu ni ne devus kuri al Aleĉjo en la oficejon sciigi lin?

Mi diris trankviligante ŝin, ke ĝis vespero espereble okazos nenio. Ne estas necese vane maltrankviliĝi Aleĉjon, tamen ŝi ne reiru hejmen, ŝi restu ĉe mi ĝis vespero.

Kiam vespere Aleĉjo revenis el la oficejo, li cirkaŭrigardis kaj blasfemis, superŝutis la sanktulojn per fulmotondraj riproĉoj.

Okazis, ke pro la proksimeco de la printempo la arbostumpo reviviĝis. La arbostumpo, kiu restis sub la vintra ĝardeno. Ĉu ĝi volis kreski, aŭ ĝuste kontraŭe malleviĝi, kiu povas diveni? Nu, oni devis tuj malkonstrui la tutan vintran ĝardenon, sed eĉ tio ne sufiĉis. Estis ankoraŭ necese elfosadi la radikojn de la maljuna juglandarbo, kaj la radikoj estis tiel grandegaj, ke ili etendiĝis profunde sub la novan domon, kaj pro ili oni devis eĉ tuŝi la tutan fundamenton.

Nu, denove venis multe da homoj kaj multe da maŝinoj, kaj nova laboro komenciĝis por savi la saveblan.

Kaj tiam okazis, ke la kompatinda Bora ne povis toleri plu. Iun tagon ŝin kaptis malsano, kaj vane ŝi havis kuracistan bofilinon, la trian tagon ŝi jam kuŝis sur katafalko.

Venis multaj sortobatoj, perdiĝis la multega mono, perdiĝis la aŭtomobilo, Aleĉjo devis ĝin vendi, ĉar liaj ŝuldoj amasiĝis, la ĝardeno restis senflora, senarbusta, mortigita. Forfalis ĉia espero. Scias nur la Ĉiopova, kio sekvos ankoraŭ? Nur la malfeliĉa Bora atingis, kion ŝi volis ĉiam. Ŝi estas apud sia kara Steĉjo.

Nu, tia estas ja la vivo. Kion la gejunuloj faras, tion ne eblas fari. Ĉar se ili ekzekutis tiun maljunan juglandarbon, ili devus mortigi tuj ankaŭ la radikojn. Ĉar simple surkonstrui ĝin — tio ne eblas.

Ne eblas invalidigi la maljunan aĵon, kaj simple sursidi ĝin. Tio ne eblas.

Ne. Certe."

Migranto en la dudeka jarcento



Ödön Jakabos ĉe la tombo de Sándor Kőrösi Csoma en Darjeeling, Orienta Hindujo

Ho, kion mi diru, ankoraŭ mi ne povas kredi, kion mi travivis dum mia naŭmonata vojaĝo ĝis Suda Hindujo — konfesis al mi la jam fama vojaĝanto el Sikullando* — Ödön *Jakabos.*

Kvankam ni estas amikoj, ja kune ni komencis lerni Esperanton en Kézdivásárhely de s-ino M. *Vitályos,* malfacile ni trovis eblecon por paroli pli detale pri liaj vojaĝimpresoj. Nun, kiam li ankoraŭ ne estas 40-jara, li estas pli laca fizike, pli malsaneca ol antaŭ kvar jaroj. Li jam estas pensiulo pro malsano, sed ankaŭ nun preta por nova migrado. Kiam aperas tiuj ĉi linioj, li denove estas sur la vojoj de Eŭropo. Puŝas lin antaŭen la deziro por vidi ankoraŭ nekonatajn lokojn, homojn, morojn, trovi novajn amikojn, esperantistojn kaj neesperantistojn en ĉiuj landoj.

Perpiede li jam trairis tutan Rumanion, per biciklo traveturis Eŭropon, per kamelo kaj elefanto Hindujon, sed la plej certa transportilo estas por li la „piedbuso".

Sed, kial li iras uzante la pasintjarcentajn vojaĝeblecojn nun en la atomepoko?

Ĉar, antaŭ 150 jaroj, lia sampatrujano Sándor Kőrösi Csoma** ne havis aliajn transportilojn. Kaj la deziro de Ödön Jakabos estis iri laŭ la vojaĝeblecoj de Csoma, sekvi la postsignojn de nia mondfama scienculo.

Jam de infaneco la nomo de Sándor Kőrösi Csoma estis konata de nia vojaĝanto. Famajn verkistojn kaj poetojn inspiris la personeco de la modesta, malriĉa sed admirinda esploristo. Ankaŭ en la animo de ĉiuj *sikuloj* lia nomo trovas ĉiam eĥon. Post jaroj Ödön Jakabos komencis studi pli profunde la vivon kaj verkaron de Csoma, pri la Aziaj popoloj kaj la budaismon.

Dum kvin jaroj serioze li preparis sin anime kaj korpe por la longa vojaĝo al Hindujo. Li komencis korespondi kun scienculoj kaj kun simplaj homoj, ĉefe kun esperantistoj, kiuj helpis lin per utilaj konsiloj.

Sciante pri la epidemioj en la landoj kiujn li devas trapasi, la senmoneco kaj mizero ne malhelpis lin en la realigado de sia celo.

Ĝis Bagdado Ödön Jakabos sekvis la vojon de Csoma. Tie li renkontis s-ron *Husen al-Amili,* kiu helpis lin ne nur per saĝaj konsiloj. De ĉi tie li devis ŝanĝi sian planon pro la veterkondiĉoj, sed dum sia hejmenveno, de Lahoro, Afganistano, Persio, Turkujo kaj Balkano, Jakabos fidele sekvis la vojon de Csoma.

En Hindujo la Azia Societo disponigis al Jakabos ĉiujn dokumentojn kiuj rilatas la scienculon — por studado.

La fina kaj ĉefa celo de lia vojaĝo estis *Darjeeling,* la urbo, kie mortis Sándor Kőrösi Csoma en 1852. Jakabos restis tie tri tagojn kaj disĵetis sur la tombon la teron kunportitan en sia dorsosako el la naskiĝloko de Csoma.

Li aranĝis la tombon, metis florkronon kaj prenis hindan teron, kio kovras la tombolokon de nia granda scienculo, por hejmenporti ĝin kaj meti en la lokon de kie li forprenis la alian.

Li travojaĝis plurfoje Hindujon. Gastigis lin L. *Sinha,* Henry *Josefer',* P. *Daŝgupto* kaj multaj aliaj. Multe li vidis, sed ne sufiĉe. Ĉiam li miras, kiam la turistoj parolas kiel fakuloj pri siaj travivaĵoj, pri iu lando aŭ popolo, kvankvam ili estis en tiu lando nur dum kelkaj tagoj.

Fine, konfesis Ödön Jakabos — »mi plenumis mian honordevon. Multaj dubis, ĉu mi sukcesos fari tiun vojaĝon en tiuj cirkonstancoj. Mi preĝis foje — se estis necese kun mahometanoj, kristanoj aŭ budaistoj. Tiel mi vivis, kiel ili, sama estis ankaŭ mia nutraĵo. Per robo aŭ en ĉifono mi vestiĝis se estis necese. Mi neniam sentis min sola dum mia vojaĝo. Mi sentis, ke inter la esperantistaro kaj inter la bonvolemaj homoj ĉiam kaj ĉie mi estas hejme. Mi sciis, ke ankaŭ mia malgranda popolo — la sikuloj — kies filo mi estas, en sia animo estis apud mi«.

Post la reveno hejmen, perpiede li iris de Kézdivásárhely ĝis Csomakőrös. Multaj aŭtomobilistoj haltis kaj petis lin enveturiliĝi, ĉar ĉiuj ekkonis lin. Ni, liaj amikoj estis tie preskaŭ ĉiuj kaj ankaŭ la tuta loĝantaro de la vilaĝo, kiuj maltrankvile atentis ĉiujn paŝojn de nia migranto.

Kaj tie en Csomakőrös, la babilema homo ne sukcesis eldiri eĉ unu vorton. Nur li montris la teron kunportitan tra miloj da kilometroj de la tombo de Csoma. Estis longdaŭra silento. Neniu aplaŭdis, neniu parolis. Larmoj aperis en liaj okuloj.

Dum sia vojaĝo Ödön Jakabos plenskribis pli ol 1500 paĝojn de sia notkajero kaj faris pli ol 1500 fotografaĵojn. Ni atendas senpacience la aperigon de liaj vojaĝimpresoj.

Jenő *Zágoni*

---

* *Sikullando:* Regiono en orienta Transilvanio (nun en Rumanio). Sikuloj nomiĝas hungaroj vivantaj tie.

** *Sándor Kőrösi Csoma:* Mondfama hungara lingvisto kaj vojaĝanto (Legu: HV. 1965/1. p. 11—12.)

27a HUNGARLANDA ESPERANTO-KONGRESO
en Budapesto
1978. julio 14-16.

Attila *József* 1905—1937) estas ne nur la plej granda hungara poeto de la dudeka jarcento, sed poezia kreanto signifa ankaŭ en tutmonda rilato. Tiu ĉi poemo estas unu el la plej potencaj verkoj de la frue mortinta poetgiganto.

Attila József

PATRUJO

I.

Mi hejmeniris nokte, lanta
velura bruo ĝuste ekis,
aplaŭdis jasmenar' vojranda,
ventuma mola varmo regis.

Estis anim' ĝangalo granda;
dormantoj sur la strat'. Falegis
sur min la komunum' donanta
konscion, lingvon. Ĝi ja vekis

kaj nutras tiujn por mi, aro,
vivanta kiel gea paro
kun la natur' al sin' vokanta.

En la uzin' ĝi sakras ofte,
meditas eĉ ĉi tie softe,
en nokta grot'; mizer' tutlanda.

2.

Popolmalsan' de ĉiu speco.
la nombr' de l' infanmort' sin levas,
oldiĝo frua, krim', orfeco,
*paranoj', unu **ido ĉefas,***

la suicid', anim-pigreco,
kiu nur la miraklojn revas
malmultas montri je neceso:
la lando liberiĝi devas!

Necesas pri la zorgoj, sorto,
diskuto saĝa en kunveno
de la popolo laborista.

Nun priravitaj de l'perforto
la leĝdonantoj sen ĉagreno
nin lasus al pereo trista!

3.

La bienul' je kies bono
kampuloj portis la furaĝon,
pioĉojn sendas per ordono
frakasi domojn kaj vilaĝon.

Attila József

Gardinton de perea domo,
la viron vidas ni kuraĝan,
kiel la bruto en kordono
elekti deputiton saĝan.

Vibradas plumoj, la ĝendarmaj,
certigas la ridetoj ĉarmaj
rezulton fiksan de voĉdon',

ja de miljar' per si mem lige
kiel la garb', popol' publike
*decidas tie laŭ **ordon'.***

4.

Sinjoroj kontraŭ ni ne pigris
bien-defendi kun rigor',
triduon-miliono migris
en Amerikon, stumblis for

sur ond' kolera, kruroj vibris,
angore, naŭze tremis kor',
kvazaŭ se ili krimon kribris
en vinon kontraŭ rememor'.

Sonoran kelkaj aŭdis vokon,
aliaj sciis: monapogon
atendas vane hejma rond'.

Obstrukcas nin paseo plene,
*kiel **migruloj nun timeme***
atendas ni al nova mond'.

5.

Prolet-salajro ne pli estas
ol akirita per batal':
por pan' sufiĉas, eble restas
iom por drinki, por skandal'.

Nek land' demandas, nek protestas,
kial multiĝas la misfar',
fabrikojn nia ŝtat', protektas
kial ne por la proletar'?

Teksistin' revas pri sukero,
nenion scias pri kartelo,
kaj se ricevas sen monpun'

salajron, ŝin priridas sum'.
Moneroj mokas: „Vi por tio
laboris, do ne por nenio."

6.

Riĉulon la povrul' timegas,
povrulon timas la riĉul',
nin ne esper' trompema regas,
sed ruze tiu ĉi terur'.

Kampulajn rajtojn oni negas,
*dum li, kiel **la garbo-tur'***
flaviĝas pro labor' kaj sekas,
*sed pigra estas por **postul'.***

El la miljara temp-lontano
kun la saketo en la mano
el la amas' popola fil'

lake' fariĝi nun li revas,
eĉ se la patran tombon devas
bastoni pie kun humil'.

7.

Hungar' mi estas en ekzilo
enhejma. Veas el la sin':
„por estu mi fidela filo
via, Patrujo, amu min!"

Al urs' ĉenita plumpa iro
nur licas, sed ne al anim'
poeta, do per la plumŝiro
via juĝist' ne punu ĝin!

Kampulojn donis vi al mar',
homecon donu al homar',
estu madjaro la hungaro

kaj ne la sklav' de germanaro.
Pri bel' kaj bon' en nia land'
pli ĝoje sonu mia kant'.

Tr.: Márton Fejes

Mi havis kaj havas riĉplenan vivon!

Intervjuo kun Frans van Dooren

Li estis aktiva verkisto kaj movadano dum la tridekaj jaroj, aperigis plurajn librojn en Esperanto, sed antaŭ kelka tempo eĉ tiel profunda konanto de nia kulturo, kiel W. *Auld*, informiĝis el la libreto *Nia originala prozo* de *Apolloner*, ke la pseŭdonimo *F. V. Dorno*, kaŝas la flandron *Frans van Dooren*. Fine de la pasinta jaro HEA aperigis du liajn verkojn en unu volumo, unue publikigitajn antaŭ kvardeko da jaroj*. Profitante la tiucelan kontaktiĝon kun la aŭtoro, ni petis lin doni mallongan intervjuon por *Hungara Vivo*.

Sinjoro Van Dooren, la nuntempaj esperantistoj apenaŭ scias ion pri vi. Ĉu vi povus kontentigi la scivolon de la estontaj legantoj de via libro?

Ne tre plaĉas al mi klaĉi pri mi mem, sed mi cedas al via scivolemo. Mi naskiĝis la 15-an de aprilo 1905 en *Mechelen* (Belgio). Mi edziĝis antaŭ 50 jaroj, kaj fariĝis esperantisto en la jaro 1932. Mi laboris tre aktive en la tiutempa movado: mi gvidis kursojn, estis ĉefredaktoro de la siatempe tre konata progresa, laborist-tendenca revuo *Sur Posteno*, kiu malfeliĉe malaperis dum la milito. En la Antverpena regiono mi sukcesis kunlaborigi diverstendencajn Esperanto-grupojn, sur bazo de neŭtrala agado (propagando ktp.), kaj E. K. I. (Esperanto-Komitato Intergrupa) ankoraŭ hodiaŭ ekzistas kaj funkcias, kvankam neniu plu memoras min. *Sic transit gloria mundi!* Tamen, antaŭ kelka tempo la Antverpena grupo „La Verda Stelo" honoris min kiel malnovan membron.

Kiel vi malaperis el Esperantujo?

Vidu, krom la diritaj aktivadoj mi estis ĉefredaktoro de *Flandra Esperantisto* (de 1937), komitatano de kvar-kvin grupoj kaj organizoj. Mia hejmo estis azilo de esperantistaj vaguloj kaj rifuĝintoj el Germanio, Hungario, ktp. Mi devas diri, ke inter ili troviĝis ankaŭ profitemuloj eĉ spionoj... Mia situacio finfine fariĝis netolerebla, kaj fizike, kaj familie, kaj ekonomie. Mi transdonis la torĉon al la pli juna generacio, kaj malriĉega, en la aĝo de 40 jaroj, mi rekomencis studi, akiris diplomojn kaj denove mi povis prizorgi mian familion. Mi finis mian profesian karieron en 1967 kiel ĉefdirektoro de granda internacia firmao, kun verda stelo kaj progresista koro. Mi estas dumviva membro de UEA.

La lerta konstruo de Levu la manojn! vekis la supozon, ke vi estas profesia dramaturgo. Ĉu vi neniam laboris sur tiu kampo?

Fakte ne. Mi komencis mian karieron kiel arkitekto, sed poste altiris min la agrikulturo. Mi fariĝis specialisto pri la nutraĵoj de bestoj. De tiu punkto estis nur unu paŝo ĝis la temo de la psikologio de bestoj. Sed revene al la demando, vere mi okupiĝis pri teatro: meze de la tridekaj jaroj mi starigis viglan teatran grupon, kiu ludis ĉie en Belgio, ankaŭ por neesperantistoj: en malsanulejoj ktp. Tiam mi komencis verki Esperantajn teatraĵojn. Cetere ambaŭ verkoj nun reeldonitaj — *Stultulof* kaj *Levu la manojn!* — estis tradukitaj al la flandra lingvo kaj luditaj de profesiaj aktoroj en granda teatro. (Ĉi *Stultulof* oni faris komedion.) Ĉio ĉi estas grava ne por mi mem, sed por Esperanto: ĝenerale oni tradukas *en* Esperanton, sed malofte *el* Esperanto, ĉu ne?

Ĉu vi havas aliajn verkojn?

Jes, multajn, Poeziaĵojn, mallongajn rakontojn kaj unu teatraĵeton dulingvan: en ĝi Esperanto alternas kun nacia lingvo. Oni povas facile adapti ĝin al kiu ajn nacia lingvo. Ĝia titolo estas *Kia miksaĵo!* Mi verkis ĝin — en la jaro 1938 ĝi aperis — por kongresoj kaj aliaj Esperanto-festoj, sed tiu ĉi teatraĵo estas bone prezentebla ankaŭ al neesperantista publiko. Mi verkis kaj verkas ne nur en Esperanto, sed ankaŭ nacilingve: teatraĵojn, rakontetojn kaj skizojn por radio, detektivajn romanojn (unu estas tradukita en Esperanton). Krome sciencajn artikolojn, studaĵojn, precipe pri la psikologio de la bestoj. Por studi tiun temon, mi travojaĝis la kvin kontinentojn. Pro mia inklino al soleco, mi vojaĝis sola tra multaj fremdaj urboj kaj sovaĝejoj. Mia edzino estis tre komprenema pri tiu mia aventuremo, pro kio mi ŝuldas al ŝi profundan dankon. Intertempe mi notis, skribis, verkis. Envere enviinda vivo, sed ne ĉiam facila, nek agrabla. Tamen, riĉplenan vivon mi havis kaj havas!

Kiuj estas viaj tempopasigaj okupoj, se entute restas por vi libera tempo?

Lingvostudado — tio estas logika sekvo de mia vagemo —, interalie de la anglaj dialektoj, pentrado (iam mi studis arton, kaj la ilustraĵojn, kiuj aperis en la unua eldono de *Stultulof*, mi mem desegnis), kaj admirado de la naturo.

Kian impreson vi havas pri la nuntempaj esperantistoj?

Mi bedaŭras, ke por tro multaj nia internacia lingvo estas nur amuzaĵo, anstataŭ serioza mondafero. Tamen mi persone ne kredas, ke Esperanto faros mondpacon. Mi estas, jes, idealisto, sed ne utopiisto!

Sinjoro Van Dooren, dankon pro la intervjuo.

V. Benczik

---

* *F. V. Dorno: Satiroj. (Aventuroj de L. R. M. Stultulof la X-a — Levu la manojn!), Budapeŝto 1977. 19 cm, 140 p. Prezo 12,— ned. gld.*

F. V. Dorno

LEVU LA MANOJN!

Gaja komedio en tri aktoj

Tria sceno

Profesoro, Boston, Ameli, Beti, Baronino

BOSTON *(eniras. Li estas tipa usona detektivo)* Bonan tagon, mia kara amiko, Psikof.

PROF-O *(kun surprizo)* Vi! Ĉu estas eble? Mia kara amiko Boston! Kia agrabla suprizo vidi vin ĉi tie. Mi certe ne esperis tion. Mi kredis vin en Ĉikago. Ĉu vi do partoprenas la kongreson?

BOSTON En ia senco, jes. Mi deĵoras tie ĉi en speciala misio.

PROF-O *(prezentas cigaron kaj ankaŭ mem prenas novan)* Kion? En speciala misio? Ĉu vi esperas trovi tie ĉi krimulojn, aŭ ĉu oni suspektas la esperantistojn kiel danĝerulojn? *(Sinjorino Psikof kaj Beti eniras.)* Mi prezentas al vi mian edzinon kaj mian filinon, *(Al sia edzino)* Sinjoro Boston, la fama detektivo, fervora samideano kaj malnova amiko mia, kiun mi renkontis dum la Varsovia kongreso.

BOSTON *(salutklinas)* Tre agrable. *(Salutas Beti.)*

AMELI *(sidiĝas)* Ĉu vi vere estas detektivo?

BETI Kia romantika profesio!

AMELI *(al la profesoro)* Maks, ĉu vi ne fumas tro?

PROF-O *(estingas sian cigaron)* Sinjoro Boston ĉeestas la kongreson por aresti krimulon *(Li ridetas.)*

BETI Kiel interese!

AMELI Krimulon?

BOSTON *(maĉas sian cigaron)* Estas la vero. La polico sciiĝis, ke tre danĝera krimulo ĉeestos tiun ĉi kongreson.

BETI Danĝera bandito? Ĉu vere?

AMELI Kiel terure!

PROF-O Bandito?

BOSTON Jes, Bil Ŝvarc.

ČIUJ *(kune, kun surprizego)* Bil Ŝvarc?

BETI La konata banditara ĉefo?

BOSTON Jes.

AMELI La internacia krimulo? *(Stariĝas.)*

BOSTON Jes.

PROF-O Pri kiu oni tiel multe legas en la ĵurnaloj?

BOSTON Jes.

AMELI *(kun timego)* Kiel terure!

BETI *(arde)* Kiel interese!

BOSTON *(sidiĝas sur la tablon)* Kiel vi scias, Bil Ŝvarc estas momente la plej danĝera bandito en tiu ĉi lando. Depost du monatoj la policistaro ĉasas lin de loko al loko, sed ĉiam li estis tro ruza kaj scipovis eviti la kaptiĝon. Pasintan semajnon li ankoraŭ grave vundis policanon, kiu volis lin aresti.

AMELI Aj!

PROF-O Kaj vi supozas, ke li venos al tiu ĉi urbo?

BOSTON Jes. La polico sciiĝis, ke li intencas veturi ĉi tien.

BETI *(kun ĝojo)* Kiel interesege!

PROF-O Sed kial ĉi tien?

BOSTON Pro diversaj kaŭzoj. Unue ne forgesu, ke en tiu ĉi granda urbo li bone povos sin kaŝi. Inter la miloj da eksterlandanoj, kiuj ĉeestas la universalan kongreson, estas ege malfacile kontroli iun. *(Paŭzeto.)* Cetere li estas bonega esperantisto.

ČIUJ *(kune)* Esperantisto?

BOSTON Jes, bonega esperantisto.

AMELI Ni ĉiuj estos murditaj.

BOSTON Ne timu, sinjorino. Mi estas tie ĉi. *(Ameli proksimiĝas al li por protekto.)*

PROF-O Kaj ankaŭ mi! *(Ameli ridetas moke.)*

BOSTON Tie ĉi estas haveno. Li certe intencas fuĝi el la lando per ia ŝipo. *(Mistere.)* Estas ankoraŭ alia kaŭzo kial li ĝuste venos al tiu ĉi urbo.

BETI Kial?

BOSTON Ĉar mi estas certa, ke li havas ĉi tie — helpantinon.

BETI Helpantinon?

BOSTON Jes, sed ni ne konas ŝin.

PROF-O Vi ne konas ŝin?

BOSTON Ne, tamen ŝajnas, laŭ onidiroj, ke ŝi estas belega, kiel anĝelo kaj ruza kiel vulpo.

BETI Kaj Bil Ŝvarc mem, kiel li aspektas? Ĉu li estas — malbela?

BOSTON Bil Ŝvarc? Li estas nek bela, nek malbela. Li aspektas ordinara. Li estas proksimume tial granda. *(Montras grandecon. Intertempe Ĵimi eniras tra la dekstra pordo. Neniu rimarkas lin.)* Li havas ruĝajn harojn kaj lipharojn. Li aspektas, jes — nur ordinara. Sed li timas nenion, nenion. *(Mistere.)* Li kuraĝas ĉion fari. Mi ekzemple tute ne mirus, se li envenus tiun ĉi ĉambron. *(Ĉiu rigardas time maldekstren. Ili ne rimarkas Ĵimi, kiu staras malantaŭ ili kaj kiu ankoraŭ tenas en la mano la florojn.)* Nu nu, ne necesas timi... cetere mi estas tie ĉi, mi... *(Li ekrimarkas Ĵimi kaj opinias, ke estas Ŝvarĉ. Rapidege li saltas de la tablo kaj aperigas revolveron.)* Levu la manojn!

ĴIMI *(tute naive)* Sed... sed mi...

BOSTON Bil Ŝvarc, levu la manojn! *(Al la aliaj):* Atentu, li estas danĝera. *(Al Ĵimi):* Levu la manojn, aŭ mi forpafos vian kapon!

AMELI Aj, aj, aj!

PROF-O Sed vi faras eraron...

BETI Jes, li...

AMELI Aj, mi ... mi... *(Ŝi eksvenas en la brakojn de Boston. Samtempe Ĵimi metas la manojn en sian poŝon. Boston kredas, ke Ĵimi minacas lin per kaŝita armilo. Li faligas sian revolveron.* Ne, ne, ne pafu ... *(Li volas levi la manojn, sed ne volas faligi Ameli.) Mi* submetas min ... mi..

BETI *(moke)* Li, Bil Ŝvarc! Ha, ha, ha!

PROF-O Vi faras eraron, mia amiko. Tiu ĉi estas .., *(Ĵimi alproksimiĝas al Boston kun la mano en la poŝo.)*

BOSTON Ne pafu... ne pafu...

PROF-O Ne timu, li estas bona konato de mi *(Li frapas amike la dorson de Ĵimi.)*

BOSTON *(timege)* Sed ... li... *(Ĵimi elpoŝigas pipon kaj ekfumas.)* Oh, mi kredis ...sed... *(Li forvišas ŝviton.)*

PROF-O Mi prezentas al vi sinjoron Ĵimi Bum, la konatan poeton kaj fervoran samideanon...

EL „SLOVAKA ANTOLOGIO“

Fine de la pasinta jaro la Slovaka Pedagogia Eldonejo aperigis 538-paĝan imponan libron kun la titolo *Slovaka Antologio*. Tiu ĉi verko estas iasence renesanco de tre bela tradicio de nia kulturo: eldonado de verkoj kun totala prezento de iu nacia kulturo.

La slovaka literaturo estas unu el la plej malmulte konataj Eŭropaj literaturoj, pro tio ĉiu legema esperantisto ĝoje bonvenigos tiun ĉi verkon. Ni, hungaroj, aparte ĝojas, ja nia kulturo dum longa tempo evoluis havante tre fortajn ligojn kun la slovaka. Ne mankas verkistoj kaj poetoj, kiuj riĉigis ambaŭ literaturojn, kaj nun ambaŭ popoloj, la hungara kaj slovaka, konsideras ilin sia filo.

Ĉisube ni publikigas specimenon el *Slovaka Antologio*, kiu estas verko de tia komuna aŭtoro: Matej *Bel*, nomata en Hungario Mátyás *Bél*. La verkon, el kiu aperas ĉi tie fragmento, li verkis nek en la hungara, nek en la slovaka lingvo, sed en la latina. Matej *Bel* aŭ Mátyás *Bél* (1681—1749) estis elstara figuro ne nur de la slovaka kaj hungara kulturoj, sed rekonita scienculo en la tuta tiama Eŭropo.

Matej Bel, elstara sciencisto de la 18-a jarcento.

Matej Bel

LA DEPARTEMENTO MALGRANDA HONT

Slovakoj, egale kiel la plejparto de Hungaroj, diferencas inter si multe laŭ lingvo kaj kutimoj. Sed ili ĉiuj estas persistemaj en laboro, kunkreskintaj kun la tero, noblamoraj, senkonsidere pri tio, ĉu ili loĝas en montara regiono aŭ sur ebenaĵo. Tiuj ĉi lastaj ne devas tiom labori, havante pli fekundajn kampojn, kaj male, la unue menciitajn, precipe tiujn, kiuj loĝas en pli malproksimaj montaroj, devigas la naturo okupiĝi pri diversaj lignoprilaboraj laboroj. Tiuj, kiuj loĝas sur platejoj, okupiĝas prefere pri potfarado. Sed kaj la unuaj kaj la aliaj alportadas siajn manufakturaĵojn en la ebenaĵojn por vendi ilin tie. Tiel ĉi ili plejparte gajnas siajn vivrimedojn. Sed cetere ili ĉiuj pro nefekunda tero vivas en mizero kaj malriĉeco. Malgraŭ tio ili tamen estas honestaj kaj egale lertaj kiel diligentaj...

Egale kiel Hungaroj, ili edziĝas en plenekfloro de sia juneco Sed ili havas tute diferencajn kutimojn. Nome Hungaroj alvenigas siajn junedzinojn laŭ malnovaj kutimoj sen grandaj ceremonioj. Slovakoj, tute male, praktikas ĉe tio tiom da diversaj ceremonioj, ke estas malfacile ilin unuope mencii. Unue ili sabate dum krepusko kunvenas kvazaŭ por gastigo; tion oni nomas »kunveni por manĝi kaĉon«. Helpe de du knabinoj estas kunvokataj la samaĝulinoj de la fianĉino. Al la gastigo oni kunvokas ankaŭ la fraŭlojn, kaj ili prizorgas la dancamuzon. Poste ili amuziĝas ĝis malfrua nokto kaj ĉe la disiro esprimas grandan dankon por la honorigo manifestita al ili per la alvoko. La disiro okazas kun laŭta kantado.

Kiam venas dimanĉo, okazas la edziĝfesto kun kamparana sento de memestima fieriĝemo laŭ la materiaj eblecoj de la gepatroj. Je fiksita horo oni iras, dancante dumvoje, en la preĝejon kie la gefianĉoj estas solene geedzigitaj. Poste ĉe la sonoj de violinoj kaj sakfajfiloj oni revenas en la domon, kie okazas la edziĝfesteno. Tie fine oni komencas festeni kaj danci kaj mankas tie nenia speco de vilaĝa amuziĝo, kiun oni nur povas al si imagi. Dum tia gajeco kaj amuzado la edziĝfesteno ofte daŭras eĉ ok tagojn kaj la kostojn ofte pagas la junedzo.

Kiam pasis unu-du tagoj en tiaj amuziĝoj, ĉiuj gefestantoj procesie foriras en la domon de la junedzo, kien oni malfrue vespere alvenigas ankaŭ la junedzinon. Tiun ĉi kutimon oni nomas »enhejmigo«. Estas malfacile priskribi, kiom da ululkriado kaj sakfajfado okazas dum tiu ĉi ceremonio. Kaj poste en la domo de la junedzo okazas la nova festeno.

La sekvan tagon venas la edziĝintaj viroj kaj la edziniĝintaj virinoj por saluti la junan geedzan paron kaj laŭ ceremoniplena kutimo akceptas ilin inter sin.

Tiajn kutimojn havas la ĉi-tieaj Slovakoj.

La infanojn ili edukas tiel, kiel ili mem vivas. La knabinojn ili severe alkutimigas al la hejmaj kaj la knabojn al la terkulturistaj laboroj. Sed en tia ĉi, kvankam malfacila vivo ili ofte vivas pli longe ol iu alia homo.

La mortintojn ili laŭ malnova kutimo entombigas dum laŭta vekriado kaj lamentado de ploristinoj, kiuj laŭ certa melodio kantas en la funebra procesio laŭdojn al la mortinto kaj prikantas sian malfeliĉon, ja eĉ amare riproĉas al si mem la maljustajojn kaj ofendojn, per kiuj ili estis pekintaj kontraŭ la mortinto.

Dum ili vivas, ili sian amaran vivon dolĉigas al si per diversaj amuziĝoj, precipe la junularo. Tiu ĉi dum Pentekosto elektas sian »reĝon«, kiun ili kronas per simbola krono. La sekvan tagon ili aranĝas dancamuzon. Siajn amuziĝojn ili praktikas en garbejoj sub la kontrolo de iu el la pli aĝaj viroj, kiu zorgas, ke ili amuziĝu dece. Tiu ĉi pliaĝulo estas kvazaŭ parolisto de la reĝo — li parolas kaj respondas kiam necese, dum la reĝo mem silentas. Se iu volas alpaŝi al la reĝo por saluti lin, li povas fari tion tiel, ke li manpremas kun la reĝo havante sian propran manon ornamita per floroj. Krom tio, se la reĝo iras danci, li tenas antaŭ si sian »sceptron« kaj antaŭ kaj post li paŝas po unu junulo. Ekdanconte li forĵetas sian sceptron, kaj se iu el la junuloj ne sukcesas kapti ĝin, la reĝo simbole punas per la sceptro. Fine la reĝo sidiĝas al la tablo sur kusenetoj. Tie ĉi zorgeme servas al li la du junuloj kaj aliaj subuloj, kiuj estos al li dispone. Aliuj sidas sur la tegmento kaj afable invitas preterpasantojn al la dancamuzo.

Tiom ĉi pri la slovakaj vilaĝaj terkulturistoj.

Tradukis: E. V. *Tvarožek*



Memportreto

György Dózsa



Kapo

KAPOJ de OSZKÁR PAPP

Komence de la kuranta jaro (januaro-februaro) oni povis vidi en Budapeŝto la tutlandan ekspozicion: „Pentrarto '77". Nur la anoj de la Asocio de Hungaraj Belartistoj rolis kun po unu bildo: do tial enviciĝas en la ĉambregoj 240 pentraĵoj de A (Ilona *Aczél*)) ĝis Z (Anikó *Zöld*), de tradiciaj pentristoj ĝis la abstraktuloj. La kritikistoj estis sufiĉe malkontentaj, severaj, tamen Gy. *Horváth* skribis saĝe, ke li vidis tie 50 pentraĵojn, por kiuj estis inde viziti la ekspozicion. Nu, inter la menciitaj 50 bildoj estas *»Proteusz«* (naŭ kapstudoj) de Oszkár *Papp*.

Li estas pentristo, grafikisto, sed estas konata, kiel farinto de multaj belaj kaj interesaj emajlaĵ-bildoj. Lia mondo estas tre granda: pentraĵoj kaj grafikaĵoj vivas unu apud la alia en tradicia kaj en abstrakta stilo, kaj laŭ temoj de la memportretoj ĝis la scienc-fikciaj vizioj. Jam ekde jardekoj estas la plej karakteriza trajto de lia talento la modernеco.

Moderneco estas la plej multfoje uzata vorto kiel estetika, stila difino en la belarto dum almenaŭ centjaroj. Tamen mi estas dubema, ĉar mi scias, ke ankoraŭ nun multaj ne komprenas ĉi tiun artan tendencon kaj ankoraŭ estas pli multaj, kiuj ne akceptas, ne ŝatas modernan arton.

Sed kiu estas *moderna artisto* en nia epoko? Ĉiuj, kiuj pentras kaj desegnas „nonfigurativajn" bildojn, kiuj prenas el nia riĉa, senlima mondo nur la pecetojn, nur la mildan aŭ frenezan kavalkadon de la linioj, koloroj, *ĉiam* laŭ la plej freŝa tagmodo? Eble nur tiuj artistoj estas modernaj, kiuj volas kaj kapablas diri ion pri nia epoko, pri la sorto de la homaro, pri la nuntempo kaj futuro, por kiuj la arto estas ne nur lùdado, eksperimento, ne nur konsterneco, sed moralo, respondeco, eĉ oferemeco? — Jes — laŭ mi — ili estas veraj modernaj artistoj.

Antaŭ jaroj O.*Papp* ekspoziciis 400 pentraĵojn, 400 kap-studojn. El lia ŝatata temrondo ni prezentas tri grafikaĵojn. La *»Memportreto«* fariĝis laŭ tradicia stilo, sed *»György Dózsa«* (estro de la plej granda kamparanribelo en 1514, fine ekzekutita sur la ardigita ŝtal-trono) kaj la tria »Kapo« estas modernaj grafikaĵoj, kiuj agitis aŭ meditigis nin.

Mihály Gergely

PANORAMO

Universitata Presejo

En la fino de la pasinta jaro festis sian 400-jaran jubileon la Universitata Presejo (Egyetemi Nyomda) en Budapeŝto.

La lulilo de la presejo estis la okcident-hungarlanda urbo Nagyszombat, kiu tiutempe havis nur kelkmilojn da loĝantoj, kaj rolis ankoraŭ ofte kun sia latina nomo: Tyrnavia (hodiaŭ Trnava, en Slovakio). Ĉi tie kreskis la presejo je la plej granda en la lando kaj fariĝis fama en tuta Eŭropo. Ĝia unua produktaĵo aperis la 7-an de novembro en 1578. Ĝi estis 904-paĝa libro, kalendaro, el kies ekzempleroj nur kelkaj ekzistas nuntempe en la tuta mondo.

Ankaŭ la urbeto Nagyszombat multe evoluis en la 17-a jarcento kaj pere de la fondiĝo de universitato ĝi akiris grandan reputacion kaj el eklezia vidpunkto kaj en la intelekta vivo. **La jaro 1640 estas** grava dato en la historio de la presejo; tiam ĝi fariĝis presejo de la universitato kaj ĝi starigis sian aktivecon en la servon de la universitato. Ĉi tiu ligiteco dum jarcentoj determinis la profilon de la presejo. De ĉi tiu tempo ĝia unua tasko estis provizi la studentojn per lernolibroj. En la 17-a jarcento multe evoluis la presejo, sed en la sekvanta ĝi atingis la kulminon. Tiutempe ĝi posedis jam eminentajn maŝinojn, grandegan provizon de diversaj litero-tipoj kaj ĉiam pli da fakspertaj presistoj laboris en ĝi.

Multaj libroj pretiĝis ĉi tie por la princo Ferenc Rákóczi la 2-a, en la jaroj 1707 kaj 1708, kiam lia revolucio atingis siajn plej glorajn sukcesojn.

Ankaŭ la eventoj de la liberecbatalo 1848 fidele respeguliĝas en la produktaĵoj de la Universitata Presejo, kiu tiutempe jam troviĝis en la fortikaĵo de Buda. **Depost la** malvenko de la revolucio ankaŭ la la presejo komencis malkreski. Speciale ĉirkaŭ **1880 estis senteble, ke** ĝi ne plu povas resti sur la surfaco en la senindulga kapitalista ekonomia konkuro. Ĝia kontakto tamen restis strikta kun la Akademio kaj kun la Universitato. La sciencaj verkoj plejparte aperis en ĉi tiu presejo.

Post la dua mondmilito oni sukcesis rapide rekonstrui la presejon, renovigi la difektitajn maŝinojn kaj poste en nova loko, en la strato Dohány, komenciĝis ĝia erupte rapida evoluo, kiu ankaŭ en niaj nunaj tagoj daŭras.

Nuntempe oni aperigas speciale teknikajn kaj sciencajn verkojn ĉi tie. Unu el la plej grandaj partneroj de la presejo estas la Eldon-entrepreno por Lernolibroj.

Kronado de la Zamenhof-reliefo en la Esperanto-parko de Pécs.

En la sudhungarlanda urbo Pécs, la departamenta Esperanto Komitato jam tradicie aranĝas renkontiĝojn kun interesaj kaj amuzaj programoj okaze de la Semajno de Internacia Amikeco. Dum la ĉijara programserio, de la 21-a ĝis la 27-a de februaro, ili akceptis danan studenton, pli ol kvardek polajn gastojn, du reprezentantinojn el la finnlanda urbo Lahti, kiu cetere estas ĝemelurbo de Pécs. Krome venis vizitantoj el la proksima Jugoslavia ĝemelurbo Osijek. Ankaŭ reprezentantoj el aliaj hungaraj departementaj komitatoj partoprenis la aranĝojn kaj kaptis la okazon pritraktadi estontan turisman kaj kulturan kunlaboradon, reciprokajn vizitadojn kun estraranoj de la polaj vojvodiaj filioj.

Fraŭlinoj Soili Salminen kaj Liisa Karppinen, reprezentantoj de la Esperanto-klubo de la finna urbo Lahti.

Zuzanna Kawulok, popolartistino (Istebna, Pollando), prezentis malnovajn, originalajn paŝtistajn muzikinstrumentojn.

PANORAMO

En la paŭzo de la solena malferma prezentado György Aczél, vicprezidanto de la registaro; Gabi Jobba, aktorino kaj László Gyurkó, direktoro de la teatro

La renovigita Burgteatro en najbareco de la iama reĝa palaco en la malnov-etosa kvartalo. Ĉi tie okazis la unua hungarlingva teatra prezentado en 1792.

Maloftan interesan, memorajon de la konstruarto oni rekonstruis en Székesfehérvár. La malnova domo estis komercista domo jam de 700 jaroj. Sur ĝi ni trovas ĉiujn karakterizajn stilo-signojn de la 13-a jarcento ĝis la 18-a. Dum la rekonstruado oni faris ĉiujn ĉi postsignojn bone videblaj sur diversaj partoj de la domo kaj tiel ĝi fariĝis unu el la plej interesaj vidindajoj en la centro de Székesfehérvár.

Post longa renovigado denove estas malfermita la Muzeo Déri en Debrecen. Ĝia grandvalora kolektajo entenas pli ol 180 mil artobjektojn. Okaze de la solena malfermo proksimume 7 mil pentrajoj skulptajoj kaj etnografiaj artobjektoj de muzeaj valoroj estis prezentitaj al la interesiĝanta publiko.



La muzeo Déri en Debrecen

Kelkaj interesajoj el la listo de kongresoj aranĝotaj en Hungario en 1978: — *Konferencoj por kuracistoj:* Kongreso por Infankardiologoj, 5/9—12, Budapeŝto; Kongreso de Socieo de Kardiologoj, 5/24—27, Budapeŝto; Nervkirurgia Kongreso ĉe la matologia Socieo, 6/13—17, Budapeŝto; Nervkiurgia Kongreso ĉe la Balatono, 8/30—9/3; Hungara Kongreso de Hematologoj, Budapeŝto, 9/8—12; — *Aliaj internaciaj aranĝajoj:* Konferenco pri Fridig-industrio, 4/24—29, Budapeŝto; AEPE (Eŭropaj Instruistoj de Hispana lingvo) 7/31—8/4, Budapeŝto; Konferenco pri Internacia Kompara Juroscienco, 8/21—29, Budapeŝto; 29-a Kongreso de Internacia Elektrokemia Socieo, Budapeŝto, 8/28—9/3; Simpozio pri Hidrologia Korodio, 9/12—16, Pécs; Teknika Adaptado kaj Prilaborado de Sintezaj Materialoj, 9/25—29, Sopron; Konferenco pri Voj-aferoj, Budapeŝto, 9/27—10/1.

..kaj la interesiĝanta publiko

Internacia simpozio pri kancer-esplorado en Budapeŝto, 1977.

Salonego de la porcelan- kaj ceramikaj kolektajoj

Instruoj de konkurseto

Nia redakcio sendis poemon de Ferenc *Buda* »Ne rejtőzz el ...« al kelkaj metiejanoj, dezirantaj traduki poeziaĵojn. La ricevitaj verkoj donas bonegan eblon por priparoli kelkajn problemojn de tradukarto ĝenerale kaj paroli pri tradukado en Esperanton aparte.

Jen la originalo kaj ĝia laŭvorta traduko:

Ne rejtőzz el, úgyis látlak!
Rádcsukom a szempillámat.
Benn dörömbölsz a szívemben,
s elsimulsz a tenyeremben,

s elsimulsz az arcom bőrén,
mint vadvízen a verőfény.
Nagyon jó vagy, jó meleg vagy,
nagyon jó így, hogy velem vagy.

Mindenekben megtalállak,
s öröm markol meg ha látlak.
Ne nézz rám, szólok szemednek,
ne fuss el, nagyon szeretlek!

Ne kaŝu vin, mi vin tamen vidas!
Mi fermas al vi miajn okulharojn.
Vi bruas (batas) en mia koro
kaj glatiĝas (karesiĝas, kuŝiĝas) en mia manplato

kaj glatiĝas (karesiĝas, kuŝiĝas) sur la haŭto de mia vizaĝo,
kiel la plenumo sur la sovaĝa akvo (marĉo).
Vi estas tre bona, vi estas bone varma,
estas tre bone tiel, ke vi estas kun mi.

Mi trovas vin en ĉio,
min kaptas pugne la ĝojo, se mi vin vidas.
Ne rigardu min — mi diras al viaj okuloj,
ne kuru for, mi vin tre amas!

Se oni legas la poemon hungare, ĉiun kaptas spiro de popola poezio. La poeto kapablis esprimi siajn plej profundajn sentojn en la formo de t. n. »antikva oksilabo«, konata ankaŭ en la Eŭropa literaturo (»Dies irae« de Tomaso de Celano), sed tre populara en la hungaraj popolkantoj. Tiun ĉi formon li unuigis kun la pli poluritaj literaturaj esprimoj de la moderna poezio. La tasko de tradukistoj ne estis do facila.

Tradukante ion oni devas unuavice: verki en la cela lingvo tiel, kvazaŭ nia kreaĵo estiĝis en tiu ĉi lingvo, konvene al ĉiuj lingvaj, gramatikaj kaj poetikaj reguloj de la koncerna idiomo. Duavice: ni devas kiel eble plej proksimiĝi al la enhavo de la tradukata verko. Triavice: necesas — se eble — transdoni la ĉefajn formajn ecojn de la originalo.

Ĉi tiuj postuloj je la unua rigardo ŝajnas tro abstraktaj, akademiecaj, sed utiligante ilin en la kazo de la traktata poeziaĵo, oni komprenas ilian signifon.

La verkon de Ferenc Buda tradukis pluraj. Ne iliaj nomoj gravas, tial mi anstataŭigas ilin per du literoj, sed tre gravas, kiel provis ĉi tiuj tradukintoj solvi siajn taskojn. Multaj el ili volis kiel eble plej bone transdoni signifon de la vortoj anstataŭ kapti la enhavon de la versoj. El la poetikaj ecoj de la verko la tradukintoj plej grava opiniis rimojn, la aliajn ne sufiĉe atentis. Sed kelkaj el ili eĉ malmulte scias pri la Esperanta rimo. Unu el tiuj tradukoj komenciĝas tiele: »Ankaŭ blinde mi vin vidas,/ eĉ tiel, se vi kaŝiĝas ...« Mil pardonojn, sed *vidas* kaj *kaŝiĝas* en Esperanto ne estas rimo! La *»adasismoj«* (finaĵrimoj) ja ne rimas, ĉar en alia kazo ĉiu substantivo, povus rimi kun ĉiu subtantivo, ĉiu adjektivo kun ĉiu adjektivo ktp.

La plej granda problemo por la tradukistoj estis la lastaj du versoj de la meza strofo. En la originalo ili finiĝas je *vagy — vagy*, do unue oni povus kredi, ke la poeto novigis la kvarjarcentajn tradiciojn de la hungaraj »historiaj kantoj« kie ofte troveblas rimoj »vala—vala« (estis—estis). Sed pli bone esplorante la du versojn, evidentiĝas, ke en ili rimas ne *vagy—vagy* sed *meleg vagy—velem vagy*, do la veraj rimvortoj estas *meleg* kaj *velem*. Tia rimo ekzistas ankaŭ en la Esperanta poezio, ekzemple en la traduko de la hungara Himno far Kalocsay: *»La Hungaron benu, Di'/ Per gajec', per spikoj./ Ŝirman brakon tenu Di'/ Kontraŭ malamikoj ...«* En la unua kaj tria versoj rimas *benu, Di'* kaj *tenu, Di'* (la kerno de la rimo estas do *ben' — ten'*).

Sed laŭ mi eĉ pli granda manko troveblas en unu el la plej bonaj tradukoj (far de E. S.): *»Ne kaŝiĝu, en mi ĝermas!). Sub palpebroj vin mi fermas ...«* En la dua parto de la verso malestas la subjekto *vi*. La tradukinto opiniis ĝin superflua, ĉar en la unua frazparto li apud la volitiva verbo ĝin ne uzis — regule. Sed tio tute ne rajtigas en la dua parto de la kunmetita frazo ellasi la duapersonan subjekton ĉe indikativa verbo.

Malpli grava estas la eraro de tiuj tradukoj, kiuj uzas eliziajn, t. n. »virajn« rimojn. Tio estas teorie permesita, se la tradukanto ne volas aŭ ne povas centprocente sekvi la versformon de la originalo. Tamen, laŭ mi en la traduko de tiu ĉi poeziaĵo tre grave estas transdoni la muzikon de la versoj, ĉar la efiko de la verko baziĝas precipe sur ĝi.

Do plej konvene estas traduki la poemeton en trokeoj, sonantaj simile al tiuj hungaraj versoj, kies ritmon donas la konstanta kvanto de silaboj, la cezuro kaj la akcento ĉe la komenco de versoj kaj post la cezuro. Ritma skemo de la versoj tiam aspektas: kvar trokeoj, post la dua cezuro /—v|—v||—v|—v/

Post vicigo de la plej gravaj mankoj de tradukoj, mi tamen kuraĝas deklari: en ĉiu tradukaĵo mi trovis ion interesan, menciindan, atestantan pri talento. Jen ekzemple la lasta strofo, tradukita de J. K.: *»Esploras mi vin kun avid'/ kaj ĝoj' kaptas ĉe la via vid'/ Al okuloj voĉas mi flame,/ ne fluĝu, amas mi vin ame«.* Malgraŭ gravaj mankoj, la rimoj estas bonaj. En la ne tre sukcesa verko de J. V. oni same trovas versojn *»Vin mi ĉiel fantazias,/ per vi ĉiam ĝojebrias ...«*, pri kiuj ne eblas diri, ke ili estus malbonaj.

F. M. kaj E. S., same kiel kelkaj aliaj partoprenis ĉi tiun etan konkurson per pluraj tradukoj. Po unu el iliaj aĵoj sukcesis iom bone. Jen ili:

Ne kaŝiĝu, en mi ĝermas!
Sub palpebrojn vin mi fermas.
Miakore vi — bruado
kaj kareso en manplato,

kaj kares' sur haŭt' vizaĝa:
sunbrilo sur marĉ' sovaĝa,
Vi tre bonas, bonvarmigas,
jen bonege, min alligas.

Vin en ĉio mi renkontas,
ĝoj' min premas, se vidontas.
Kial vi mire min rigardas,
Kuri ne eku, mi amardas!

Tr.: E. S.

Ne kaŝu vin, ja neeble,
vin mi gardas subpalpebre,
vi en kor' frapadas laŭte,
kaŝe kuŝas intertraĵte,

etendiĝas sur vizaĝo
kiel lum' en prapejzaĝo.
Vi tre bona, varma estas,
vi feliĉe kun mi estas.

Al vi gvidas ĉiu vojo,
ĉe rend' kaptas min la ĝojo,
ne kuru for, estas vane,
restu, mi vin amas ame.

Tr.: F. M.

Tamen ankaŭ ĉi tiuj talentatestaj tradukoj havas iom da eraroj. Pri la unua verso de E. S. jam temis. Ne estas preteririndaj ankaŭ tiaj esprimoj, kiel *miakore* au *bonvarmigas.* La unuan mi ne nomus erara, nur iom nekutima, malplaĉa, la dua vortkunmeto estas neregula, same kiel ekzemple »belknabino«, kiun bonaj stilistoj neniam uzis. La vorto *amardas* sonas strange kaj estas eĉ nekompreneblа. Ĝi povas signifi: *'amas arde'* aŭ *'ardas ame'*. Sed estas tute nekompreneble, kion signifas vorto *vidontas* sen subjekto en la frazo *»... ĝoj' min premas, se vidontas«?* Per tio la tradukinto volis eble esprimi *»min premas la ĝojo, se mi estas vidonta vin«.* Sed la frazo eĉ en tiu ĉi formo nekutima, malbela. Mi jam ne parolus aparte pri tiaj eraroj, kiel la lama ritmo en la verso *»sunbrilo sur marĉ' sovaĝa«.*

En la traduko far de F. M. krom kelkaj ritmaj mankoj mi kritikus la lastajn du versojn de la dua strofo, kio jam estis tuŝata.

Laŭ niaj tradicioj staru ĉe-fine »sinteza traduko«, en kiu mi provis utiligi la plej bonajn solvojn de la aliaj kaj ne ripeti iliajn erarojn.

Ne kaŝiĝu, ja neeble,
mi vin gardas subpalpebre.
Vi estas en kor' batado,
la kareso en manplato,

la kares' sur haŭt' vizaĝa,
brila lum' sur marĉ' sovaĝa.
Bona, varma lum' vi estas,
bone, ke mi kun vi estas.

Ĉiu voj' min al vi gvidas,
mi ĝojegas, se vin vidas.
Turnu vin de mi rigarde,
restu, mi vin amas arde.

P. Rados

Stefano Nemere

LA LAGO

Unupieda migranto banis sin en la lago: li tranoktis surborde. Matene, kiam li vekiĝis, ekvidis, ke lia mankinta piedo denove elkreskis.

Strangvizaĝe pro granda ĝojo li kuregis al la urbeto. La lago, la lago...! — li kriadis. Multaj alvenis. Ĉiuj rigardis la lagon — ĝi aspektis tia, kia la aliaj. Iu kripluo enakviĝis — kaj eliris sen ĝibo, kun nova lumo en la okuloj.

„La akvo de l' vivo!" — glorkriis la reklamoj. Kripluloj inundis el ĉiuj direktoj, aŭ oni alveturigis ilin. Ĉiutage, ĉiuhore.

Konstruiĝis banejo, kun palisaro. Aŭtoŝoseo de la urbo al la lago. Palisaroj, enirbiletoj, manipulkostoj, pago por vizito, por partopreno. Tri restoracioj, hotelo, manĝejo, kampadejo, dek ok vendejetoj, magazeno, hospitalo, sanatorio, panoramturo, teniskortoj, naĝbasenoj, noktaj amuzejoj.

La kripluarmeo fluis senfine. La akvo kuracis. Lamuloj, preskaŭ ne irkapablaj, paralizitoj, mutuloj alvenis kun brilanta haŭto, gaje konversaciante, la mondo tuj apartenis al ili. Homoj kun duona kaj kvarona stomako, post la banado tuttage bonapetite manĝis en la restoracioj. Kiujn matene alveturigis savaŭtomobiloj, jam posttagmeze ili tenisludis. Unupulmuloj — silentemaj hometoj — post la banado senhalte kuregis supren sur la ŝtuparoj de la panoramturo, feliĉe.

La skorion el la kaldronegoj de la hotelo oni ĵetadis en la lagon — malekonomie estus forporti ĝin aliloken. Same oni subakvigis la malpuraĵojn de la kampadejo, kaj la kanalaĵojn de ĉiuj domoj. Pasis du jaroj, ĝis iu rimarkis tion.

Iutage oni ĵetis unupiedulon en la akvon, senzorge. Ja li tuj elnaĝos dupiede, sane... Poste oni devis serĉi la kadavron. Oni pensis: li mortis pro la ĝojo, kaj ne plu zorgis pri li.

Sed la akvo ne plu kuracis. Vane oni provadis mil- kaj milfoje. Transloĝiĝis la amuzejoj, vendejoj. Forlasita eĥas nun la hotelo — en ĝia halo herboj kreskas. Sur la loko de la kampadejo bovinoj paŝtiĝas, teniskortoj malaperis. La panoramturo triste, kurbiĝinte rigardas en la lagon.

Sed la kripluloj sidas surborde. Ili atendas. Centoj kaj centoj, grandega armeo. Silente. Foje-foje unu el ili vadas en la akvon ĝisfemure, subakvigas sian stumpon, atendas. Poste li krias al la bordo: „Ankoraŭ ne!"

La vorto flugas de buŝo, al buŝo, kiel silenta venteto: „Ankoraŭ ne... Ankoraŭ ne..."

ĴUS APERIS

5 unuaktaĵoj de Julio Baghy

140 paĝoj

Prezo: 12 guldenoj

REVUO DE REVUOJ

La impona 90-a jubileo de nia lingvo generis variajn meditaĵojn pri la vojo, la vivoforto de tiu nia unika fenomeno: burĝone el la Unua Libro perfektiĝis mirinda Lingvo, mondvasta Movado kun specifa Kulturo, ofte eĉ el cindroj fenikse refreŝiĝintaj.

Rimarkinda pensoĉeno de P. *Janton* (pr. ĵanton) eksplikis en HEROLDO DE ESPERANTO (nro 2.) kiel fortika faktoro helpe al la movado iĝis mem la nomo „Esperanto". La plaĉa plumnomo de Zamenhof, uzita baldaŭ por titoli lian IL-n, poezie sugestas belajn emociojn, radias optimismon, kaj kiel paca, amika vico da tonoj, efikas altirante, movanta en la psiko la flankon humanecan. Mi intencas emfazi tiun ideon de la artikolo, ke al la supremenciitaj aldoniĝis, kvazaŭ adicie, la *impresiva demokrateco* de la lingvo-strukturo de E-o, ĉar tie kaŝiĝas la reala kerno de ĝia ofte kaj prave aludita humanismo. La racia scienco — Esperantologio — devas tiujn trajtojn ekzameni, por forigi per argumentoj la nesciajn, malkonfidajn kontraŭjuĝojn.

En BULGARA ESPERANTISTO (ankaŭ en STARTO de ĈEA) prof. *Podkaminer* esploris, kiel rilatis E-o al la historiaj kondiĉoj, precipe nuntempe. La ebloj de IL ne tre konvenas en la kapitalisma socio, sed la aŭtoro pentras tion per tro monotona griza farbo, kio kondukas lin al pesimisma verdikto koncerne la „venkon" de E-o en tiu sociordo. Oni ne rajtas tamen neglekti la egajn diferencojn inter tiuj ŝtatoj: iuj estas imperiismaj, aliaj male; jen floras progresemaj socitavoloj, klasoj, jen eĉ revoluciaj; ie la regantaj klasoj diktas firme, tie ili devas multe koncedi al la regatoj. Mia kadro ĉi tie malsulfiĉas ekspliki la multfacetajn lingvopolitikojn laŭ la specialaj landaj cirkonstancoj, pro kiuj specife la registaroj tre malsame manifestos siajn starpunktojn rilate la enkondukon de IL, ankaŭ se temas pri en ia afero komun-uzenda nacia lingvo. „La gigante kreskantaj internaciaj rilatoj" objektive necesigis jam ankaŭ tutmondajn konvenciojn pri gravaj homaraj aferoj — se ofte kontraŭ subjektivaj deziroj de iuj ministroj ... El tiaj tutmondaj kontraktoj aŭ konvencioj nur hazardtrove mi mencias tiujn pri protektado (reguligo) de maraj ĉasadoj, naturprotektado, kontraŭ epidemioj, drogoj, piratado ktp., kiuj grandparte estas ja ligitaj al la, ankoraŭ ne plene realiĝinta, pacideo, simile al E-o. La paca kunekzistado kun kapitalisma socio, kiu atingis la Finan Akton de Helsinki, povos do venkigi nian aferon ankaŭ ekster la socialismaj landoj. La rezigna konkludo de la aŭtoro, kiun li tiris ŝajne deduktive el neprecizaj ĝeneraligoj, apenaŭ helpas niajn pacajn kunbatalantojn en granda aro de ne-socialismaj ŝtatoj. Cetere, pri lia aserto, koncerne la malavaran ŝtatan subtenon de E-o-movado *en ĉiuj* socialismaj landoj, mi povas nur diri: *dezirindus,* se ĉi vortojn aŭgurajn la jaroj pravigus! Ni esperu!

El inter la diversaj raportaĵoj, pri la lingva afero en la naŭlanda Eŭropa Komunumo, elstaras tiu de Mario *Dazzini* (daccini) en INT. PEDAGOGIA REVUO. Videblas, ke nia afero estas jam en relative altaj rondoj traktata nove-denove; la lingva problemo, kiel interlingvo, kiel lerneja deviga studobjekto, en internacia sfero jam enfokusiĝas. Gravega situacio, kaj neniun ĉagrenu, se nesciaj refutoj venas ankoraŭ. La rekono de la problemo, ties neevitebla disvolviĝo kaj (pardonu) ŝveliĝo, la pli kaj pli incita manko de kontentiga solvo por uzi komunan lingvon, alportas daŭre pli da brulmaterialo. Dazzini citas de aŭtoritathavaj raportoj, resp. el eseoj profesoraj, surtabligitaj ĉe forumoj de EK, kaj jen nek unu kapablas lasi senargumente E-on. Iliaj „proponoj" ŝajnas al ni vere infanecaj, mortnaskitaj (ekz. en ĉiu lando estu instruata *iu* lingvo de la komunumanoj). La artikolo montras, ke multaj kompetentuloj klare vidas la danĝeron fare de la privilegiotaj naciaj lingvoj, kvazaŭ perforte altrudantaj samtempe siajn naciajn vivo- kaj pensmanierojn, fine ... siajn varojn. La aŭtoro tamen realisme konsideras, ke la politikistoj pro taktiko ankoraŭ evitos decidi, aŭ eble cedos al dulingvismo angla-franca. Miaopinie la forto (ekonomia) venkos, kondiĉe, ke ĝi estos momente sufiĉa: eblas decido pri alispeca dulingvismo, eĉ trilingvismo, — kio solvos kompreneble nenion, sed malfermos horizonton al pliaj kvereloj, kiuj levos la lingvan problemon des pli alten. Ke oni respektos homajn rajtojn en la gvidinstancoj de EK, ne trudante nacian lingvon al la popoloj, nu tion vane oni fidos. La bezono je neŭtrala (kaj facila) lingvo devos kreske manifestiĝi multrilate, dum la serio da fiaskoj pro vana elturniĝo al missolvoj.

LITERATURA FOIRO memoris pri *Ferenc Szilágyi* (siladji) multmerita verkisto, redaktoro de Norda Prismo, kiu mortis antaŭ dek jaroj. *G. Silfer* prave atentigas, kiel profunde la Hungarlanda literatura vivo, precipe ties progresema flanko (la tendaro de Babits kaj Ady) influis antaŭ la milito la E-oliteraturon: la „Budapeŝtan skolon", direktitan de Kalocsay kaj Baghy. Ties kolono estis Szilágyi, kiu elmigris antaŭ la faŝisma ŝtormo al la gastema Svedlando. En la fremda, nekutima medio tamen li ne fremdiĝis, surloke asimiliĝante — emfazas la aŭtoro — ĝuste tiamaniere li retis hungarspirita, ke li apartenis al la mondo de E-o per sia verkado kaj redaktado. Mi devas tamen demandi: ĉu li iĝis kosmopolito, ĉar li fidele amis la internaciecon servantan lingvon? Aŭ per kaj pro lia mondvasta redaktora korespondado, rilataro? Laŭ mia persona kono — kaj tion atestas aliflanke ankaŭ tiu artikolo, inda je lia memoro — Szilágyi ĝismorte gardis sian Budapeŝtan humoron kaj spritecon. Plezure por la legantoj, kiuj povas ĝui tion en liaj noveloj, modeligantaj hungaraj popolfabeloj.

Literaturan triumfon rajte solenas grandaj artikoloj en ESPERANTO kaj HEROLDO: la hispana ĉefverko de la mondliteraturo, ***Don Quijote,*** aperis en nia lingvo, dank' al majstra tradukisto, ***Fernando de Diego.*** La ĉapitro, kiun mi legis en hispana revuo el tiu traduko, jam igis min forte admiri pro la ritmo kaj svingo de la dialogoj. La menciitaj artikoloj, multe pli ol kutimaj recenzoj, fakscie konigas multajn ĉeftrajtojn de la originalo. Aparte de la komplikaj fadenoj de la historio de nia inĝenia hidalgo kaj lia servisto Sancho, mi devas havi la impreson, ke la romano estas ne lastgrade ankaŭ majstraĵo de ***varia stilo.*** La kalejdoskopajn scenojn *Cervantes* superece karakterizis per alternantaj stildistingiloj, jen naturalisme, jen parodie, uzante pikareskajn aŭ provincecajn parolmanierojn. Des pli postuleman taskon plenumis Diego, trafante brile la adekvatajn formojn en tiu buntega verko. Ne forgesu: estas la epokon kaj socion bone konanta ***hispana verkisto,*** kiu donacis al ni la E-an interpretadon!

Ervin *Fenyvesi*



Fotartisto Vince Lussa

De la 13a de Aprilo ĝis la 6a de Majo okazis en Budapeŝto la foto-ekspozicio de Vince Lussa. La videblaj 50 fotaĵoj reprezentas kvar terenojn de la interesoj de la artisto. Ili estas pejzaĝoj, portretoj, nudaĵoj kaj reklamfotoj.

Vince Lussa naskiĝis en 1924. Li volis esti artisto ekde sia bubaĝo. Lin logis la ĵazmuziko, sed samtempe li konatiĝis kun la fotarto.

— La unuan fotaparaton mi ricevis donace je mia naskiĝtago de mia onklo — rakontas la artisto. — Mia konatiĝo kun la fotado komenciĝis de la teorio, kvankam en la lernejo mi ne ŝatis la teoriajn lernobjektojn. Mi ellernis parkere la tabelon pri la profundeco kaj akreco de la fotoj. Ĝin eĉ nun mi scias. Mi partoprenis kurson de amatoraj fotistoj. Je mia granda ĝojo fotaĵoj far de mi estis publikigitaj en la ĵurnaloj. Mi kunportis al la gimnazio kelkajn fotojn por montri ilin al mia klasestro. Inter la bildojn mi naive metis unusolan nudon. Nia gimnazio estis eklezia. Ankaŭ la klasestro estis katolika pastro. Kiam li ekvidis tiun foton, li ruĝiĝis ĝis la pinto de sia kapo. La fotaĵojn li transdonis al la direktoro. La sekvan tagon mi fariĝis lernanto de alia gimnazio. Tia estis mia unua travivaĵo pri la akcepto de nudfotoj. De post tiam mi ofte spertis suspektemon, miskomprenojn. Mi tamen faris plu tiajn aĵojn. La problemoj pri ili lastatempe pli kaj pli malaperas.

Kaj ekster- kaj enlande mi havis sukcesojn. Mia unua granda akiraĵo estis la ormedalo en Bruselo en 1958. Poste mi ricevis rekonojn en Bordeaux, Mulhouse, Marseille, Torino, Lisboa kaj en aliaj urboj.

Mi kredas, ke la arto devas montri ne nur la groteskon, la mison, sed ankaŭ la belon, pri kiu tiom riĉas la mondo. Mian laboradon influis precipe la skulptarto. La nudfotoj bezonas tri dimensiojn, same kiel la skulptaĵoj. Miaj aĵoj antaŭ kelkaj jaroj plaĉis eksterlande. En tiuj landoj nuntempe triumfas parte la avangardismo, parte la pornografio. La unua skolo deformas la vidaĵon. Tiel aperas tiaj bildoj, ke en pomo videblas portreto aŭ en arbotrunko virina figuro. Tio estas iom fremda de mi. La pornografion mi kontraŭstaras. La arta foto kreas estetikaĵon, en kiu ankaŭ la erotiko povas havi lokon, sed la pornografiaĵoj estas ne pli ol raportoj pri la seksa vivo aŭ pri seksaj perversoj. La nuntempa pornografio naskiĝis en socio, kie ne gravas, kion oni vendas, se tio estas aĉentata.

Finante mi dirus kelkajn vortojn pri mia labormetodo. Unue mi interparolas kun la modelinoj. Mi mem estas absolute sincera kaj tio devigas ilin esti same tiaj. La nuntempaj junulinoj „kun malpli fortaj nervoj" tre malfacile eltenas tion. Sed por la laboro mi bezonas absolutan psikan harmonion kun ili. Esti mia modelino nun jam signifas rangon. Multaj venas al mi kun angoro: kio okazos? Unuj foriras entuziasmigitaj, aliaj ĉagrenitaj. Multaj el miaj modelinoj re- kaj revenas. kvankam mi jam ne havas inspiron de ili. Mi tamen sentas: oni ne rajtas rifuzi ilin. La fotoj faritaj pri ili iĝos skizoj de aliaj bildoj.

P. *Rados*



LEHEL

KOMPRESORA HEJMA FRIDUJO

200 lit. ***
ultrafridujo 20-litra, -18 C°

Fridiga nutraĵkamero de la familio



Produktas: HŰTŐGÉPGYÁR Jászberény

LA SITUACIO KAJ EVOLUADO DE ŜIRMADO KONTRAŬ INUNDOJ EN HUNGARIO

II.

D-ro Ferenc László

Estas konata fakto, ke la riveroj ne konas landlimojn. El tio sekvas logike, ke ĉiu interveno en la vivon de riveroj tranĉantaj landlimon, aŭ formantaj parton de landlimo povas esti bonrezulta sole per la kunakordigita laboro de la koncernaj landoj. La riveroj do ne disigas la popolojn vivantajn sur la bordoj, sed kontraŭe: kunligas ilin kaj postulas de ili striktan kunlaboron. Tiu konstato validas precipe rilate la damaĝojn kaŭzatajn de akvoj.

Al la supraj donas specialan signifon en hungara rilato tiu fakto, ke la riveroj danĝerigantaj rondcifere 23 000 km²-an terenon de la lando, fontas preskaŭ senescepte ekster niaj limoj. La intervenoj, realigitaj sur la supraj akvokolektejoj de la riveroj trafluantaj la landon, senteble tuŝas la akvoekonomian agadon de grandaj landpartoj. El ĉio ĉi sekvas, ke ni devas efektivigi la plej striktan kontakton kun la najbaraj landoj kaj en inundaj, kaj en seninundaj periodoj.

Dum inundoj la najbaraj landoj evidente klopodas plej rapide forkonduki la inundajn akvoamasojn el siaj teritorioj. Tiuj akvoj obstrukcas sur la etdeklivaj hungaraj riveretapoj, kaj kaŭzas inundojn. La energicentraloj konstruitaj sur supraj etapoj de iuj riveroj klopodas produkti maksimuman energion kaj ĉe apero de inundo dum mallonga tempo malplenigas siajn rezervujojn, kies akvoamaso sentebligas sian malfavoran efikon ankaŭ sur hungaraj teritorioj.

La naskiĝantajn inundojn oni povas prognozi sole laŭ la indikoj de akvonivela mezurreto estanta sur la supraj river-etapoj de riveroj. Tial estas neforlaseble, ke ni ricevu kontinuajn raportojn pri tiuj.

Kompreneble ankaŭ sur aliaj terenoj de akvoekonomio aperas tiaj problemoj, kiuj estas solveblaj sole per interkonsentoj ligitaj kun la najbaraj landoj.

Ni ligis paktojn kun ĉiu lando limanta nian patrion, t. e. kun Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Rumanio kaj Sovetunio. Tiuj paktoj celas akordigon de ĉiuj hidrologiaj problemoj, do ankaŭ tiun de kontraŭinundaj taskoj.

Okaze de inundoj la hidrologiaj institucioj de la supraj landoj kontaktiĝas *permanente**. Ili informas konstante unu la alian pri la akvofluaj kaj juraj cirkonstancoj de riveroj, krome pri ĉiuj okazaĵoj, kiuj tuŝas ankaŭ la aliajn partoprenantojn de la pakto.

Rezulte de la reciprokaj informadoj eblas la prognozo de inundoj kaj eblas la ĝustatempaj ŝirmadaj dispozicioj. Ekzmple laŭ la interkonsento kun la jugoslava Paktanto, en la periodo de glacia inundodanĝero hungaraj glacirompaj ŝipoj laboras laŭ kunakordigita plano sur la komun-interesa etapo de Danubo por detrui la glacitumultiĝojn.

La hidrologiaj paktoj ebligas, ke la Paktantoj helpu reciproke unu la alian por forigi la inundajn danĝerojn. Ili interŝanĝas solidare siajn ŝirmadajn planojn, en akutaj kazoj efektivigas senperan telefon-interligon, aviadilan observadon kaj informas tuj unu la alian pri ties rezultoj.

Dum seninundaj periodoj la reprezentantoj de najbarlandaj hidrologiaj institutoj reciproke kontrolas la komuninteresajn dig-etapojn. La evoluigon de la ambaŭparte gravaj ŝirmadkonstruaĵoj efektivigas laŭ akordigitaj planoj la hidrologiaj institucoj de la interesataj landoj.

Organizado kontraŭ inundoj

La sinŝirmado kontraŭ inundoj en Hungario jam ankaŭ en la intermilitaj tempoj estis centra demando, kiu havis gravan lokon inter la ŝtataj funkcioj, tamen nur post la dua mondmilito ĝi ricevis lokon respondan al sia graveco. Tion laŭnecesa sekvigis la evoluo de nia popolekonomio, la kvanta kaj kvalita plivastiĝo de la ŝtata farendaĵ-tereno.

Sur la vojo koneksa kun la pliigo de efikeco de la farendaĵoj en la sinprotektado kontraŭ inundoj kaj grundakvoj signifis gravan mejloŝtonon la hidrologia leĝo (1964/IV.) kaj la leĝdekreto pri ties realigo, kiu simile al aliaj taskoj en la sfero de la akvomastrumado metis en saman kadron ankaŭ la sinprotektadon kontraŭ damaĝoj far la akvoj. Tiu leĝo kaj ĝia plenum-dekreto klare difinas la taskojn koneksajn kun inundoj kaj grundakvoj, krome la organizajn kaj administrajn kondiĉojn, kiuj estas premisoj de la sukcesa plenumado. Tio tre gravas, ĉar sen tio en la ŝirmada tempo dum realigo de la diversnivele donitaj disponadoj povas okazi komplikaĵoj kaj malfruiĝo kun neantaŭvideblaj konsekvencoj.

Ekstreme grava antaŭa kondiĉo de la sukcesa kontraŭinunda ŝirmado estas, ke la utiligo de la pretenditaj materialaj, teknikaj rimedoj kaj de la laborfortoj okazu laŭplane kaj per altnivela organizado. Kompreneble la samo validas ankaŭ por la savo de popolekonomiaj valoraĵoj kaj por la evakuado de la danĝerigitaj teritorioj. Elirante el tiu principo estas nepre necese, ke paralele kun la evoluigo de la ŝirmkonstruoj evoluigu la organizo kontraŭ inundoj kaj grundakvoj, kro-

---

permanento: daŭranta sen interrompok ŝanĝiĝo (PIV)

Altigo de digoj per sablosakoj

me *cirkonspekte** estu reguligitaj ankaŭ la koneksaj administraj taskoj. Akcentate estas, ke ĉio estas solvenda en la t. n. „pacperiodo", nome tiu ŝirmado estu realigita *antaŭ alveno* de la danĝero, uzante la pli frue akiritajn spertojn. Nur tiel estas efektivigebla la senembarasa kaj efika ŝirma laboro ekde la komenco ĝis la fino.

La inundoj de la lastaj jaroj atestas, ke la supraj dispozicioj efike kontribuis al la lokalizo de la senbridaj fortoj de l' naturo. La tutlanda organizita kunlaboro de la koncernaj landaj organizaĵoj kun la loĝantaro, kaj tiu fakto, ke la savaj, evakuadaj kaj restaŭraj taskoj okazis en konforma ritmo, montras, ke la organizado iris samtakte kun la kreskantaj postuloj kaj ĝi funkciis kvazaŭ efika levilo por la protektadaj farendaĵoj.

En la lukto, kiun la inundoj, kaj tiun sekvantaj restaŭraj laboroj postulis, havis determinan rolon la organiza agado de la hidrologiaj organoj, kiuj kunlaborigis la instancojn de ministerioj pri internaj aferoj kaj pri defendo, tiujn de konsilioj, kaj krome entreprenojn, uzinojn, instituciojn, ktp. La sukceson garantiis, ke ni povis disponigi la materiajn rimedojn kaj homan laboron. En la strukturo de tiuj aktivadoj havis gravan rolon la inundaferaj komisionoj funkciantaj sub gvido de la prezidantoj de la tuŝataj departamentaj konsilioj. Ilia konstitucio kaj funkciado laŭ la bone ellaboritaj principoj ebligis, ke la Priinunda Registara Komisariato povis realigi la teknikajn, organizajn kaj ŝtatadministrajn taskojn de la ŝirmado konforme kaj en ĝusta tempo.

En la laboro de la teritoriaj inundo-komisionoj partoprenis partiaj, konsiliaj kaj hidrologiaj, krome aliaj ŝtataj delegitoj. Iliaj rapidaj decidoj, dispozicioj certigis, ke koncentre formulitaj ŝirm-dispozicioj estu tuj realigitaj.

Landa direktado de ŝirmado kontraŭ inundoj kaj grundakvoj

Direktado ĝis la eksterordinara ŝirmada preteco

Laŭ la leĝdekreto (1964), ĝis la ekesto de la eksterordinara preteco, la prezidanto de la Hungarlanda Hidrologia Instituto gvidas la landan direktadon de la ŝirmado kontraŭ indundoj kaj grundakvoj. La konkretan ŝirmlaboron provizas la hidrologia servado per sia propra organizaĵo, laŭnecese per pruntepreno, transgrupigo de laborkolektivoj sur la danĝerigitaj teritorioj.

En intereso de la sukcesa ŝirmado necesas en la teknika organizado kaj direktado multaj preventaj disponadoj, kiuj bezonas ĝeneralan reguligon. Tiujn regulojn la prezidanto de la Hungarlanda Hidrologia Instituto difinas en la t. n. Landa Akvoŝirmada Regularo, kaj kune kun la koncernaj ministroj reguligas la planon de la konstrumaterio-liverado kontraŭ inundo- kaj grundakvo- danĝero.

Tiu Regularo preskribas la necesajn preparojn por

a) konservado de ŝirmkonstruaĵoj, aranĝaĵoj kaj iliaj apartenaĵoj,
b) preparo, kompletigo kaj modifo de ŝirmadaj planoj kaj registradoj,
c) konstanta kontrolado de la ŝirmkonstruaĵoj, ekipaĵoj kaj materialoj,
d) ŝirmadaj ekzercoj,
e) informado pri la ŝirmadaj teknikaj indikoj, necesaj por efektivigo de iuj konsiliaj, ŝtataj organizaj taskoj,
f) informado al la perantoj inter la kunlaborantaj staboj.

Funkciado de registara komisaro dum la eksterordinara inundo- kaj grundakvo-danĝero

Dum tiu tempo la ŝirmlaborojn direktas la komisaro, kies taskojn plenumas la prezidanto de Landa Hidrologia Instituto. La eksterordinara preteco komenciĝas, kiam la altiĝanta akvo en la riveroj, resp. riveretapoj atingas nivelon bezonantan la pretecon kaj atendeblas plua inundo.

Specialaj taskoj de la komisaro:

— unueca kaj centra direktado de la ŝirmado,
— zorgado pri la izoligo de la akvoj invadantaj la ŝirmatajn terenojn, rekonduko de la akvo en la fluejon, krome ĉiuj koneksaj laboroj.

Dum la daŭro de la eksterordinara preteco la komisaro — sur la tuta teritorio de la lando — posedas ĉiujn ŝtataŭtoritatajn rajtojn, kiuj apartenas al interesosfero de la ŝirmado kontraŭ inundo kaj grundakvoj.

En plenumado de siaj taskoj por forigi la danĝerojn kaŭzitajn de inundoj kaj aliaj akvoj — en sia registara jursfero — laŭ la landa kunlabora kaj materi-liverada plano la *komisaro disponas pri ĉiuj laboruloj, materi-provizoj kaj veturiloj de la ŝtataj organoj* (magistratoj, oficejoj, institutoj, entreprenoj, kamparmastrumadoj, uzinoj, ktp.).

Se per la mobilizado de la lokaj fortoj ne estas certigebla la venko super la danĝero, — la registara komisaro rajtas utiligi la helpon de la armeo, de la internaj policorganoj, de teknikaj kaj miliciaj trupoj de la laborista gardistaro pere de la ministroj pri defendo, pri internaj aferoj kaj de la landa komandanto de la laborista gardistaro.

La organizaĵo de la registara komisariato

Tiu multflanka tasko, kiun devas solvi la komisariato okaze de inundo, postulas imperative la elkonstruadon de tia organizaĵo, en kiu ĉiu funkcio havas sian ĝustan lokon, kaj ĉiu organiza unuo havas kontentigan agadsferon por rapida, senburokratia aranĝo de la koncernaj taskoj.

* *cirkonspekta:* antaŭzorgema, singarda (Parn. Gvidlibro, Pe: Hung—E-a vortaro)

Laŭ tiuj principoj, uzante la spertojn akiritajn dum la kontraŭinundaj agadoj, elkonstruiĝis la hodiaŭa organizaĵo de la Inunda kaj Grundakva Komisariato (IGK). Tiun organizaĵon prezentas suba skemo:



Strukturo de Inunda kaj Grundakva Registara Komisariato

Funkciado de la Registara Komisiono

Laŭ la (75. § de) hidrologia leĝo la direktado de la ŝirmado kontraŭ inundoj en speciale granda danĝero apartenas al la agadsfero de la Komisariato-Komisiono. Prezidanto de la Komisiono estas vicprezidanto de la Ministra Konsilio, la membroj estas: la registara komisaro kaj la ministroj de nacia defendo, de internaj aferoj, de trafiko kaj poŝto, de konstruado, de agrokulturo kaj nutrado, de sanitaro, de interna komerco kaj de la financoj.

La Registara Komisiono faras la dispoziciojn pere de la komisaro. Tiel estas certigita la senburokratia, rapida kaj efika funkciado de la kontraŭinundaj komplikaj, multfacetaj, transportaj, provizaj, kaj direktadaj taskoj.

Teritoria direktado de la ŝirmado kontraŭ inundo kaj grundakvoj

La rolo de la hidrologia direkcio

Sur la agadtereno de ĉiu hidrologia direkcio ĝia gvidanto direktas la ŝirmadon kun persona respondeco. En la solvo de la teknikaj taskoj li estas subordigita al la prezidanto de la Landa Hidrologia Instituto, resp. dum eksterordinara danĝero — al la registara komisaro.

La ŝirmadon sur la inunda etapo, resp. gardmarŝadon laŭ la digoj kaj en la tuta grundakva tereno direktas ties gvidanto. En tiu ofica dejoro li estas submetita ekskluzive al la superulo designita* en la mobiliza plano.

Generalaj taskoj de la ŝirmadgvidanto

La gvidanto de la ŝirmadoj devas fari ĉiujn dispoziciojn necesajn por la ŝirmado. Speciale li devas prizorgi pri la sekvaj:

1) kontinua observado de la stato de ŝirmkonstruaĵoj kaj pri konstato de la damaĝaj okazaĵoj;
2) mobilizado de laborfortoj, materioj kaj instalaĵoj necesaj por la ŝirmado, ties direktado kaj rekompletigo;
3) kontinua okupigo de la partoprenantoj en la ŝirmlaboroj, ilia provizo per manĝaĵoj, loĝigo kaj registrado;
4) zorgi pri preskribo kaj plenumo de ĉiuj teknikaj disponoj necesaj por forkondukado de la akvoj kaj forigo de danĝero;
5) organizado de taskoj koneksaj kun la glacio-kaŭzataj danĝeroj, direktado de laboroj por detrui la glacion;
6) kontinua registrado de la kostoj de la ŝirmadaj projektoj por la fina kalkulraporto, speciale pri la laboro de partoprenantoj en la ŝirmado, pri pretenditaj maŝinoj, ekipaĵoj kaj, materioj necesaj por la ŝirmado.

Akordigo de la taskoj teknikaj kaj konsiliaj kune kun la registaraj organizaj taskoj pro inundoj kaj grundakvoj

Tiun akordigon prizorgas

a) la *perantoj*, designitaj al la hidrologia direktoro — ĝis la komenco de la eksterordinara preteco;
b) la inundaj *teritoriaj komisionoj* dum la periodo de la eksterordinara preteco.

La perantojn designas la ministroj de internaj aferoj kaj de la nacia defendo, krome tiu de la trafiko kaj poŝto, kaj la prezidanto de la departementa (ĉefurba) konsilio, funkcianta sur la agadteritorio de la hidrologia direkcio.

La designitaj perantoj estas plenpovaj komisiitoj de la organoj reprezentitaj de ili — koncerne la dispoziciotaĵojn pro la inundo.

Organizado de teritoriaj komisionoj

Sur funkciosfero de ĉiu hidrologia direkcio estas organizota teritoria komisiono. Membroj de la teritoria komisiono:

a) prezidantoj aŭ vicprezidantoj de la departementaj (ĉefurba) konsilioj sur teritorioj de koncernaj direkcioj, krome reprezentanto de la,
b) departementaj (ĉefurba) partikomitatoj;
c) hidrologia direkcio,
d) ministro de internaj aferoj,
e) ministro de nacia defendo,
f) ministro de trafiko kaj poŝto,
g) ministro de agrokulturo kaj nutrado,

Kovrado per folioj far skafandristoj

* *designi:* difini, destini por io (Pe: E—H vortaro), (france: désigner).



Ŝipkluzo ĉe elfuejo de kanalo Sió

h) ministro de la sanitaro,
i) laŭnecese reprezentanto de la Landa Hidrologia Instituto, resp. de la registara komisaro.

Prezidanto de la teritoria komisiono estas prezidanto aŭ designita vicprezidanto de tiu departementa (ĉefurba) komitato, sur kies teritorio estas la centro de la kontraŭinunda ŝirmado.

La teritoria komisiono komencas sian funkciadon tiam, kiam estas atendebla la eksterordinara inunda danĝero. Siajn kunsidojn ĝi aranĝas, ĉe la hidrologia organo en la centro de kontraŭinunda ŝirmado. La sekretariajn taskojn koneksajn kun la teritoria komisiono prizorgas la hidrologia direkcio.

La teritoria komisiono laŭ la disponoj de la direktantaj organoj:

a) per la plenumkomitato de la koncerna konsilio
   — prizorgas la ekuzon de publikaj laborfortoj, materioj, ilaroj kaj ekipaĵoj tiel, ke tiuj estu disponeblaj en kvanto, loko kaj tempo difinitaj per la ŝirmadaj organoj;
   — garantias la sanitaran prizorgadon de la kunlaborantaj homoj;
   — zorgas pri la mobilizo de kunlaboruloj, materioj, ilaroj kaj ekipaĵoj;
   — faras la sanitarajn disponadojn necesajn por preventi la epidemiojn atendeblajn pro la evakuado kaj rehejmigo;
   — disponas pri veturiloj servontaj la evakuadon, savagadojn kaj rehejmigon;
   — kontrolas la plenumadon de tiuj agadoj;
b) diras opinion — surbaze de la ekspertizo de la hidrologia direktoro direktanta la teknikajn procedojn pri ceteraj demandoj rilatantaj la sukcesan solvon de la ŝirmado;
c) organizas la registradon de la inundaj kaj grundakvaj damaĝoj, krome iniciatas, akordigas kaj efektivigas la dispoziciojn koneksajn kun la kompensadoj kaj rekonstruadoj. La suprajn taskojn inspektas la komisaro.

Ŝtatadministraj taskoj de la konsilioj

La kontinuajn ŝtatadministrajn taskojn *lioj* dum inundoj plenumas unuavice la komunumaj fakadministraj organoj, — *en urboj* la administraj, konstruaj, trafikaj kaj hidrologiaj sekcioj. Ili kunlaboras kun la etapinĝenieraroj de la hidrologiaj direkcioj, kun produktaj kooperativoj, kun la entreprenoj produktantaj instrumentojn, krome kun la lokaj komisiitoj de la ministerio pri internaj aferoj rilate civilaj homajn fortojn kaj ilarojn, — kaj la organizadon de laborgrupoj.

Pluaj taskoj por pliigi la sekurecon kontraŭ inundoj

La kreado de kontraŭinunda sekureco, respektive pliigo de la jam ekzistanta sekureco ne estas atingebla sole per konstruado de digoj, resp. per fortikigo de la ekzistantaj. Nome la eblecon de inundokonstruaĵoj unuavice ni devas krei per tio, ke oni ordigu la defluajn cirkonstancojn, — do reguligo de la fluejoj. La teknikan kaj ekonomian bazon de evoluigo de la konstruaĵoj kontraŭ inundoj formas tio, ke ni zorgas pri la kontinua konservado kaj evoluigo de la reguligaj faritaĵoj ĉe riveroj provizitaj per digoj. Povas havi gravajn postsekvojn se oni prokrastas la ordigon de la glaci-forkondukado.

La celo de evoluigo estas ja laŭeble plej altgrade levi la sekurecon de ŝirmado. La dig-donata sekureco dependas de la digalteco kaj de la grandeco de dig-sekco. Tiu alteco interrilatas kun la alteco de atendeblaj inundoj; la mezuroj de la sekcoj dependas de la daŭro de inundoj kaj de la kvalito de la termaterio enkonstruita en la digo kaj troviĝanta sub la digo.

Nia sistema kontraŭ-inunda ŝirmado komencita antaŭ 120 jaroj uzis el inter la diversaj sendanĝerigaj sistemoj — laŭ la tiamaj politikaj kaj ekonomiaj cirkonstancoj — tiun sistemon, kiu estis realigebla per la la plej malgrandaj malhelpoj kaj plej ekonomie. Tio estis la fluejreguligo, rektigo de riverkurboj per tratranĉoj, — kaj laŭriveraj digoj. Konsiderante nian hodiaŭan geografian kaj hidrografian situon — preterate-tantante la inundoterenojn de kelkaj enlande fontantaj kaj ĉi tie finiĝantaj riveretoj — ankaŭ nun *tio* estas la sola uzebla ebleco kaj sistemo. Konforme al tio, nia nuna kaj venonta — 10—15 jara — ŝirmado kontraŭ inundoj *tiel* estos konstruata, kun la modifo, ke terenojn — kontraŭ inundoj jam pli frue sendanĝerigitajn, sed havantajn proporcie pli malgrandan valoron, — ni ekuzos por konstrui ebenaĵajn, t. n. *„danĝer-rezervujojn"*, lasante tien la inundomaksimumojn, kaj ŝirmi per tio pli grandvalorajn terenojn.

La altecan sekurecon de la digoj, do la kalkulbazon de la mezurelekto prezentas la t. n. levo de digalteco super la mezurdona inundonivelo. Tio estas 50—150 cm super tiu nivelo, depende (ĉe digoj kaj kontraŭinundaj muroj) de la materio de la digo, de la alteco de la

atendebla ondofrapo, de la malcerteco de akvonivel-kalkuladoj. La bazlarĝon de la digo ni kalkulas je la 8-10-oblo de la alteco de akvokolono apartenanta al la mezurdona inundonivelo, kio dependas de la materio de digo kaj subgrundo kaj ankaŭ de la daŭro de inundo.

Evoluigaj celdifinoj

a) Tiujn ŝirm-linioetapojn, kiuj protektas iom grandajn popolekonomiajn valorojn, oni devas konstrui por ŝirmado kontraŭ inundoj aperantaj dum po cent jaroj. La sekcajn mezurojn de la ŝirmlinioj ni difinas tiel, ke tiuj, super la vidpunktoj likadaj kaj grundmekanikaj, kontentigu ankaŭ la trafikajn kaj maŝinajn konservadajn pretendojn.

b) Kompletan sekurecon ĉe la evoluigo de ŝirmaĵoj — konsiderante, ke temas pri terkonstruaĵoj — oni ne povas atingi. Necesas do teni la nivelon de materia, maŝina kaj alia prepariteco de la ŝirma organizaĵo tiel alte, ke la taskojn, aperontajn dum inundo, ĝi povu rapide, rezulte kaj ekonomie efektivigi.

Dum la evoluigo de la inundodigoj oni devas enkonstrui en la ŝirmkonstruaĵojn proksimume 62—65 milionojn da m^3 da terlabor-kvanto.

Oni devas kontroli dum la evoluigo la teknikan kaj ekonomian staton de la ekzistantaj somerdigoj* kaj ronddigoj*, ĉar:

a) en la valoj de Danubo kaj de Tiso jam antaŭ jaroj estis konstruitaj tiaj somerdigoj kaj ronddigoj, kies ekzistoindeco estas diskutebla pro teknika kaj ekonomia vidpunktoj;

b) parto de la somer- kaj ronddigoj pro la nekonentigaj teknikaj kondiĉoj ne respondas al sia celo: (ne estas kontentiga la sekco, ankaŭ la alteco ne estas konforma, ne havas enlasajn kaj ellasajn aperturojn):

c) sur terenoj protektitaj per somerdigoj oni devas kulturi terproduktojn konformajn al la cirkonstancoj. En la valo de Danubo 270 km-jn longa somerdigo protektas areon de 28 000 hektaroj, — en la valo de Tiso 42 000 hektarojn laŭ longo de 230 km-a somerdigo.

Ĉe la digrompiĝo, por malhelpi la disvastiĝon de la elfluanta akvo, konstruiĝas lokalizaj digoj kiel organa parto de evoluigo de laboro por malhelpi inundo-damaĝojn.

Por malpliigi la nivelon de la akvokvantoj alportitaj per la riveroj en iuj kazoj estas motivite designi *danĝerrezervujojn* kaj konstrui la koneksajn teknikajn instalaĵojn. Konstruado de danĝerrezervujoj alportas sekvajn ekonomiajn avantaĝojn:

a) Ĉe la danĝerrezervujoj oni devas evoluigi la digojn por ŝirmi kontraŭ pli malaltaj inundoj;

b) la damaĝoj kaŭzitaj sur la teritorio de la elektita danĝerrezervujo — ĉar tie estas kampoj, paŝtejoj aŭ nefekunda tereno — estas nekompareble pli malgrandaj, ol se la inundo invadus sur la pli subaj etapoj pli valorajn kulturregionojn;

c) la akvo, fluanta sur la areon de la danĝerrezervujo, tie demetas fajngrajnan sedimenton kaj kiel organika sterko kreskigus la fekundecon de la kampo-paŝtejo, respektive de la nefruktiva tereno.

La ekzistantaj diggardistejoj — kun kelkaj esceptoj — estas malmodernaj. La konstruaĵoj maljuniĝis, ne posedas konformajn magazenojn, laboristhejmon, komunumajn servojn, kaj ĝenerale estas malfacile atingeblaj. Urĝa tasko estas la rekonstruado, modernigo.

La arbaroj sur la inundejoj estas evoluigendaj, unuavice levi la ŝirmpovon de la ekzistantaj *ŝirmarbaroj* sur la teknike dezirendan nivelon, duavice planti novajn inundejajn ŝirmarbarojn: en la Danubvalo 680 hektaran, en Tiso-valo 1300 hektaran, do entute pr. 2000 ha.

Unu el la kondiĉoj de la sukcesa protektado kontraŭ inundo estas la senembarasa transportado. Por tion certigi necesas konstrui konvenajn aliĝantajn vojojn sur la plej danĝera etapo, kaj la stabilizado, resp. tegaĵo de la digokrono, almenaŭ sur kelkaj gravaj etapoj.

La grundmekanikaj cirkonstancoj havas decidan rolon ĉe la pretigo de la ŝirmkonstruaĵoj. La esploro de la subgrundaj cirkonstancoj, la ekzameno de la materioj laŭ kvalito, la difino de la mezuro de la ekonomie realigenda kaj teknike necesa kompaktigo ne estas ebla sen moderna grundmekanika laboratorio. Necesas do, ke estiĝu ĉe ĉiu direkcio movigebla sekcio, kun grundmekanika laboratorio havanta tiujn modernajn instrumentojn.

La reganta vidmaniero por la teknika evoluigo kaj konstruado de la ŝirmlinioj estis preskaŭ sole pliigi la sekurecon kontraŭ inundoj.

Tamen per la grandigo de la sekureco ofte estas atingebla ne pli ol la malgrandigo de tiu akvokvanto, kiu dum inundo fluas tra kronsupro aŭ likas tra la grundtero sur la protektitan flankon. Tial sur tiuj ŝirmetapoj ĉe iom ajna kreskigo de la mezuroj de digoj oni devas kalkuli pri leviĝo de la grundakvonivelo sur la protektita tereno, poste sekvas elŝprucantaj akvoj, kaŭzantaj akvodamaĝojn sur iuj terenoj dum la inundo.

Pro la ŝprucakvoj povas deveni ankaŭ tiaj akvodamaĝoj, kiuj dum longe daŭrantaj inundoj ofte grave malpliigas la ekonomiecon de la ŝirmado. Por tion eviti, oni devas klopodi, ke *sur tiuj ŝirmetapoj, kie la lokaj cirkonstancoj tion ebligas kaj la intereso de la popolekonomio postulas, la bezonata kreskigo de la solideco de ŝirmlinio okazu per tiaj rimedoj, kiuj ebligas malpliigi la damaĝojn kaŭzatajn de la ŝprucakvoj.*

Pro ekonomiaj kaŭzoj ne eblas, ke oni konstruu la digaltecon laŭ la maloftaj maksimumoj de inundoj: la optimumo de elkonstruado estas elektenda iom pli malalte. Per oni havas *ioman riskon:* tio estas demando de ekonomia konsiderado.

Konsekvence de la evolua plano la valoro de la protektitaj teritorioj altiĝos, tial la ĉefajn ŝirmdigojn ni

Glacirompaj ŝipoj sur la supra parto de Tiso

* *somerdigo:* sur la normala inundoteritorio inter rivero kaj la granda digo oni protektas uzeblajn agrokulturajn terenojn per pli malgranda »somerdigo« kontraŭ ne tro altaj inundoj. — *ronddigo:* protektas sur aliaj teritorioj iom izolitajn terenojn ĉirkaŭante ilin.



Aerumado de vivakva kanalo — Gyula

konstruos anstataŭ la 60-jara periodo de inundo-ofteco, je 100-jara periodo.

Post la finkonstruado de la kontraŭ-inunda protektado ne estas ĉesigeblaj la kontinuaj ŝirmadaj laboroj. Ankaŭ eksterlandaj ekzemploj montras, ke digoj — eĉ havantaj pli vastan profilon ol la sekcoj de la enlandaj digoj — trarompiĝis, ĉar oni neglektis la tujajn riparojn kontraŭ danĝeraj tramalsekiĝoj, likadoj, eliĝantaj grundakvoj.

Tial estas necesaj efika evoluigo de kontraŭinunda organizado, de ŝirmadaj ilaroj kaj materioj, — aplikado de sintezaj materialoj, plastaĵoj, — maŝinizado de la protektadaj kaj konservaj laboroj, — enkonduko de novaj procedoj, metodoj, — kaj por certigi la rezultecon de la protektado: la akiro de modernaj telekomunikiloj, spaclumigiloj, — surteraj, surakvaj kaj aeraj trafikiloj.

Por atingi la menciitajn celojn ni planas krome la plenumon de sekvaj esploraj, teknikaj evoluigaj taskoj:

a) evoluigo de hidrologiaj bazoj,

b) pliigo de ŝirmkapacito de la ŝirmkonstruaĵoj,

c) evoluigo de kontraŭinunda ŝirmado,

d) evoluigo de maŝinaj ilaroj kaj de ties teknologio por la digkonstruado kaj konservado,

e) esploro de ekonomia efikeco de ŝirmado kontraŭ inundoj.

Por fundamenti la esplorajn kaj teknikajn evolutaskojn necesas fari eksperimentojn per malgrandaj kaj grandaj modeloj, — krome surlokajn eksperimentojn sur kelkaj establitaj karakterizaj etapoj.

La komplete preta elkonstruado de la tuta hungara kontraŭinunda ŝirmado kompreneble ne estas aranĝebla en unu tago, tio ja bezonas longan tempon kaj plur-miliardan elspezon. Tamen la evoluigo, modernigo ne povas ĉesi eĉ por unu tago, eĉ tiam ne, se provizore ni vivas en seka etapo.

La gvidantojn kaj laborulojn de la hungara hidrologia servo gvidas tiu konscio, ke la evoluigo de konstruaĵoj kontraŭ inundoj, kaj ĝia tuta organizaĵo, la modernigo de protektadaj materioj, ekipaĵoj, — malgraŭ tio, ke perfekta sekureco neniam estas atingebla — kreas la bazon por tio, ke niaj hidrologiaj institucioj eĉ dum la plej grandaj inundoj firme kaj konscience gardostaras.

Tr. Alfonso *Pechan*

MUZIKO kaj ĝia prezentado

La muziko apartenas al tiuj artobranĉoj, ĉe kiuj la viva prezentado estas nepre necesa por doni eblon de estetika ĝuo. Sed se ni komparas la muzikarton kun aliaj artospecoj, ĉe kiuj la prezentado estas same grava, ni trovas, ke la muziko staras en la mezo inter la literaturo kaj la dancarto.

La literaturaj verkoj, kiuj plej strikte postulas la prezentadon, la dramoj, bezonas la scenan ludon por fariĝi vere teatrajoj. Tamen legante dramojn, ili povas doni estetikajn travivaĵojn al la leganto. La skribita aŭ presita dramo povas esti analizata el estetika vidpunkto. Eĉ ekzistas dramoj, kiuj ne povas esti prezentataj sur la scenejo.

La dancarton oni povas alproksimigi nur, se la artistoj efektive dancas. Hodiaŭ jam ekzistas metodoj, per kiuj oni povas pli aŭ malpli precize noti la koreografiajn figurojn kaj turnojn; tamen tiuj notoj ne estas analizeblaj el arta-estetika vidpunkto.

Kiel ni jam menciis, la muzikarto staras en la mezo inter la artoj, pri kiuj ni jam parolis. La skribita aŭ presita muzikverko — la muziknotoj, la partituro — povas en si mem esti estetike analizata, eĉ se oni ne aŭdas ĝin. Baziĝintaj sur la presita aŭ skribita muzikverko, ni povas studi la estetikajn valorojn de ĝi kaj la plej adekvatan prezentadmanieron, per kiu ĝi povas aperi antaŭ la aŭskultantaro.

Sed spite la ĵus diritajn, la muzikverko vivas nur se ĝi estas aŭdebla.

En nia epoko la muzika prezentadarto estas precipe aktuala demando. La granda amaso de muziko, kiu estas aŭdebla eĉ en la plej malgranda vilaĝo — per radio — la multaj koncertoj kaj konsiderinda amaso de gramofondiskoj: ĉio ĉi kondukis al tio, ke en la lastaj jardekoj la prezentado de la muzikverkoj fariĝis tre grava problemo.

La krea muzikisto — la komponisto — plenumas duoblan taskon antaŭ la socio: 1. Li ekkonas la esencon de la aperaĵoj, kiujn li elektis portantoj de sia eldiro kaj 2. esprimas per la iloj de sia arto la ekkonojn per adekvataj artaj rimedoj kun konvinka forto.

La prezentanta muzikisto havas la taskon ekkoni la esencon de la muzikverko, kiun li volas prezenti antaŭ la publiko kaj ĉi tiun ekkonon esprimi per la rimedoj de la prezenta muzikarto.

La arta verko — do ankaŭ la muzikverko — spegulas la objektivan mondon kaj ĝiajn aperaĵojn. Pro tio la laboro de la prezentanta muzikisto estas la perado de la objektiva vero, fiksita per la komponisto en muzikverko. Ni parolas do ĝuste pri la *interpreta laboro* de la prezentanta muzikisto.

La agadon de la prezentanta muzikisto ni povas nomi *nerekta spegulado.*

Kiam muzikverko eksonas antaŭ la aŭskultantaro, aperas grava kontraŭdiro: 1. La eblo de la t.n. *stilfidela* aŭ historia prezentadmaniero kaj 2. la regado de la individueco en la prezentado de la muzikisto. En nia tempo plej ofte la unue menciita prezentadmaniero regas en la muzika vivo. La klopodo, esti „objektiva", do sendependigi sin de la sentoj kaj humoroj, la neglekto de la interna vivo de l'homo estas fundamenta eraro. Kompreneble, la kontraŭa prezentadmaniero, la supereco de la persona, subjektiva motivo en la prezentado de muziko estas same peko kontraŭ la arto.

Granda estas la diferenco en la orientado de la komponisto kaj de la prezentanta muzikisto al la muziko mem kaj al la publiko. La prezentanta muzikisto dependas pli senpere de la ekonomiaj cirkonstancoj ol la komponisto. La nuntempa nivelo de la muzikkulturo ordonas, ke la muzikisto prezentu al la publiko plejparte muzikverkojn de la pasintaj epokoj. Kontraŭe la komponisto povas labori „por si mem" kaj atendi ke la postaj tempoj alportu al li eblon eksonigi liajn verkojn antaŭ la aŭskultantaro, eĉ se li devas atendi multajn jarojn ĝis ĉi tio okazos.

La prezentanta muzikisto vivas en tute alia situacio. Li devas tuj prezenti sian arton kaj devas havi sukceson antaŭ la publiko, se li volas daŭrigi sian prezentan arton. Se li izoliĝas de la publiko, se li prezentas muzikon „por si mem" aŭ por la posteuloj, lia laboro estas vana. La prezentanta artisto neniam laboras por la estonto, sed ĉiam por la nun vivantaj aŭskultantoj, por la nuntempo.

El unu vidpunkto la komponisto kaj la prezentanta artisto similas unu al la alia: ili ambaŭ eraras se ili ne tenas la paŝon kun sia tempo — ambaŭ en sia propra maniero. Ambaŭ devas trovi la kontakton kun sia epoko per malsamaj manieroj, sed samvalide.

Lajos *Lesznai*

La ekonomiaj solvoj estas tutmonde serĉataj
en la tereno de la telekomunika tekniko
La telefonaj instalaĵoj havas
grandan kaj gravan rolon.
Ili ebligas la plej rapidan informŝanĝon kaj
plifaciligas la urĝajn decidojn.

BHG
BUDAPEST

Tipo QA 96 estas precipe ekonomia telefoninstalaĵo, evoluigita de Komunikteknika Entrepreno BHG.

La kompleksoj kaj aranĝajoj estas lokigitaj en bonaspekta, modernforma ŝranko.
La konstruo de la ŝranko ebligas enlokigon kaj konekton de la akcesoraj aparatoj.
La senbrue funkciata subcentralo estas muntebla en normala oficejo, ĉar ĝi ne bezonas specialajn kondiĉojn koncerne la ĉirkaŭaĵon.





La moderne, alloge konstruita klavŝaltilaro estas facile trarigardebla. La ĉi tie lokigitaj lampo-panelo pri okupiteco kaj blokiteco, manipulatora impulsdonilo por ekster-subcentralaj vokoj, datumeniga ebleco en la centron kaj indiko pere de la klavŝaltilaro pro la centro-difektiĝo, ktp. — garantias la efikan manipuladan laboron kaj plifaciligon de la konservado.

BHG
BUDAPEST

Fabrikas:

BHG Komunikteknika Entrepreno
1509 Budapest Pf.: 2.
Telefono: 453-300
Telekso: 22—5933

Eksportas:

BUDAVOX

KULTURA KALEJDOSKOPO

Pupteatra Internacia Festivalo en Zagrebo okazis jam la dekan fojon dum la pasinta aŭtuno: 170 pupistoj de profesiaj ensembloj el kvin landoj prezentis Esperantlingve sian arton, la plej sukcesajn pupteatraĵojn. Por la neesperantista publiko oni sinkrone tradukas la aktoran parolon. Dum dek jaroj partoprenis cent ensembloj el deko da landoj (i. a. la Ŝtata Pupteatro en Budapeŝto), kies prezentadojn disradiis la Jugoslaviaj televidstancoj al vasta publiko. Al PIF en 1978 jam anoncis sin pupteatroj el Afriko, Ĉinio kaj Tokio. Somere la tuta festival-partoprenantaro estos gasto en nordo de Norvegio: la urbo *Tromsö* aranĝos por la Skandinavia publiko »antaŭ-festivalon«.

* * *

Oficiale uzas jam Esperanton la Federacio de Modern-metodaj (Freinet) Edukistoj, kiu havos dusemajnan renkontiĝon en Arjang (Svedio) en julio. Grava parto de la partoprenintoj de la antaŭaj du renkontoj lernis tiucele E-on.

* * *

Humboldt—Universitato en ĉefurbo de GDR, Berlino, enkondukis devigan lekcion por filologo-studentoj pri IL. D-ro Detlev *Blanke* plenumos 15 prelegojn pri planlingvoj en teorio kaj praktiko.

* * *

Per kaj ne pri Esperanto: en EŬROPA DOKUMENTARO, kvaronjara revuo diversaj fakscienculoj traktas la problemojn de la »komuna merkato« de Okcident-Eŭropo. Iliaj studoj aperas en la oficiala organo de Brusela informservo de la naŭlanda »Centro de Eŭropa Edukado« kun la Eŭropa Klubo.

* * *

La Internacian Foiron en Lejpcigo (GDR) akompanis esperantista renkonto »IFER 78«, kies varian programon dekoris la Pola Esperanto-Teatro el Varsovio per plezurdona teatraĵo.

* * *

La Franca Televido en programo »Libera forumo« denove prezentis brave pri E-o. Oni diskutis pri ties pedagogiaj avantaĝoj dum lernado de la gepatra franca kaj de fremdlingvoj; montris filmraportaĵon kun detaloj el parolado prononcita dum la UK de la ĝen. direktoro de Unesko, *M'Bow*, kaj poste kanzonojn.

* * *

LA ESPERO, kolore presita, bela monata revuo estas eldonata en Sud-Korea Respubliko, kiu daŭre enhavas interesajn, serioze verkitajn artikolojn, literaturajn tradukaĵojn kun informoj pri la lando. La sukcesa organiza laboro de niaj samideanoj montras rimarkindajn rezultojn koncerne gravajn aliĝojn al IL flanke de aŭtoritatuloj de la ekonomiaj kaj universitataj sferoj.

* * *

JEN NIA MONDO estas titolo de grandsukcesa E-kurso magnetofona fare de kvinopo de studentoj por la britaj universitataj (internaj) radiostacioj. Multaj altlernejoj disaŭdigis la ampleksan kurson, eĉ pro la kreskanta intereso plurloke ripete. Tiu E-kurso estis jam adaptita por *Islando*, kies ŝtata radio jam dissendas ĝin por la publiko. Apud *Rimini*, itala urbo ĉe la Adria-bordo, en monaĥejo ekfunkciis ultra-kurtonda radiostacio por E-elsendoj; inter la variaj programeroj havas lokon la E-kurso »Jen nia mondo«, kompreneble vestita en itallingvan formon.

* * *

RETORIKO, la verko de Ivo Lapenna aperis japanlingve en Tokio, en du volumoj.

* * *

Radio Moskvo post longa tempo denove komencis disaŭdigi en Esperanto, portempe dum parto de la itallingva elsendo. De ĉiu esperantisto estas atendate, el ĉiuj landoj, kvitanci la ricevon de tiu elsendo, respektive instigi, almenaŭ per kelkaj vortoj sur poŝtkarto, la radiostacion por nepre daŭrigi tiujn disaŭdigojn. (Radio Moskvo, Itala fako, s-ro V. K. Svecov, SU—113 035, Moskvo, Pjutnickaja 25.)

* * *

INTERFAKE estas titolo de komuna bulteno de ĉiuj e-istaj fakaj asocioj. Dum UK en Rejkjavik interkonsetis ties reprezentantoj, ke ili aktive kunlaborados por apogi kaj firmigi unu la alian. Tiucele aktualaj *interŝanĝi spertojn* pri varbado, organizado kaj laborplanoj, reciproke informi pri siaj agadoj. Oni planas prepari *komunajn* internaciajn aranĝojn, dum kiu ope okazos la fakaj kunvenoj, konferencoj. Tia organiza metodo ebligus gravajn ŝparojn pri homaj kaj financaj fortoj. Oni elektis trimembran komisionon por koordinado, ĉekape kun prof. C. *Stöp-Bowitz*, estrarano de UEA pri fakagado. La bultenon »Interfake« redaktas *F. L. Jacomo* en Parizo.

* * *

NON-STOP koresponda kurso de Hungara EA forte kreskigis sian studantaron, utiligante i. a. anoncojn en la plej popularaj hungaraj gazetoj. Kursano rajtas kiam ajn komenci la kurson, kaj tio signifas gravan avantaĝon por la nuntempa homo, kiu konstante luktas kun manko de tempo. Laŭvole eblas dimanĉe renkonti la instruiston en la CO de HEA, por akiri personan helpon en la lernado de E-o.

* * *

La svisa kanzonisto *Oliver Tzaut* (co) kun sia pop-orkestro, inter ili famaj solistoj, produktis stereofonan *diskon*, kun popolkantoj, esperantigitaj far Johán *Valano*. Oni aldonis la tekston de ĉiuj kantoj, kun iom da klarigoj pri nia lingvo — por la neesperantista publiko, ŝatanta tiun modernan muzikarton. Kiel kutime, la enhavo de la disko estas aĉetebla ankaŭ en formo de magnetofon-kaseto. TEJO-kunvenoj entuziasmiĝis aŭskultante la ravajn kanto-prezentojn.

* * *

DWAR L-ESPERANTO estas titolo de propagandcela broŝuro en *malta* lingvo por la insulanoj, eldonita de la Malta E-Societo. Fakto de internacia solidareco en nia internacia movado, ke tiu eldoniĝis *fare* kaj koste de la Sveda E-Federacio, ankaŭ en ties presejo. Ĉu en la iama brita kolonio ne taŭgis ia anglalingva propagandilo? Estas facile imageble — kaj jen la pruvo —, ke la respondo devas esti nea!

E. F.

recenzoj - recenzoj

Germana ĉefverko en Esperanto

Bertolt Brecht: Trigroŝa romano. Tradukis d-ro Karl Schulze. Eldonis Edition Leipzig (GDR) kaj Bleicher Verlag (GFR), 1977. 374 p., 20 cm. Tole bindita. Prezo por Hungario: 85,— forintoj.

La nomo de Brecht estas bone konata por ĉiuj literaturamantoj de la mondo, kaj certe ne nur kiel nomo de verkisto, sed ankaŭ kiel nomo de unu el tiuj germanoj, kiuj ekde la komenco decide elpaŝis kontraŭ la bruna pesto.

Dum sia tuta vivo li batalis kontraŭ ŝtoniĝintaj tradiĉioj, rigidaj dogmoj, kiuj ĉiam nepre kondukas al formiĝo de kontraŭhomaj reĝimoj. Li estis senkompata malamiko de la kapitalisma sociordo, kiu eĉ en sia plej liberala formo kaŝas en si la ĝermon de kontraŭhomaj tendencoj.

La *Trigroŝa romano* celas senmaskigi ĝuste tiun ĉi malamatan sociordon. Brecht volas pruvi — kaj li brile sukcesas en tio — ke la diferenco inter bankieroj kaj fabrikposedantoj unuflanke, kaj ŝtelistoj, rabistoj kaj murdistoj aliflanke, konsistas nur en la diferenco de la dimensioj, kaj ne en la karaktero de la agado. La banditoj de Brecht konscias, ke ili devas apliki la zorge ellaboritan kaj fidinde elprovitan sistemon de la kapitalistoj. Peachum, kiu kunigas almozulojn en trusto, kaj la majstra figuro Mackie Messer, kiu fondas zorge organizitan grandentreprenon por murdistoj kaj rabistoj. Ĉio funkcias glate, kaj la agado laŭ tiu maniero apenaŭ signifas pli grandan riskon por Peachum kaj Mackie Messer, ol, ekzemple, signifus direktado de banko.

La romano plenplenas je amuzaj scenoj, sed pensema leganto povas ĉerpi el ĝi ne nur amuzon, sed ankaŭ trovos nemalmultan intelektan ĝuon. Tamen, oni devas diri, ke la romano perdas iom el la elano kompare al la teatraĵo *Trigroŝa opero,* en kiu Brecht unuafoje prilaboris tiun temon (cetere ĉerpitan el la verko de J. Gay: *The Beggar's Opera).* Devenas el tiu »opero« la kantoj el kiuj pluraj furoris kaj furoras tutmonde: antaŭ ĉio la famega „moritato pri Mackie Messer".

La traduko de Karl Schulze prezentas agrable fluan kaj naturan esperantan tekston, nur tre malofte oni spertas malvigliĝon de la tradukista atento en formo de iom peza vortordo aŭ nebezone komplika esprimo, sed tiaĵoj neniam plene elimineblas el longaj prozaj tradukoj (nek el nacilingvaj).

Ni devas gratuli la eldonejon pro la plaĉa prezento de la libro, kaj per vigla aĉetado atingi, ke post *Nuda inter lupoj* kaj *Trigroŝa romano* sekvu pluaj Esperantaj libroj el GDR. Ĉiu esperantisto petu ĝin ĉe sia kutima libroservo: li elspezos sian monon por valorega kaj interesa verko de mondliteratura grandulo.

Nesolvita mistero

Douglas P. Boatman: La nekonata konato. Originala romano. Dua eldono. 122 p., 20 cm. Eldonis: TK-Eldonejo, Kopenhago, 1977. Prezo: 6,60 ned. gld.

La ĝenro de la mistera rakonto havas riĉajn tradiciojn en la mondliteraturo: estas bedaŭrinde, ke la ŝajn-raciismo de nia epoko tute forpelis ĝin el la literatura firmamento.

Tiom pli bonvena estas la represo de tiu ĉi verko, kiu la unuan fojon aperis en la jaro 1932, kaj Kalocsay per entuziasmaj vortoj recenzas ĝin en la *Bibliografia Gazeto.* Oni ne dubas, ke ĝi havas bonan ŝancon por sukceso ankaŭ post preskaŭ duona jarcento.

La efikeco de la verko konsistas verŝajne en tio, ke la aŭtoro prezentas la temon elegante, en faciltona, felietona stilo, sed sub la leĝereco kaŝas sin tre lerta, foje-foje pliol-rutina historioteksto kaj ne laste bonega rego de la literatura lingvo de Esperanto. Por la recenzanto signifis apartan ĉarmon la fakto, ke la mistero ne solviĝas, kaj formetinte la legitan libron, oni povas agrable cerbumi, kiu finfine estis la mistera „nekonata konato", sinjoro Vincent?

Boatman estis pioniro de la pretendema poramuza literaturo en Esperanto, kaj estas ĝojinde, ke tiu ĝenro estas kultivata kun ĉiam pli da kompetento. La noveloj de M. *Stuttard,* kaj ne laste la romano de Johán *Valano* (Claude *Piron)* sendube daŭrigas la vojon de Boatman.

Tiu ĉi originala rakonto — ja malgraŭ la amplekso, *strukture* ĝi ne estas romano — tute certe alportos tre agrablajn horojn al ĉiu aĉetonto de la verko.

Enhavtabelo de Hungara Vivo por 1977

ORIGINALA PROZO

Baghy, Julio: 230 milionoj por la urbo Strutmagen! (El la romano Hura!) = 2/6—8
Nemere, István: Mi, la murdisto. = 5/15
Nemere, István: Murtapiŝo. = 5/15
Potts, Bertram: La nova instruisto. = 1/16—18
Sokalówna, Barbara: La hedero. = 2/15
Sokalówna, Barbara: La telefono. = 4/19
Tóth, Endre: Viktoro Delmar. = 6/19

TRADUKITA PROZO

Ady, Endre: Aŭtobiografio. (Trad. Benczik, Vilmos.) = 4/2
Ady, Endre: Hungara problemo. (Trad. Benczik, Vilmos.) = 4/1
Ady, Endre: Morbus Hungaricus. (Trad. Benczik, Vilmos.) = 4/1
Ady, Endre: Morto de la naciismo (Trad. Benczik, Vilmos.) = 4/8
Ady, Endre: Promeneto. (Trad. Benczik, Vilmos.) = 4/1
Balázs, Anna: La knabo (Trad. Golden, Éva kaj Bernard.) = 3/9—12
Balázs, Béla: Parencoj (Trad. Rieth, László.) = 5/9
Csák, Gyula: Balado pri la pano kaj cirko (Trad. Varga-Haszonits, Zsuzsa.) =2/12—13
Dobozy, Imre: Fajro kaj fumo. (Trad. Varga-Haszonits Zsuzsa.) = 4/11—13
Gyurkó, László: Sieĝo de la Vintra Palaco. (Trad. Varga-Haszonits-Zsuzsa.) = 5/1—3
Heltai, Gáspár: La enfermita reĝedzino. (Trad. Haszpra, Otto.) = 5/11—13
Hernádi, Gyula — *Jancsó*, Miklós — *Mdivani*, Georgij: Internaciistoj. (Trad. Benczik, Vilmos.) = 1/8—9
Illés, Béla: Samsono kaj Delila. (Trad. Nagy, István.) = 6/18—19
Lázár, Ervin: La bruo. (Trad. Fejes, Márton.) = 6/10—12
Malzberg, Barry N.: Demisiletero. (Trad. Pov, Karl.) = 5/21

ORIGINALA POEZIO

Andrusiewicz, Mira: Patro. = 4/29
Baghy, Julio: Ĉe samovaro. = 2/4
Baghy, Julio: En la rigardo flirtas mir'. = 2/4
Baghy, Julio: Estas mi esperantisto. = 2/8
Baghy, Julio: Ivaĉjo. = 2/4
Baghy, Julio: Post striko. = 2/4
Boulton, Marjorie:Malavara riĉulo. (Al Julio Baghy.) = 2/3
Emba, (Baranyai, Emeriko): Demokratio vivu! = 6/9
Emba: Lampoj kaj steloj. = 6/9
Emba: La neakireblaĵo. = 6/9
Emba: Mi. = 6/9
Emba: Popol' ni estas... = 6/9
Estók, Judit: Ĉe la rivero. = 1/12
Estók, Judit: Kuras lumo. = 1/12
Estók, Judit: Literoj, homoj. = 1/12
Estók, Judit: Neatendita. = 1/12
Giorgi, Aldo de: Estas kiel Vi. = 3/29
Goodheir, A.: Tago de la solulo. = 4/29
Hoñlov, Nikolao: 1905 (Moskvo). = 5/9
Kořínek, Jiří: Al la verkistino Magda Szabó. = 5/27
Kořínek, Jiří: Geteca. = 4/29

TRADUKITA POEZIO

Ady, Endre: Admono al la gardantoj. (Trad. Kalocsay, Kálmán.) = 4/9
Ady, Endre: Krucifikso en arbaro. (Trad. Kalocsay, Kálmán.) 4/4
Ady, Endre: Batalo kun la Grandsinjoro. (Trad. Kalocsay, Kálmán.) = 4/6
Ady, Endre: De Er' ĝis oceano. (Trad. Rados, Péter.) = 4/3
Ady, Endre: Krucifikso en arbaro. (Trad. Kalocsay, Kálmán.) = 4/7
Ady, Endre: La mesioj hungaraj. (Trad. Rados, Péter.) = 4/3
Ady, Endre: Nepo de György Dózsa. (Trad. Fejes, Márton.) = 4/7
Ady, Endre: Plori, plori, plori. (Trad. Kalocsay, Kálmán.) = 4/4
Ady, Endre: Rememoro pri nokto somera. (Trad. Kalocsay, Kálmán.) = 4/9
Ady, Endre: Sango kaj oro. (Trad. Fejes, Márton.) = 4/3
Ady, Endre: La stelo de steloj. (Trad. Baranyai Imre.) = 4/7
Ady, Endre: Virinoj sur la bordo. (Trad. Kalocsay Kálmán.) = 4/3
Blake, William: La tigro. (Trad. Auld, William.) = 6/11
Brecht, Bertolt: La tapiŝteksistoj el Kulan-Bulak honoras Leninon. (Trad. Fernández, A.) = 5/7
Gál, László: Envio. (Trad. Miličevič, Boriša.) = 6/21
Gál, László Kanto pri revolučio.. (Trad. Miličevič, Boriša.) = 6/21
Gál, László: Maljuneco. (Trad. Miličevič, Boriša.) = 6/21
Gál, László: Poeto. (Trad. Miličevič, Boriša.) = 6/21
Heltai, Jenő: Kino. (Trad. Fejes, Márton.) = 1/3
Juhász, Gyula: Kia estis...? (Trad. Baghy, Julio.) = 2/11
Majakovskij, V V.: Bonege. (Trad. Gusev, K.) = 5/4—5
Pilinszky, János: Brontë. (Trad. Hules, Béla.) = 3/13
Pilinszky, János: Disipuloj. (Trad. Hules, Béla.) = 3/13
Pilinszky, János: Finaloj. (Trad. Hules, Béla.) = 3/13
Pilinszky, János: Juvelo. (Trad. Hules, Béla.) = 3/13
Pilinszky, János: Rembrandt. (Trad. Hules, Béla.) = 3/13
Simor, András: Parolu por ili! (Trad. Gabányi, Zoltán.) = 1/19
Visnapuu, Henrik: Orflava kanto. (Trad. Dresen, Hilda.) = 6/13
Zelk, Zoltán: Bulko-danco el kino de malnovaj tempoj. (Trad. Fejes, Márton.) = 1/3
Zelk, Zoltán: Infan-poemo pri kino de novaj tempoj. (Trad. Fejes, Márton.) = 1/3

RECENZOJ

Auld, William: Facetoj de Esperanto. (Benczik, Vilmos.) = 1/26

Burns, Robert: Kantoj, poemoj kaj satiroj. (Benczik, Vilmos.) = 6/29
Apolloner, Heide: Nia originala prozo. (Benczik, Vilmos.) = 5/29
Kanto super lulilo (Ok slovakaj aŭtoroj.) (Benczik, Vilmos.) = 6/28
Korolenko, V.: La senlingvulo. (Benczik, Vilmos.) = 5/28
Lister, Daphne: Ĝis nun. (Benczik, Vilmos.) = 1/20
Miyamoto, Masao: Naskitaj sur la ruino Okinawa. = 5/28
Rosbach, Johan Hammond: Fianĉo de l' sorto. (Benczik, Vilmos.) = 6/29
Tammsaare, A. H.: La mastro de Korboja (Benczik Vilmos.) = 5/30
Valano, Johán: Ĉu vi kuiras ĉine? (Benczik, Vilmos.) = 5/28—29
Walraamoen, Kjell — *Gabrielli*, Lina: Ni devas vivi. (Fenyvesi, Ervin.) = 5/29
Waringhien, G.: Ni kaj ĝi. (Kalocsay, Kálmán.) = 4/28—29
Zigzage tra librolando. (Benczik, Vilmos.) = 2/29, 3/28

HIDROLOGIO

László, Ferenc: Akvoekonomio estas komuna afero de la socio. (Trad. Pechan, Alfonz.) = 5/22—25
László, Ferenc: Kien direktiĝas la akvomastrumado en Hungario? (Trad. Pechán, Alfonz.) = 2/19—24
László, Ferenc: Medioprotektado — monda problemo. (Trad. Pechán, Alfonz.) = 1/20—25
László, Ferenc: Multflankaj klopodoj por evuluigo kaj protektado de Balatono kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. (Trad. Pechán, Alfonz.) = 3/20—25, 4/20—25
László, Ferenc: La utiligo de Danubo. (Trad. Pechán, Alfonz.) = 6/24—27

FILMO

Balkányi, Pál: Hungaro, kiu kreis la modernan filmindustrion (pri Adolf Zukor.) = 1/7
Benczik, Vilmos: Sekcanto de la historio. Pri la filmoj de Miklós Jancsó. = 1/4—5
Gyertyán, Ervin: La hungara filmo. (Trad. Fenyvesi, Ervin.) = 1/1—3
Kovács, András: Antaŭparolo al la filmo FALAK (Muroj.) (Trad. László, István.) = 1/6
Varga-Haszonits, Zsuzsa: Sciigoj el la hungara filmomondo. = 1/5
Varga-Haszonits, Zsuzsa: La kvina sigelo = 1/7

MUZIKO

Király, Ferenc: Hungara ĥordirektistino el „La Perloj de Antiloj". (Trad. Varga-Haszonits, Zsuzsa.) = 3/14
László, István: Disvastiĝas la muzikpedagogio de Kodály. = 3/14
Lesznai, Lajos: Hungaraj muzikistoj en la tuta mondo = 2/28, 3/15
Lesznai, Lajos: Muzika konkurso en Budapeŝto = 1/13
Lesznai, Lajos: Pri la komenco de la okcidenta muzikkulturo. = 6/30

ESPERANTO-MOVADO

A. P.: Hungara Fervojista Mondo — jubileas. = 3/29
Barna, Zoltán: La unuaj paŝoj. = 3/1—3
Benczik, Vilmos: El kio hungaroj lernas Esperanton? = 3/6
Esperantistoj — kontribuantoj al nacia kaj internacia kulturo. = 4/14—15
L. L.: Tiel instruis Julio Baghy. = 2/5
Libroj por ĉiuj. = 2/27
Szerdahelyi, István: Baroj kaj eblecoj en la socia emancipo de la internacia lingvo. = 4/27
Varga-Haszonits, Zsuzsa: Géza Bárczi, la esperantisto. = 3/7—8
Zágoni, Jenő: Gábor Bálint. = 3/4—5

LITERATURO

Varga-Haszonits, Zsuzsa: Endre ADY, la atakita poeto. = 4/10
Kalocsay, Kálmán: Endre Ady (1877—1919). = 4/5—6
Pri Julio BAGHY (Mozaiko.) = 2/1
Benczik, Vilmos: La prozo de Julio Baghy. = 2/9—10
Boulton, Marjorie: Julio Baghy, la lirikisto. = 2/2—3
Fenyvesi, Ervin: John Reed, la raportisto pri la Oktobra Revolucio. = 5/6
Literatura metiejo:
Benczik, Vilmos — *Varga-Haszonits*, Zsuzsa: Pri la poemoj de Estók, Judit. = 1/12
Fenyvesi, Ervin: Pri la belstila prozo. = 4/18
Rados, Péter: Trafa traduko. (Weöres, Sándor: Hundbazaro.) = 2/14

DIVERSAJ TEMOJ

Fenyvesi, Ervin: Kiel prononci la hungarajn nomojn? = 6/32
Haszpra, Otto: Fotado de la Suno. = 6/32
László, István: Karnavalaj popolkutimoj en Hungario. = 6/1—3
László, István: Modernaj metodoj en la akcident-kirurgio. = 4/15
Lesznai, Lajos: Gusto kaj modo. = 5/26
M'Bow, Amadou-Mahtar: Unesko por la rajto je komunikado. = 6/4—5
Varga-Haszonits, Zsuzsa: Diskuto pri lingvoinstruado. = 4/13

INTERVJUO

Király, Ildikó: „Esperanto estas mia propra lingvo". (kun W. Auld.) = 6/13—15
Szenes, Imre: Problemo, kiu koncernas ĉiun popolon de la mondo. (kun Bíró, József.) = 6/5—7
Király, Ildikó: Intervjuo kun Marjorie Boulton. = 3/26—27
Szenes, Imre: Interparolo kun profesoro Mihály Simai (prezidanto de Monda Ligo de UNO-Asocioj.) = 1/14—15

NEKROLOGOJ

Paŭlo Balkányi. = 2/29
Lajos Lesznai. = 6/30
Tibor Ujlaky-Nagy. = 3/29
Tibor Ujlaky-Nagy. (Haszpra, Otto.) = 5/27

KONSTANTAJ RUBRIKOJ

Krucenigmo en ĉiuj numeroj
Ŝako en ĉiuj numeroj escepte nron 6
Leterkesto en ĉiuj numeroj escepte nron 6
Korespondi deziras en ĉiuj numeroj escepte nron 6
Panoramo (Bálint, Szilárd) en ĉiuj numeroj
Revuo de revuoj en ĉiuj numeroj escepte nron 6

Kompilis Lajos *Kökény*

PRI LA AMBICIO

ricevos konsilon, kiu havas ambicion por solvi la krucenigmon de nia slovaka amiko Stano *Marĉek* (Martin).

Ensendi sufiĉas nur la kašitan frazon ĝis la 15-a de julio 1978. Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

La ĝusta solvo de krucenigmo en la 1977/5 numero: „Lenin kaj partio samvaloras ĉe ni,/ Kiel la ĝemeloj de de l' patrino historio." Libropremion gajnis: Kris LONG en Britujo, Werner PETRUSKE el GDR kaj János PETIK el Hungario.



DEKSTREN MALSUPREN: 1 —Nulo. 2 — Unuo de elektra rezistanco. 3 — Delikatajo por sciuro. 4. —„Varo" de Apolono en Delfoi. 5. — Multvalora metalo (R). — unu „paŝo" de maŝinkudrilo. 6. — Korinklinos — gasa hidrokarbido (C_2H_6). 7. —*Unua parto de kašfrazo* (Zamenhofa proverbo). 8. — Scias, memoras — urbo de la 61-a UK. 9. — Disĵetas grajnojn — esti sur piedoj. 10. — Agoj de iu tiranta — postsigno. 11. — Buŝrandoj — loĝejo por brutoj. 12. — Faros, estigos — malgranda aro. 13. *Tria parto de kašfrazo.* 14. — Eonan universepokon — grasa likvaĵo. 15. — Faras truon per pinta ilo — finaĵo de prezenco. 16. — Paroladas. 17. — Plenaj Ilustritaj Vortaroj. 18. — Priparolata afero. 19. Aŭtomobila landsimbolo de Rumanio.

MALDEKSTREN MALSUPREN: 8. — Kemia simbolo de bario. 9. — Interpunkcia signo. 10. — Regule vibranta sono. 11. — Havas en la mano — kemia simbolo de radiumo. 12. — Senkonka heliko (R) — prapatro. 13. — Rilata al metala vestaĵo — skizo, plano. 14. — Skrapos kampon per erpilo — senkonsidera ago de infano. 15. — Mallongaj literaturaj verkoj — dramo de Shakespeare. 16. — Altaj ledaj piedvestoj — loĝanto de granda Azia duoninsulo. 17. — Donacis — metala elemento (Sn). 18. — Primitiva kanuo (R) — astro. 19. Despote — malnova mezurunuo de longo. 20. — *Dua parto de kašfrazo* — vivejo de plantoj, bestoj. 21. — La longeco de jupoj dependas de tio (R) — deflankigi de la vero. 22. — Emfaza interjekcio — organo de aŭdkapablo. 23. — Legomaĵo. 24. — Surĉevala sidloko. 25. — Signo de necesejo.

Stano *Marĉek*

ŜAKO

"Gens una sumus" – Unu gento ni estas

Rubrikestro: D-ro Jozefo Németh
10-a numero:
JÁNOS KISS
1-a premiero »Rákóczi Sakk« 1944.



Mato en 2 movoj! (komencas Bl.)

Bl. Rg1, Dé3, Tb6, Té4, Ĉc8, Ĉd1, Kf8, Kh7, b3
Ng.: Rd5, Da7, Ta5, Tc7, Ĉc6, Ĉg2, Ka1, Ka4, a6, (9+9)

Limdato de solvo: *post apero 15-a tago!* Sendota al Redakcio (sur la koverto: ŜAKO). La solvo de 9-a problemo: ŝlosilmovo estas: *1. Dc3!*

Prosperas la koresponda team-turniro de EŜLI. Ĝin partoprenas 21 teamoj (po 4 anoj) el 14 landoj: Ĉeĥoslovakio, Francio, Rumanio, Sovet-Unio, Germana DR, Germana FR, Jugoslavio, Nederlando, Kanado, Usono, Hispanio, Bulgario, Finnlando, Hungario.

En tiu ŝak-teamturniro ekzistas nur unu oficiala lingvo: Esperanto! Hungarion reprezentas 2 teamoj, kiuj havas anojn: A /Z. Suha, S. Szilágyi, J. Ruppáner, (Z. Czibulka), D-ro Németh/; B /D-ro P. Császár, J. Tálos, J. Mikitovits, J. Bóka/ (dum 1977—1979).

ŜAKLEKSIKONETO

Unua ŝakvortaro faka en Esperanto. EŜGH por helpi al siaj membroj kompilis libreton, kiu enhavas 400 vortojn ligite kun la ŝako (ludo, figuroj, regulo, fakliteraturo, ktp). La vortaro estas unua kaj unika en la movado de Esperanta ŝako.

La libreto enhavas la vortojn hungare kaj Esperante. Kiun interesas la vortaro, bonvolu skribi al rubrikestro.

LETERKESTO

Edwin de Kock, Pretoria, Resp. de Sud-Afriko: dankon pro via vivsigno el tiu urbo, kie vi nun laboras, kiel eksperto de afrikaansa lingvo. Ni esperas, ke vi disponos sufiĉe da tempo por prepari vian disertacion, post la laborokupo, zorgi pri la lingva nivelo de ŝtataj eldonaĵoj. Via »apreco kaj daŭra ŝato al la multmerita revuo HV« estas ĉe ni alte taksata, ne malpli la salutoj kaj bondeziroj al nia redaktoro Vilmos *Benczik*. Pro nia granda korespondado kun legantoj, aŭtoroj kaj institucioj, foje iu povas rimarki troan paŭzon de leterŝanĝo. Do neniel kredu, ke kontaktoj kun la „alia" duonmondo estus eĉ iomete malhelpitaj en nia lando. Tute ne; tion vi povos sperti ankaŭ persone, se veturonta somere al UK vizitos eventuale Hungarlandon. Vi estos varme bonvenigata de nia redakcio; nun akceptu ĝian plenan saluton!

Gerrit Berveling, NL, Vlaardingen: en tiea radio-elsendo pri Endre *Ady* nederlandaj verkistoj disputis pri lia poezia graveco — favore kaj kontraŭe — kaj evidentiĝis, ke „maltrafeco de la tradukoj" motivis la subtaksanton, ne legintan hazarde el bonaj tradukoj. Aŭdinte tiun disputon vi rajte sentis havi superan pozicion: vi konas jam liajn verkojn en *ĝustaj* E-tradukoj, laste en nia speciala numero 1977/4, okaze de Ady-jubileo. Vian instigon, daŭre publikigi bonajn tradukojn, ni konsentante akceptas — kaj ne nur por hungaraj aŭtoroj, ĉar HV intence strebas esti publikilo ankaŭ por verkoj de aliaj popoloj.

Zbigniew Wiszewski, Varsovio: monbiletoj kutime havas surskribojn ankaŭ en fremdaj lingvoj, sed la relative tre malgrandaj poŝtmarkoj *ne*. Oni rajtas bedaŭri tiun ĝeneralan kutimon de la poŝtoj, sed ĝis vasta enkonduko de E-o ne atendu alie — eĉ tiam ne certe, pro spacomanko. Helpe de korespondado vi tamen facile ricevos tradukon de la vortoj sur fremdaj poŝtmarkoj. Se korespondantoj intence surgluas okaze belegajn, eventuale histori-temajn poŝtmarkojn, agas kompleze, se en la letero aldonas ties esperantigitajn surskribojn. Petu tian konduton de ili!

N. Lentaigne, F, Montpellier: se civitanon de Hungario trafas akcidento aŭ malsano en ne-socialismaj landoj, kaj li ne kapablas pagi hospitalo-elspezojn ktp. surloke el propra mono, nek aĉeti ekstran aviadilbileton, tiukaze lin nepre helpos eĉ finance la hungara ambasado en la koncerna lando (zorgos pri bileto ktp.). La vojaĝanto, antaŭ la ekveturo, en Hungario kontraktis (certe) vojaĝ-asekuron, kio kovros (post hejmenveno) la supre menciitajn elspezojn, ĝis la kontraktita limito. Kompreneble, la sumon pruntitan de la ambasado, biletkoston ktp., li devas repagi post hejmenveno al la ministerio pri eksteraj aferoj. Sekve la eventuala invitinto praktike ne devas mem kovri tiujn elspezojn eksterordinarajn por lia gasto. — En socialismaj landoj nia civitano tute senpage ricevos ĉian savagadon, terapian kuracadon, simile kiel en la hejmlando (socia asekuro), koncerne apartan monbezonon, aviadilbileton, tie same helpas la ambasado, laŭ la supre skribitaj kondiĉoj.

Korespondi deziras

Kluboj: Samarkanda E-klubo kun kluboj kaj personoj en tm, interŝ. albumojn, prosp., revuojn, librojn, diskojn ks. Estro: Anatolo *Ionesov*, SU—700 300, ul. Sovetskaja 53. — „Klub Teknika" E-rondo (23—27 j.) temoj div. (urbo 50 mil loĝ.), PL—27-400 *Ostrowiec Swiet.*, Osiedle Ogrady 26. — Teknika-lernejo-gekursanoj (15—20) pĉt. Gvid.: Jaan *Ojalo*, SU—200 001 *Tallinn*, Estonio, Narva mnt. 23/5. —

Interŝanĝas: Rudolf *Zsoldos* instr., bk, pri muziko, veturoj, Jugosl. — 24000 *Subotica*, Iv. Milankovica 29/B. — Pentr. reprod., fotoj, E-libroj, ins. ktp, pri medicino, literaturo, fac. muziko, Tanja *Plahina* (23) medicina studentino, SU—153 478, *Ivanovo*, ul. Sadovaja 36—465. — Pm, libroj, Oleg *Efimov* (23) pri hist. literaturo. SU, *Kaluga*, ul. Teatralnaja 21. kv. 10. — Pm, bk, dia, disko, magnokasetoj, mod-revuoj: Jan *Prosianowski* (19), ktm, pri liter. moderna muziko, sporto, turismo, recipr. gastigado. PL—53-645, *Wroclaw*, ul. Mladym Techników 58. — Teresa *Jankowska* (48) infankuracistino, ilustr. revuoj, pm, bk, kalendaroj. PL — 00669 *Varsovio* Em. Plater 12/14. — Pm, insignoj, poŝkalend. E-aĵoj, kun gejunuloj Jevgenij *Balandin* lern. SU—483310, Kazaĥa SSR, *Talgar*, Bajkalskaja 28. — Inĝ. Boris *Granat* (29) ekonomisto en sc. inst., fraŭlo, I-a grada ŝakisto, E-librojn, bk, pri E-movado, politiko ktp. amike, *Voroneĵ*, SU—394 026, ul. Ereieeva 27, kv. 25.

El Bulgario: Cvetan *Gergov* (42) inĝ. ktm, pri ĉt. *Sofio*, ul. Vasil Dimitrov, Bl. 244, E/77. — Daniela *Milanova* (16) kun gesamaĝuloj pĉt, sama adr. — *El Pollando: Jan Walerczak* (26), pm, bk, sporto, filmo, moderna muziko ks. 91—067, *Lódž*, ul. Mielczarskiego 14. m 16. — Ryszard *Stempień* (35) ofic. ktm, liter, mod. muziko, sporto, kino, filatelio, dia, disk, magnokas. 59-840 *Zawidów*, str. C. Skladowskiej 9. — Maria *Kasperkiewicz* (18), bk, E, muziko, ankaŭ A, Fr, R lingve: 34—130, *Kalwaria Zebnydowska*, ul. Bernardynska 9. — *El Estonio:* Heino *Metsamärt* (38) teknikisto, bk, ins, pri turismo, foto, lingvoj. SU—202 900 *Viljandi* pk. 60. — Annely *Saar* (18) studentino, ktm, pri liter, bk, junul. probl. SU—202 900 *Viljandi* pk. 60. — *El Litovio:* inĝ. Laimundas *Abromas*, pĉt., ktm, certe resp. SU — 234 432 *Jurbarkas*, p. Pilis 1. — *El Ukrainio:* Judit *Panulin* (16) hungara lern, ktm, SU— 295 510, *Beregovo*, ul. Stefanika 98. — Katalin *Kovaĉ* (18) hungara studentino, pĉt., ktm, SU—295 514, *Bereg*, ul. Pobeda 295. — *El Uzbekio:* Vladimir *Lemelev* (39) medicinisto, ktm, SU—703 000 *Samarkand*, Engelsa 5. — Ŝafkat *Hamrakulov* (20) fraŭlo, SU—703048 *Samarkand*, A. Ikramova 20., kv. 6. — Marina *Palĥĉjan* (21) SU—703014, *Samarkand*, Termeĵskaja pr. 2D23. — Elena *Ermakova*, (18) ktm, psikologio, karaktero, grafol., medic, bk, mod-gazetoj, pm. SU—400078 *Volgograd*, Kuznecova 9—39. — Juri *Vdovin* (23) fiziko-mat. stud. de Altaja Univ., veturos al UK Varna, serioze. SU—656099 *Barnaul* a/k 11.

HISOPO - PIEDTINKTURO

Nur por uzo sur korp-eksterajo!
Gi enhavas eksluzive nur vegetajajn efikkomponantojn.

Ne medikamento, sed ne malhavebla sekurigilo de la moderna piedflegado, higiena zorgado.

Gi defendas vian sanon, laborkapablon per la malpliigo de pied-ŝvitado, ĉesigo de malagrablaj piedodoro kaj jukemo.



Uz-konsiloj:
Lavu la piedojn zorgeme, viŝu ilin tute sekaj. Peniku la interfingran haŭton per vatotufo tordita sur stangeto kaj trempita en Hisopo-piedtinkturon, — simile la plandon kaj ĉiun haŭtparton, kie pro haŭtkrevajoj, jukemo aŭ pro alia malagrablajo estas konjektebla komenciĝanta mikozo. La penikitan haŭtsuprajon lasu tute sekiĝi.

Ripetu la penikadon en la unua semajno ĉiutage, en la dua semajno ĉiun duan tagon. Proksimume post du semajnoj 3—4 fojojn penikŝmiru denove, por ke la unua kuracado sukcese finiĝu.

Krome ni konsilas, ke en ĉiu tria — kvara semajno bonvolu kompletigi la ĉiutagan sinlavadon per zorgema, pedanta Hisoptinktura ŝmirado.

Post la manipulado — por eviti eventualan haŭtsekiĝon — ŝmiru la haŭton per grasa kremo.

Fabrikas:

„SZILASMENTI" MGTSZ

LABORATORIO DE KURAC PLANTO-PRILABORO
KAJ DE VOLATILAJ OLEOJ
H—2144 KEREPES



Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ĜANGEBLA

Konsumturist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
Hotel Intercontinental — Hotel Gellért